

# HUNGARA VIVO

6

1979

11,- Ft

# KOMENCU ĈE SKALA!

## NI ATENDAS VIN

**de la 8-a horo ĝis la 19-a horo en nia sekcio**

**de multspecaj industri-varoj**

**de la 7-a horo ĝis la 20-a horo en nia nutraj-sekcio**

**SKÁLA**

**Kliento-servo: 850-850**

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H–1368
Aperas dumonate
XIX. jaro 1979. Nro 6
(88)

ENHAVO

*Benczik*, V.: Intervjuo kun ministro pri klerigado de la Estona SSR, k-do Ferdinand Eisen ..... 202
*Rados*, P.A.: Granda paseo, brilega futuro ..... 203
Tridek jaroj da kunlaboro ..... 204
*Varga-Haszonits*, Zs.: István Örkény 1912 - 1979 ..... 206
*Örkény*, I.: Unuminutaj noveloj .. 207
*V.B.*: Lucerna mozaiko ..... 208
*Benczik*, V.: Mi fariĝis pornografiisto 209
*Halász*, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 12. (VHZS) . 210
*Torda*, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo (P.A.*Rados*) ..... 212
*Berzsenyi*, D.: Mia dividparto (K. *Kalocsay*) ..... 214
*Csokonai Vitéz*, M.: Al la Espero, (K.*Kalocsay*) La Senmorteco de l' Animo (F.*Szilágyi*) .... 214
*Holzhaus*, A.: Zamenhof ne estis monavida ..... 215
*Fenyvesi*, E.: La apostolo .... 217
*Kalocsay*, K.: Rimportreto XIV (Andreo Ĉe) ..... 217
Originala poezio ..... 218
*Gergely*, M.: László Mednyánszky 219
*Farkas-Tatár*, É.: Panoramo .... 220
*Fenyvesi*, E.: Revuo de revuoj .. 222
*Benczik*, V.: Stranga historio pri heredita pentraĵo ..... 223
*D-ro László*, F.: Ŝirmado de nia akvotrezoro (A.*Pechán*) ... 226
Recenzoj ..... 234
*Bálint*, Sz.: Al kiu apartenas Suzana? ..... 237
Krucenigmo, Korespondi deziras 238
Enhavtabelo 1979 ..... 239

Sur titolpaĝo pentraĵo de L.*Mednyánszky*: Salikoj sur riverbordo (ĉ. 1905) (Detalo)

# La atuto de tiu ĉi...

numero nepre estas la intervjuo kun Ferdinand *Eisen*, ministro pri klerigado de la Estona Soveta Socialisma Respubliko. Verŝajne eĉ multaj sovetaj esperantistoj surpriziĝos eksciante, ke en Sovetio troviĝas ministro, kiu estas esperantisto. Sed tiu cirkonstanco estas kvazaŭ nur „spicaĵo" de la intervjuo, kiu en si mem estas gravega, ja kamarado *Eisen* estas ĝis nun la plej altranga politika personeco en Sovetio, kiu lastatempe elpaŝis publike por Esperanto.

Ne hazarde tiun intervjuon sekvas sur la paĝo 203 artikolo pri la soveta movado: la intensiĝo de ĝia evoluo estas sendube la plej grava atingaĵo de la internacilingva movado dum 1979.

Certe multaj volonte legos iom pri la agado de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo (EKI). Tiu organizaĵo de la socialismaj landoj sukcese funkcias jam depost tridek jaroj, kaj en la nuna tempo, kiam eĉ tiuj devas okupiĝi pri ekonomio, kiuj pli frue eble entute ne sciis pri ĝia ekzisto, tre probable artikolo pri EKI ne estos seninteresa.

Tamen, ne ekonomiaj artikoloj, sed literaturaĵoj plenigas la plimulton de la paĝoj en tiu ĉi numero. Pro dolora evento aperas verkoj de István *Örkény*, kies nomo estas konata ne nur por atentaj legantoj de nia revuo, sed ankaŭ por teatroŝatantoj de Eŭropo: lia dramo *La familio Tót* furoris en deko da ĉefurboj. Tiu ĉi elstara hungara verkisto mortis dum tiu ĉi jaro.

Pli ol kutime ampleksaj specimenoj kompletigas nian literaturhistorian serion: espereble la poemoj de Dániel *Berzsenyi* kaj Mihály *Csokonai Vitéz* helpos pli bone kompreni la etoson de la hungara klerismo.

Ricevis indan spacon ankaŭ la originala literaturo. Aperas bela fasko da poemoj, kelkaj de novuloj, aliaj de maturaj poetoj. Oni povas legi ankaŭ originalan novelon, kvankam eble iuj trovos, ke la redaktoro misuzis sian potencon, plenigante per ĝi tri paĝojn...

La lastaj du paĝoj iasence prezentas la „revuon de nia revuo" dum 1979. La jara enhavtabelo celas ne nur helpi ĉe reserĉado de tiu aŭ alia kontribuaĵo, sed ankaŭ pensigi la legantojn (kaj kompreneble ankaŭ nin mem) pri tio, kiel estis foruzitaj la disponeblaj 240 paĝoj? La rubrikestro de *Leterkesto* multe ĝojus, se li ricevus multajn leterojn kun interesaj komentoj.

En la venonta jaro ni klopodos daŭrigi nian ĵus kreitan tradicion aperigi ĉiujn numerojn kun koloraj kovrilpaĝoj, kvankam ni ne povas firme promesi tion. Male, ni klopodos maldaŭrigi la ĝenan tradicion de kaprica aperritmo.

Kun la firma espero, ke tiu ĉi numero atingos niajn abonantojn sufiĉe frue, por ke la suba frazo ne malaktualiĝu, la Redakcio varme deziras al ĉiuj jamaj kaj estontaj legantoj

**FELIĈAN NOVAN JARON!**

# „Esperanto kreas ponton inter homoj de diversaj landoj kaj nacioj"

**Intervjuo kun kamarado Ferdinand Eisen, ministro pri klerigado de la Estona Soveta Socialisma Respubliko**

En nia n-ro 1978/1 aperis intervjuo de k-do Károly *Polinszky*, hungara ministro de edukado, pri Esperanto kaj la monda lingva problemo. Tiam ni metis la demandon, kiu alilanda kolego de k-do Polinszky ekparolos pri la sama temo? Nun alvenis la tempo por tio: k-do Ferdinand *Eisen*, ministro pri klerigado de la Estona Soveta Socialisma Respubliko afable konsentis doni intervjuon al nia revuo. La intervjuo estis farita en Lucerno, kie k-do Eisen sekvis la laborojn de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto.

*Estas nemultaj ministroj en la mondo, kiuj scias Esperanton. Ĉu Vi povus rakonti, kiam kaj kiel Vi konatiĝis kun la Internacia Lingvo?*

Estante lernanto, mi partoprenis agadon de maldektrula gelernanta rondo, kie mi interkonatiĝis ankaŭ kun esperantistoj kaj eklernis la lingvon. Mia instiganto kaj la unua instruanto estis la konata estona revolucia aganto Nume *Ruus*[x]. Ĝis la komenco de la Dua Mondmilito mi uzis Esperanton por korespondalo kun aliandaj esperantistoj.

*Ĉu Vi persone iam spertis, ke lingvaj malfacilaĵoj malhelpis Vin en Via laboro kaj Viaj privataj kontaktoj?*

Mi vojaĝis en multaj landoj kaj ofte sentis malgrablaĵojn pro la lingvaj baroj. En tiaj okazoj mi sentas psikan permon pro tio, ke mankas ebleco por rektaj kontaktoj kaj rilatoj inter la homoj. Mi opinias, ke Esperanto kreas ponton inter homoj de diversaj landoj kaj nacioj.

*Kiel statas la instruado de fremdaj lingvoj en la Estona SSR kaj kiuspecaj problemoj estas solvotaj ĉikampe? Kiajn tradiciojn kaj aktualan staton havas la instruado de Esperanto? Ĉu Vi povus diri ion pri la perspektivoj?*

En la lernejoj de la Estona SSR oni instruas la rusan kaj ankoraŭ unu fremdan lingvon – la anglan, germanan aŭ francan. La rusan lingvon nun oni instruas ekde la dua klaso, la duan fremdan lingvon ekde la kvina klaso. Krom tio oni instruas en kelkaj lernejoj fakultative ankaŭ Esperanton. Por la rusa kaj aliaj fremdaj lingvoj estas kreita plena komplekso de instru-metodika literaturo kaj aliaj lerniloj, ekzistas multaj instruistoj. Por Esperanto preskaŭ mankas instruistoj. Aperis lernolibro por kursoj kaj mem lernantoj, kiun oni uzis ankaŭ en lernejaj klasoj kaj studrondoj. Pro elĉerpiĝo de tiu lernolibro nun estas preparata ĝia nova eldono, pli adaptita por uzado ankaŭ en lernejoj. Por Esperanto-instruistoj ni organizis kaj organizos somerajn kursojn, kiuj tamen estas ne plene kontentiga solvo de la instruista problemo.

Jam ĝis nun niaj instruistoj kaj gelernantoj estis oftaj partoprenantoj de someraj esperantistaj tendaroj. Tiuj tendaroj havis la ĉefan taskon ebligi praktikan uzadon de Esperanto al gelernantoj kaj gejunuloj el diversaj sovetaj respublikoj.

Ni esperas, ke estonte ni sukcesos krei kunlaboron ĉikoncerne inter gelernantoj kaj junaj esperantistoj de nia respubliko kaj tiuj de aliaj socialismaj landoj.

*Ĉu Vi trovas, ke la instruado de Esperanto povas signife kontribui al la edukado pri internaciismo?*

Sendube la instruado kaj disvastigado de Esperanto kunhelpas al pli bona interkompreniĝo de la popoloj, al plivastiĝo de interkomunikado de diverslandaj gejunuloj, al ilia edukado en la spirito de internaciismo, en la spirito de kompreno kaj estimo de alinaciaj kulturoj. Mi konsideras tre grava la plifortigon de kontaktoj inter la laboristaj gejunuloj de diversaj landoj.

*Kiom influos la fondiĝo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj la divastiĝon de Esperanto en la Estona Soveta Socialisma Respubliko?*

La kreiĝo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj estas ankoraŭ freŝa fakto. Estas frue paroli pri ties rezultoj. Mi opinias, ke ekzisto de tut-Sovetia centro ne nur ebligas pli viglan kaj rezultoplenan agadon, sed ankaŭ instigas kaj devigas al pli bona laboro.

*La hungara kaj estona popolo delonge konsideras parencoj unu la alian. Dank' al tio kulturaj interŝanĝoj inter ni estas viglaj. Ĉu Vi vidas eblon de kunlaborado inter Hungario kaj la Estona SSR sur la kampo de la instuado ĝenerale, kaj speciale koncerne la instruadon de Esperanto?*

Mi antaŭvidas vastajn perspektivojn por kunlaboro inter hungaraj kaj estonaj esperantistoj. Inter niaj lernejanoj jam longan tempon ekzistas kontaktoj, interŝanĝo de laborbrigadoj kaj junpioniraj grupoj. Se ni aldonos al tio ankaŭ Esperanton kiel rimedon de interkomunikado kaj reciproka komprenado, do niaj kontaktoj plioftiĝos. Eble troviĝos kunlabora maniero ankaŭ por komuna edukado de Esperanto-instruistoj kaj eldono de instruliteraturo.

Sur ambaŭ kampoj ja Hungario jam havas elstarajn spertojn kaj rezultojn.

Mi deziras bonan sukceson al niaj hungaraj amikoj kaj al nia laŭebla kunlaboro!

*Kamarado Ministro, dankon pro la intervjuo.*

*Vilmos Benczik*

[x] *Nume Ruus (1911–1942) agadis ankaŭ kiel Cseh-instruisto en Skandinaviaj landoj. Estis murdita far germanaj faŝistoj.*

# Granda paseo, brilega futuro

## Fondiĝis Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

**Sovetaj esperantistoj regule partoprenas la demonstraciojn de la 7-a de novembro. (Foto: L. Zimels)**

**En la Baltaj respublikoj de Sovetio floras aparte riĉa esperantista kulturvivo. Sur la foto aperas tri internacie konataj poetinoj: Elvira Lippe (Latvio), Hilda Dresen (Estonio) kaj Ludmila Jevsejeva (Latvio).**

La 14-an de marto 1979 en Moskvo fondiĝis nova Sovetia socia organizo: Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Pri tiu evento oni legis en suplemento de *Moscow News* kaj poste ankaŭ la gazetaro de la Esperanto-movado informis pri tio.

Formiĝis organizaĵo de la Internacia Lingvo en la unua kaj la plej granda socialisma lando. Tio estas fakto, kiun oni ne povas preteratenti, kies signifo estas nesupertaksebla.

Legante la sciigojn pri la Fonda Konferenco, kiun „ĉeestis 101 delegitoj kun voĉdona rajto", oni pensas ĝuste pri la signifo kaj perspektivoj de tiu evento.

Iasence tio okazis en la naskiĝlando de nia lingvo, ĉar la Unua Libro en 1887 aperis en Varsovio, kiu tiutempe apartenis al la Rusa Imperio. La unua eldono de tiu malgranda, tamen grandsignifa broŝuro aperis ruslingve . . . La pioniroj de la lingvo estis poloj kaj rusoj: apud Grabowski kaj Bein agadis Devjatnin kaj Kofman . . . Ne hazarde la Internacia Lingvo havas profundajn radikojn en Soveta Unio. Kaj kiu nur iom konas la historion de nia movado, scias, ke la plej glora periodo de Esperanto en tiu lando estis la unuaj jardekoj post la Oktobra Revolucio. Grandaj amasoj de laboristoj lernis tiam la lingvon de Zamenhof por disvastigi la ideojn de nova, naskiĝanta mondo. En Soveta Unio aperis ankaŭ la unuaj poŝtmarkoj en Esperanto. Ankaŭ tiu periodo havas grandajn nomojn de nia movado el tiu lando, kiel ekzemple E. Drezen, E. Miĥalski, N. Hohlov . . .

Sed venis la milito, poste la granda rekonstruado. En tiuj malfacilaj periodoj la evoluo de la Sovetia Esperanto-movado iom malrapidiĝis. Tamen ĝi neniam tute ĉesis. Ankaŭ nun aktive laboras veteranoj, kiel Semjon Podkaminer aŭ Stepan Titov, patro de la dua kosmonaŭto de la mondo. La unua partoprenis, la dua salutis la konferencon pri fondiĝo de ASE.

Oni do povas diri, ke la movado en Soveta Unio vivis, vivas, vivos. En multaj kulturdomoj, kluboj funkcias Esperantaj rondoj, pri kies ekzisto povas sciiĝi ĉiu esperantisto, leganta la rubrikojn „Korespondi deziras" en la Esperanta gazetaro. En diversaj anguloj de Soveta Unio de tempo al tempo okazadas Esperantaj Tendaroj, la Radio de Moskvo emisiis Esperantlingve, Moscow News havis jam kelkajn Esperantlingvajn suplementojn, en unu el ili aperis la tuta teksto de la nova Konstitucio de USSR. Oni povus paroli pri diversaj Esperantlingvaj eldonaĵoj en Soveta Unio, sed mi prefere memorigus pri la Varna UK, kiun partoprenis grandnombra Sovetia delegitaro. Ĉio ĉi atestas pri vigla movada vivo en la sesono de la Terglobo. Pro tio multo ŝuldiĝas al tiaj personecoj, kiel la forpasinta Evgenij Bokarev, unu el la plej famaj interlingvistoj de la mondo, kaj Mahomet Isajev, prezidanto de ASE, kiu daŭrigas lian aferon.

La Sovetian movadon ĝis nun organizis la Komisiono pri Eskterlandaj Rilatoj de Sovetiaj Esperantistoj, funkciinta depost 1962. Tiu organiza laboro nun aliris novan ŝtupon de la evoluo, kaj certe antaŭenpuŝos la aferon de Esperanto kaj en Soveta Unio kaj en la tuta mondo.

Ni deziras al niaj Sovetiaj gekolegoj „aktive partopreni laboron de la Asocio, kiu devas esti farata sub signo de firmigo de la internacia solidareco de laboruloj en lukto por paco, amikeco, libero, egaleco, frateco kaj feliĉo de ĉiuj popoloj" – kiel staras en a Decido de ilia Fonda Konferenco.

P.A.R.

# Tridek jaroj da kunlaboro

## Jubileo de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo



**Baldaŭ ekfunkcios la atomcentralo en la ĉedanuba urbo Paks**

En la dudeka jarcento, kaj precipe post la dua mondmilito plene evidentiĝis, ke modernaj teknologioj aplikeblas nur se la produktado atingas certajn dimensiojn: por ne postresti en la ekonomia evoluo, malgrandaj landoj devis plene rezigni pri aŭtarkiaj iluzioj. Tiu rekono naskis multajn ekonomiajn unuiĝojn.

Al la kreo de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo kontribuis ankaŭ fakto pure politika: en 1949 disvolviĝis la malvarma milito, kaj la industrie evoluintaj kapitalismaj ŝtatoj rifuzis vendi multajn necesegajn produktaĵojn al la socialismaj landoj, deklarante tiujn varojn „strategiaj". Sovetio kaj la orient-eŭropaj socialismaj landoj devis do maksimume eluzi la avantaĝojn de ekonomia kunlaborado inter si.

En januaro 1949 ses landoj – Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetio – fondis la Konsilantaron de Ekonomia Interhelpo (KEI), kun la celo akceli en tiuj landoj la laŭplanan evoluigon de la ekonomio kaj levi la teknikan nivelon de la produktado. En la sama jaro aliĝis al la Konsilantaro ankaŭ Albanio, sed depost 1961 ĝi ne partoprenas en la komuna laboro. Post la aliĝo de GDR en 1950, Mongolio en 1962, Kubo en 1972 kaj Vjetnamio en 1978, la nombro de la ŝtatoj-membroj sumas dek.

La statuto de la Konsilantaro maksimume respektas la suverenecon de la partoprenantaj landoj. Ĝi ne trudas *decidojn* al ili, sed formulas nur *rekomendojn*, kiuj fariĝas devigaj eĉ por la subskribintaj landoj nur post aprobo fare de la propra registaro.

### Komenca periodo

Inter 1949 kaj 1955 la kunlaborado de la partoprenantaj landoj estis relative modesta; ĝi konsistis ĉefe el la plivastigo de la komercaj interŝanĝoj. En tiuj jaroj la ekonomion de la orient-eŭropaj landoj karakterizis la deziro evoluigi senescepte ĉiujn branĉojn de la industrio. Tiu strebado ne povis sukcesi, kaj la diserigo de la rimedoj multe bremsis la teknikan evoluon. Okazis multaj paralelaj evoluigoj, kaj tio ne nur forglutis monon superflue, sed – pro la fakto, ke en ĉiuj socialismaj landoj produktiĝis pli-malpli la samaj varoj – limigis ankaŭ la eblojn de komerco.

La komenco de la kunlaboro en la produktado datiĝas je la jaroj 1955–1957. En tiu periodo oni faris paŝojn por kunagordigo de la ekonomiaj planoj de la opaj landoj. En 1956 estis kreitaj la tn. fakaj komisionoj, kaj kreiĝis interkonsento koncerne specialiĝon de la partoprenantaj landoj pri diversaj branĉoj de la maŝinproduktado. Tiujn jarojn oni rigardas dua etapo en la evoluo de KEI.

En la sesdekaj jaroj – en la tria etapo de la evoluo – la kunagordigo de la naciaj ekonomiaj planoj okazis jam dum la preparado de la planoj mem, ne post ties akceptiĝo en la parlamentoj. Tio ebligis pli striktan kaj pli efikan kunlaboron.

### Kompleksa Programo

En la jaro 1969 komenciĝis la konceptado de la Kompleksa Programo de KEI. Tiu dokumento skizas la taskojn, kiuj staras antaŭ la socialisma ekonomia komunumo dum la sekvaj 15–20 jaroj. La Kompleksa Programo donas gravan atenton ankaŭ al la



**Tiel aspektos parto de la akvonodo-sistemo Gabĉikovo-Nagymaros, konstruata en hungara-ĉeĥoslovakia kunlaboro.**



**Granda cementfabriko en Bélapátfalva. Ĝi produktas jare unu milionon da tunoj da cemento.**

proksimigo de la evolunivelo de la partoprenantaj landoj. Rezulte de tiu principo ricevis kaj ricevas gravan helpon de KEI ĉefe Mongolio, Kubo kaj Vjetnamio.

La plej granda utileco de la Kompleksa Programo kuŝas en tio, ke ĝi prezentas bazon por plua raciigo de la produkta kunlaborado, kaj por la kompleksa konsiderado de la rimedoj kaj bezonoj de la opaj landoj. Surbaze de tiu Programo kreiĝis la komuna vagon-utiligado (por malpliigi veturadon de malplenaj vagonoj), la kunligo de elektraj sistemoj de pluraj landoj, ktp.

## Atingoj

La ĝisnunaj gravaj atingoj de la landoj, partoprenantaj en KEI, ŝuldiĝas ĉefe al du kialoj. La unua tia kialo estas la tute novspecaj principoj de kunlaborado. Kion tio signifas? Interalie ankaŭ senpagan transdonadon de teknikaj dokumentaroj al aliaj landoj. (Sovetio dum la lastaj tridek jaroj transdonis al la ceteraj landoj preskaŭ 50 000 tiajn dokumentarojn, dum ĝi mem ricevis ĉ. 25 000.) La dua kialo estas la sekura krudmateriala bazo, kiun Sovetio – havanta senescepte *ĉiujn* signifajn krudmaterialojn – certigas por la ekonomio de la KEI-landoj.

Bone ilustras la atingojn la sekvaj ciferoj: en la jaro 1950 la KEI-landoj donis 17,8% de la tutmonda industria produktado, en 1972 33%, en la nuna jaro ĉ. 37%. (La loĝantaro de la KEI landoj estas ĉ. 10% de la monda loĝantaro.)

## Hungara partopreno

Kvankam la partopreno en la opaj programoj ne estas deviga por ĉiuj landoj, Hungario partoprenas en relative multaj komunaj programoj. Gravaj estas ankaŭ specialaj kunlaboroj inter difinitaj landoj (vd. pri tio artikolon en 1978/2, p. 53), el kiuj staru ĉi tie la *kontrakto alumino-aluminio,* subskribita kun Sovetio.

Hungario havas relative multan baŭksiton, el kiu oni faras aluminon en la lando mem. Sed por produkti unu tunon da aluminio el alumino, necesas 16 000 kWh da elektra energio. Lando malriĉa je energio, kiel Hungario, ne povas tion fari. La alumino do ekvojaĝas al Siberio, kie pere de siaj grandaj akvocentraloj Sovetio havas malmultekostan energion. Tie la hungara alumino transformiĝas je aluminio, kaj ĝi revojaĝas al Hungario.

La tiamaniere gajnita alumino kostas je 16–18% malpli, ol se ĝi estus produktita en Hungario. Tio estas nia gajno. Sovetio siaflanke ankaŭ gajnas: ni pagas la energiokostojn laŭ la aktuala mondmerkata prezo, kvankam la efektivaj produktokostoj de la Siberiaj akvocentraloj estas malpli altaj.

## Jubilea konferenco

La jubilea 33-a konferenco de KEI, kiu ĉi-somere kunsidis en Moskvo, povis fari bilancon ne malbonan. La Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo fariĝis unu el la plej gravaj ekonomiaj unuiĝoj de la mondo, ĝia reputacio estas senduba. Pruvas tiun fakton, ke pluraj landoj – Jugoslavio, Finnlando ktp. – kunlaboras en pluraj programoj de KEI, kaj aliaj landoj (Angolo, Etiopio ktp.) montras profundan intereson pri la sukcese funkcianta socialisma ekonomia unuiĝo.

Ĉar KEI estas organizaĵo, kiu strebas ĉiam plej rapide adaptiĝi al la cirkonstancoj de la monda ekonomio, en la fokuso de la ĉijara konferenco staris la energio-problemo. Ĉar estas tute evidente, ke nafto ne sufiĉas pro kontentigi la energio-malsaton de la dinamike progresantaj KEI-landoj, estis necese fari pluan paŝon. Oni akceptis planon pri maksimuma utiligo de aliaj energio-fontoj (karbo, ktp.), kaj pritraktis ankaŭ konstruadon de novaj atomcentraloj. Estis farita eĉ interkonsento pri disdivido de ĉi-koncernaj taskoj inter ĉ. 50 entreprenoj de ĉiuj Eŭropaj KEI-landoj kaj Jugoslavio. La plenumo de tiu plano certigos la kontentigon de la pliiĝanta energio-bezono de la industrio kaj de la loĝantaro, sen signifa kresko de la foruzo de nafto. En la nuna momento la energio-produktado de atomcentraloj en la Eŭropaj KEI-landoj estas 3 milionoj da kilovatoj. Tiu cifero dum la sekvaj 11 jaroj kreskos ĝis 37 milionoj da kilovatoj, kaj tio ebligos ŝpari 75 milionojn da tunoj da nafto.

Neniu kontestas ke la landoj, partoprenantaj en la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo, dum la lastaj tri jardekoj travivis ekonomian progreson kometan, tamen esence harmonian. Malgraŭ la trapasita longa vojo, la ebloj de plua elana evoluo ne elĉerpiĝis, kaj la socialisma ekonomia komunumo povas sentime alfronti la estonton.

# ISTVÁN ÖRKÉNY

# 1912–1979



Tian verkiston ni perdis en ĉi-jara junio, kiu kreis tute novan ĝenron: la *unuminutan novelon.*[1] Unikaĵo en la mondliteraturo. Ne nur lia subita, korpremiga morto kuraĝigas eldiri tion. Li mem firme sciis, ke lia verko estas unikaĵo, ĉar li mem konscie volis renovigi la literaturan verkmanieron. Ne pro vanteco aŭ sensaciavido, sed pro nepra bezono, instigite de la verkista konscienco. Eĉ tiu konscienco ne estis nur proprapersona: lin delegis al la hungara literaturo la komuna konscienco de sia generacio.

67 jaroj estis mezuritaj por li, kaj duonvoje – la terura mondbruliĝo, la sangopluvo, la 2-a mondmilito. Faŝismo, malamo, holokaŭsto, homaj fiaĵoj, militkaptiteco. Ne eblas kompreni la arton de Örkény, nesciante, kiom efikis al li la milito, kiom ĝi difinis lian postan verkistan sorton. Parizon-amanta, ŝercema, sprita bohemulo, enmiksiĝanta nevole en la sangopluvon. „Steĉjo en la sangopluvo" – jen titolo de lia dramo, kiu furoras en la nuntempaj teatroj. Ĉar la travivaĵo de l' milito forrabis de li la trankvilon, la ekvilibron. Kaj tiun ekvilibron li rekreis en siaj verkoj – ne la ekvilibron de la mondo, sed tiun de la arto esprimanta la mondon.

La mondo estas absurda, groteska – pri tio temas la unuminutaj noveloj kaj ĉiuj liaj verkoj. Jen la speciala Örkény-vidmaniero: li rigardas la inversan flankon de ĉio, kun kapo malsupren. Kvazaŭ oni kliniĝas kaj rigardas malantaŭen inter la du disigitaj kruroj. Kaj oni konstatas, ke la mondo en tiu pozicio montriĝas absurda. La sama mondo, tamen la tuto groteske. Ne la arto, sed la mondo estas groteska. Jen grava leciono de la Örkény-verkaro.

Örkény estas tute originala realisma verkisto, kiu interpretis la nuntempan hungaran realecon. Ties radikojn li serĉis kaj trovis en la historio. Tiuj radikoj rezultiĝis absurdaj, kaj Örkény tre simple kaj klare komunikas al ni la fakton. Ĉar la implikiĝantajn kontraŭdirojn de nia epoko eblas eldiri nur tre kompreneble, kaj – laŭ la Örkény-metodo – rigardante, taksante ilin el la inverso de la realeco.

Novaj enhavoj en novaj formoj – jen Örkény. Li kreis novan artospecon, sed li divenis ankaŭ la miksiĝon, interligon de la diversaj ĝenroj: novelo, rakonto, dramo, scenarlibreto por filmo. Örkény estis saĝa, ĉar li sciis priridi ankaŭ la tragediojn: la ŝerco estas serioza afero. Tia estis la ludema saĝeco de Örkény, manifestiĝanta kondensite en la famegaj unuminutaj noveloj.

Aŭ ni menciu lian brilan, timigan romanon, la „Ekspozicio de rozoj", en kiu li ludas kun la morto. Serioze, home. Per diversaj personaj sortoj li prezentas, kiel mortas la homoj, kaj kiel ili devus morti. Örkény kuraĝis alfronti ĉion, kio apartenas al la homa vivo. Kaj tia estas ankaŭ la morto, vane ni bataladas kontraŭ ĝi. Kion ne eblas prinei, tion do ni esploru kaj ekkonu.

Tiom sentime li alfrontis ĉion, eĉ siajn proprajn erarojn. Ĉiam li aŭskultis la kritikojn, ĉar ankaŭ li ĉiam kritikis, helpeme. Li sciis, ke post li sekvas nova generacio, kaj atentis, kien kondukas la vojo de tiu posteularo. Kaj dume li laboris, laboradis, senĉese: en la mortlito li metis punkton post sia plej lasta verko, la „Scenarlibreto" – kelkajn tagojn antaŭ la fino.

Kion diri pri István Örkény? Ke lia unua verko estis sociografia, travivaĵo fontanta el la milito: la „Loĝantoj de koncentrejoj"? Ke liaj du famaj dramoj – „Katinludo" kaj „Familio Tót" – daŭre aperas en la scenejoj de la mondo? Ke lian nomon ĉie konas la kulturitaj, literaturamaj homoj, ke tiel li rekonsciigis la mondon pri la ekzisto de Hungario, de eta mez-eŭropa popolo, kies homaj kaj sociaj problemoj estas samtempe hungaraj, mez-eŭropaj kaj universalaj? Ke li estis trifoje honorigita: per la ŝtata Kossuth-premio kaj dufoje per la literatura premio „Attila József"?

Iam, en sia junaĝo, li prepariĝis por profesio de kemia inĝeniero. Sed li fariĝis verkisto. Ne estis li, kiu decidis pri tio. Tiel okazis, ĉar por li ne ekzistis alia vojo. Je bonŝanco de ni ĉiuj.

Zsuzsa *Varga-Haszonits*

[1] Nia revuo publikigis liajn verkojn en la n-roj 1/1969, 1/1971, 2/1974, 2/1975.

István Örkény

# Unuminutaj noveloj

## Ĉiam restas espero

– Kripto ĉiel kostas ne malmulte – informis la oficisto. Precipe apud la ĉefa vojo.

– Ne nepre necesas, ke ĝi estu apud la ĉefa vojo – diris la informpetanto. – Gravas nur, ke ĝi estu betonita.

– Betonita? – konsterniĝis la oficisto. – Tio estas nekutima, sinjoro. Tamen eblas.

Li metis flanken la tajpitan prezliston. Sur notpapero li faris rapidan kalkulon; la prezo de betonita kripto estis sufiĉe pipra eĉ apud malĉefa vojo kaj sen tombŝtono. Sed la informpetanto deklaris, ke tio ne gravas.

Li maĉadis siajn ungojn. Pripensis.

– Krome – li diris – necesus por ĝi ankaŭ tubo.

– Kia tubo? – demandis la nigre vestita oficisto.

– Eĉ mi ne scias precize. Io tia, kiel kameno. Kamentubo. Kiaj troviĝas sur ŝipoj. Aŭ en vinkeloj.

La inĝeniero, kiun alvokis la oficisto, havis iom malviglan menson. Dufoje li petis klarigi ĉion, sed eĉ post tio li nur balancis la kapon.

– Ĉu mi povas demandi – li demandis – el kio estu farita la tubo?

– Tion devus scii vi mem – diris la informpetanto, iom perdante sian paciencon.

– Ĉu taŭgas el ardezo? – demandis la inĝeniero. – Aŭ ni faru ĝin el brikoj? Aŭ simple el iu metalo?

– Kion vi rekomendas? – demandis la informpetanto.

– Mi komprenas nenion el la tuta afero – diris la inĝeniero. – Sed la plej evidenta solvo estus ardezo.

– Do estu el ardezo – diris la informpetanto kaj senpense rigardis la malinteligentan inĝenieron. – Krome – li diris poste – necesus instali en ĝi elektron.

– Elektron? – gapis al li ambaŭ. – Kial instali elektron en kripto?

– Kia demando! – diris iom incitite la informpetanto. – Por ke ne estu en ĝi malhelo.

*El la hungara: V. Benczik*

## Eĉ niaj plej belaj revoj estas realigeblaj

– Kara Feri, tiu tria hundo tiras neniom.

– Bedaŭrinde, mia vipo estas mallonga.

– Eĉ, al mi ŝajnas, ke ĝi lamas iomete.

– Kompreneble, ja ĝi havas nur tri krurojn.

– Vere . . . Ĉu ne estas domaĝe jungi kriplan beston?

– Rigardu ilin pli bone, Ilonka. Ĉiuj miaj dek du hundoj havas nur tri krurojn.

– Ho ve, povraj bestoj!

– Prefere min kompatu, Ilonka! Mi vizitis vice ĉiujn hundkaptistojn, ĝis mi sukcesis kolekti dek du trikrurajn hundojn.

– Eble mi ne kompetentas pri tio, sed oni supozus, ke normala hundo tiras pli bone kaj pli persiste.

– Mi ne kontestas tion. Sed mi estas ĝisosta urbano. Kion mi farus per dek du kvarkruraj hundoj?

– Ĉu vi timas ilin, Feri?

– Mi timas eĉ kulpikon. Al la fortoj de la naturo oni devas rilati singarde. Ni supozu, ke tiuj hundoj havas kvar krurojn. Ni supozu, ke pro io ili freneziĝos. Ni supozu, ke ili ŝiros la bridon el miaj manoj . . . Pli bone eĉ ne pensi pri tio, Ilonka!

– Tamen mi ne komprenas. Se vi timas hundojn, kial vi jungas ilin antaŭ vian aŭton?

– Ĉar mi ŝoforas malbone.

– Tion oni povas ellerni.

– Iome-duone, Ilonka . . . Homo kaj aŭto ne estas samrangaj partioj.

– Ĉirkaŭrigardu! Oni vidas eĉ ne unu per-hunde funkciantan aŭton!

– Domaĝe! Kvankam la homo, bedaŭrinde, ne plu povas egali la teknikon. Li uzas ĝin, sed fakte timegas ĝin.

– Mi ne timas la aŭton.

– Sed ĉi tiu Simca povas trapasi cent kvindek kilometrojn dum horo . . .

– Ne dolorigu mian koron, Feri . . . Mi amas la rapidecon!

– Vi estas iom tro pretendema. Ni ekveturis el Budapeŝto antaŭ dek tagoj, kaj jen, ni jam atingis la urbon Siófok.

– Per dek du hundoj tio ne estas tre granda plenumo.

– Vere ne. Sed mi suprentiris la manbremson jam en Budapeŝto.

– Ĉu vi ne estas iom tro singardema?

– Ĝuste tiu ĉi estas la veturritmo, por kiu ni estas kreitaj.

– Ĉu vi vidas, kiom da homoj? Kaj nin gapas ĉiuj.

– Ili envias nin.

– Iliaj okuloj rigide fiksiĝas al ni.

– Ĉar ili vidas, ke eĉ niaj plej belaj revoj estas realigeblaj.

*El la hungara: V. Benczik*

## Do, ĉu tio neniam finiĝos?

Ie en malgranda kampodomo de la Granda Hungara Ebenaĵo loĝis kvarmembra familio: patro, patrino kaj du infanoj, ĉiuj ŝatis pogaĉon*. Kiam panjo havis tempon kaj ŝi volis kaŭzi ĝojon al la familianoj, ŝi bakis por ili grandan bakpleton da pogaĉoj.

Foje ŝi knedis, anstataŭ farunon, insektvenenon en la paston. La pogaĉoj ne iĝis malpli bongustaj, do la familianoj funde satmanĝis el ili, kaj ĝis vespero ĉiuj kvar mortis, la patro, la patrino kaj la infanoj.

La kvaran tagon oni enterigis ilin, poste kunvenis la parencaro kaj la proksimaj kaj foraj najbaroj, kiel decas, al funebra bankedo. Ili kunportis ruĝan vinon kaj dum la trinkado, ili bonguste manĝetis la restintajn pogaĉojn. Ili ĉiuj diris adiaŭon al la surtera mondo.

La ambulancanoj – la kuracisto, la du brankardistoj kaj la ŝoforo – jam ne havis multe da farendaĵo. Nur kapbalance ili ĉirkaŭiris la multajn kadavrojn kaj antaŭ la ekiro, ili manĝis kelkajn pogaĉojn kaj trinkis iom da vino.

Escepte la ŝoforon. Li ne povis trinki vinon, ĉar li devis konduki la aŭton kaj li ne ŝatis la pogaĉon. Do, enpakinte en gazetpaperon tion, kio troviĝis ankoraŭ en la bakpleto, li metis ilin en la aŭto apud sidlokon por ke ili ne perdiĝu. Li pensis, ke ili bone gustos ankoraŭ al iuj.

Kaj nun li kunportas ilin.

*El la hungara: D-ro I. Nagy*

Pogaĉo: ronda, platbaza, kompakta kuketo, bakita ordinare el butera farunaĵo.



# LUCERNA MOZAIKO

Laŭ la *Kongresa Kuriero* (redaktita de Thomas *Bormann*) aliĝis al la 64-a Universala Kongreso de Esperanto entute 1635 personoj (inter ili ĉ. 50 hungaroj) el 49 landoj. La Kongreso vekis grandan eĥon en la gazetaro, kaj okazis ankaŭ pluraj radiointervjuoj.

* * *

Disvolviĝis vigla diskuto pri la kongresa temo: *La lingva aspekto de la internacia organiziĝo.* La diskutantoj devis noti, ke Esperanto ĝis nun ne sukcesis aplikiĝi eĉ nur iomete vaste en la internaciaj organizaĵoj, kiuj ĉiuj aplikas ĉu unu nacian lingvon, diskriminaciante ne-parolantojn de tiuj lingvoj, ĉu plurajn naciajn lingvojn, bremsante tiel la efikecon de sia laboro. La Kongresa Rezolucio atentigas, ke tiuj esence elitismaj solvoj de la lingva problemo ne povas kontentigi la bezonojn de la vastiĝantaj internaciaj rilatoj.

* * *

Enkadre de la Internacia Somera Universitato okazis 11 prelegoj pri temoj tre variaj sub rektorado de magistro Claude *Piron.* Plurajn prelegojn sekvis vigla diskuto, kiel ektemple tiun de Magomet *Isaev* pri *Nacilingvaj problemoj en la multnacia Sovetunio, kaj Esperanto.* Prelegis ankaŭ du hungaroj: Flóra *Szabó-Felső* pri *Jura traktado de infanoj naskitaj ekster geedzeco* kaj Vilmos *Benczik* pri *Rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de la orient-europaj nacioj.*

* * *

*Internacia Konferenco pri Esperantologio* estis unu el la plej sukcesaj programeroj de la 63-a UK en Varno. Nun tiu konferenco estis ripetita: la aŭskultantoj povis aŭdi prelegojn de Marinko *Ĝivoje,* Claude *Gacond,* Francois *Lo Jacomo* kaj Detlev *Blanke.*

La 64-a UK havis ankaŭ ŝatindan kulturan programon. La ĉi-jara kongresa teatraĵo estis *Amo* de Paul *Géraldy,* kaj multaj kongresanoj dubis pri la ĝusteco de tiu elekto. Krome ankaŭ la geaktoroj (ludis kelkaj membroj de Bulgara Esperanto-Teatro) postrestis al sia kutima nivelo.

Aliaj kulturaĵoj estis pli allogaj, kiel ekzempe la prezentaĵo de Jadwiga *Gibczynska,* aŭ la programoj de la kantistinoj Bozena *Zborowska* kaj Galja *Kostova-Toteva.* Estis sukcesaj ankaŭ la bulgaraj kantistoj

Veselin *Damjanov* kaj Prodan *Prodanov.* Ricevis multan aplaŭdon la populara svisa kantisto Olivier *Tzaut.*

* * *

La kulturajn aspektojn de la Kongreso emfazis ankaŭ la riĉa oferto de la Libroservo: oni povis elekti el proksimume 500 titoloj. Inter la plej venditaj titoloj troviĝis *La nobla korano,* la bildrakonto *Asteriks, la Gaŭlo, Praktika Bildvortaro de Esperanto* kaj *Baza Literatura Krestomatio.* Ĉi lastan verkon eldonis Hungara Esperanto-Asocio, kiu alportis al la Kongreso dekon da novaj verkoj en la Internacia Lingvo. La enspezoj de la Libroservo montras, ke multaj kongresanoj ne povis kontraŭstari la tenton kaj elspezis konsiderindan sumon por libroj. Oni nur bedaŭras, ke la oferto ne povis esti la sama en Varno, kie partoprenis trioble pli da esperantistoj.

* * *



Laŭ teknika vidpunkto la Kongreso estis bone organizita, nur la granda salono ne povis kontentige akcepti ĉiujn kongresanojn. Pri loĝado kaj manĝoj oni ne povis plendi, krom, kompreneble, pri la prezoj. (Tiujn eĉ usonanoj trovis altaj.) Kontribuis al la bona atmosfero ankaŭ la tre bona vetero, kiun nur antaŭtagmeze de la ekskursa tago interrompis pluvo, nebulo kaj malvarmo. LKK-anoj kaj helpantoj estis ĉiam helpemaj kaj ĝentilaj, kaj ili ĉiuj bone parolis Esperanton. Certe la ĉeestintaj esperantistoj veturis hejmen kun la sento, ke ili travivis agrablan kaj sukcesan kongreson.

* * *

La diversaj organoj de UEA (Komitato, Estraro, Komisionoj) plenumis streĉan laboron dum la kongresa semajno. En la komitatkunsidoj la plej granda atento estis dediĉita al statutaj temoj, la komisionoj klopodis ĝisfunde pritrakti la aktualajn problemojn de sia kampo. Estas atentinde, ke oni strebis unuavice ne por fari rezoluciojn, sed preferis interŝanĝi praktikajn spertojn, kio pli efike povas kontribui al la pliboniĝo de la konkreta agado.

*(-czik)*

# Mi fariĝis pornografiisto

Ĝis nun mi sciis min persono almenaŭ meze deca, sed alveninta leterkopio ŝancelis tiun mian kredon . . .

Dum la Lucerna UK mi gvidis progresigan kurson, en kiu kun kvardeko da kursanoj ni analizis literaturajn tekstojn, interalie la poemon *Anna* de William *Auld* kaj la novelon *Banu vin, mia bela!* de Reto *Rossetti.* Kiel kurslibro servis la ĵus aperinta *Baza Literatura Krestomatio.* La temoj ŝajnis plaĉi al la kursanoj, kion mi konkludas el tio, ke eĉ la trian lecionon ili partoprenis en deca nombro. Do, mi forlasis la kongresurbon kontenta . . .

Sed malpli kontenta estis almenaŭ unu kursano, nome s-ro R. M., franca emerita profesoro. Eĉ, la malkontento tiom bolis en li, ke alveninte hejmen, li prenis plumon kaj sendis la suban plendan leteron al la Komisiono pri Statuto (!?) de Universala Esperanto-Asocio:

*Sinjoroj,*

*Mi, kun granda intereso, ĉeestis la 64-an UK en Lucerno.*

*Sed mi devas atentigi UEA pri maltaŭgeco de la Progresiga Kurso, kiun gvidis Vilmos Benczik. Unue mi devis aĉeti lian libron* Baza Literatura Krestomatio, *kiu estas ne sole tre malsupera al la libro* Paŝoj al plena posedo, *sed precipe entenas pornografiajn tekstojn. Vidu kaj legu ekzemple tiujn ĉi ŝiritajn paĝojn, kiujn mi ne volas montri al miaj infanoj!*

*Due, la Progresiga Kurso de Vilmos Benczik konsistis en analizo de precipe tiu maltaŭgeca poemo* Anna, *malsana kaj pornografia. Feliĉe, ke sole maljunuloj ĉeestis tiun fuŝan kurson.*

*Tiu sinteno kaj verkoj de Vilmos Benczik estas tre malutilaj por la disvastigo de Esperanto!*

*Kore salutas vin:*

*R. M.*

(Mi permesis al mi elsarki el la letero dekon da lingvaj eraroj.)

Mi ne povas nei, ke la vortoj de s-ro R. M. pensigis min. Tamen, mi ne sukcesis respondi ĉiujn demandojn, kiuj lanĉiĝis en mi, kaj decidis turni min al personoj pli sagacaj por respondo. Jen, la demandoj:

1. Ekde kiam la Komisiono pri Statuto de UEA kompetentas pri pornografio?
2. Ĉu s-ro R. M. scias, ke la aŭtoro de la lernolibro *Paŝoj al plena posedo* kaj de la poemo *Anna* estas la sama persono: *William Auld?*
3. Kiom da jaroj havas la infanoj de tiu *emerita* profesoro, ke la patro cenzuras iliajn legaĵojn per forŝirado de paĝoj?
4. Ĉu tiu ĉi artikoleto efikos bremse aŭ stimule al la vendado de Baza Literatura Krestomatio?

Inter la plej bonaj respondintoj de la supraj demandoj la aŭtoro lotumos kvin lukse enkadrigitajn kopiojn de la letero de s-ro R. M.

Vilmos *Benczik*

**Monata revuo de Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun Unesko).**

**La sola Esperanta periodaĵo, kies legantaro (en preskaŭ 90 landoj) nombriĝas kvincifere.**

**Ĝia nomo estas tiel ĝenerala, ĉionampleksa, ĝuste kiel ĝia enhavo: Ĝi raportas pri ĉio sciinda el la aktuala vivo de la Esperanto-movado.**

**La revuo eniris sian 73-an eldonjaron. Aferoj, kiuj ne valoras, ne vivas tiel longe.**

**Neniu alia Esperanta periodaĵo liveras al vi tiom da paĝoj jare (264 kun kovriloj) por tiel malalta abontarifo.**

**Abonprezo: 33,00 nederlandaj guldenoj. Perantoj en pli ol 30 landoj akceptas abonojn ankaŭ en la koncerna landa valuto.**

**Petu specimenon de vialanda peranto aŭ rekte de: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176., NL–3015 BJ Rotterdam, Nederlando:**

**Hungaroj povas aboni ĝin ce HEA kontraŭ 120 forintoj.**



La kafejo Pilvax estis kunvenejo de junaj opoziciuloj

# Ĉapitroj el la historio

## 12. Bataloj por la transformiĝo je burĝa ŝtato kaj por la sendependeco

Inaŭguro de la unua fervojlinio inter Pest kaj Vác, en 1846

Ferenc Kölcsey (1790–1838)



Lajos Kossuth (1802–1894)

Grafo István Széchenyi (1791–1860)



La unua Danuba vaporŝipo

La Napoleonaj militoj kreis konjunkturon por la hungara agrikulturo. Sed la posta malfavora ekonomia situacio pruvis, ke la hungara agrikulturo, baziĝanta sur la laboro de l'servutuloj, ne eltenas la merkatan konkuron. En la nacia asembleo, kunvokita post pli ol dekjara paŭzo, far la reĝo Francisko la 1-a, abrupte kaj decide eniris la publikan vivon grafo István Széchenyi (1791–1860). Széchenyi publicis en grandefikaj libroj siajn reformideojn, li ofertis dumjaran enspezon devenantan el siaj bienegoj por la fondo de Hungara Scienca Akademio, instigis la enkondukon de l' pervapora navigacio kaj la ekkonstruon de l'fervojoj, antaŭenigis la mineksploatadon, preparis la reguligon de l'riveroj Danubo kaj Tisza, atingis, ke la nacia asembleo aprobu la konstruon de l'unua fiksa ponto – la „Ĉenponto" – super Danubo, inter Pest kaj Buda, ktp.

Jam en la nacia asembleo de 1832–36, grafo Széchenyi prezentis – kune kun la poeto Ferenc Kölcsey, barono Miklós Wesselényi kaj Ferenc Deák – kompletan liberalan programon, kiu formulis la kontraŭregistaran opozicion. (Ferenc Deák en la dua duono de l'jarcento fariĝis gvidanto de la Hungaria politiko.)

Post la morto de Francisko la 1-a, Ferdinando la 5-a okupis la tronon (1835–1848); persono de ege malvastaj mensaj kapabloj. Tial kanceliero Metternich, en kies manoj koncentriĝis la potenco, per diversaj politikaj manipuladoj klopodis bridi la movadon de l'opozicio. Sekve, kelkaj politikaj gvidantoj estis malliberigitaj, inter ili Lajos Kossuth,[1] granda oratoro kaj ĵurnalisto (1802–1894).

Tamen, la politiko de fortaj manoj ne estis bonrezulta, kaj oni proklamis amnestion. Kiam Lajos Kossuth liberiĝis el la prizono, li fondis modernan tagĵurnalon, kaj pere de ĝi li altiris ĉiam pli vastajn tavolojn de la publika opinio por la afero de l' libera kaj burĝa Hungario. La Opozicia Partio – fondita en 1847 – en sia programdeklaro difinis kiel politikan platformon la liberigon de l'servutuloj, la disdividon de l' publikaj ŝarĝoj, la reprezantadon de l' popolo kaj la egalecon antaŭ la leĝo. Krom tio, la revolucia kaj demokratia movado nomata „Juna Hungario" ankaŭ prezentis siajn pretendojn: ĝi profetis la ideojn de l'franca revolucio. Inter la gvidantoj de ĉi tiu movado ni trovas la poeton Sándor Petőfi.

Printempe de 1848 – post Parizo – ankaŭ en Vieno eksplodis revolucio. La lasta kunsido de la Ordenoj, en urbo Pozsony[2], akceptis la proponon enhavantan pretendojn de la opozicio pri reformoj. La aprobitan dokumenton portis en Vienon delegitaro estrita de Lajos Kossuth.

Post la revoluciaj movadoj en Milano kaj Prago, ankaŭ en Pest eksplodis revolucio, la 15-an de marto 1848. La Viena Ŝtata Konsilantaro komisiis grafon Lajos Batthyány – la prezidanton de l' Opozicia Partio – pri formado de hungara registaro. La nacia asembleo sendiskute aprobis la leĝojn pri formado de respondeca kaj sendependa hungara registaro, pri elekto de popolaj deputitoj por la nacia asembleo, pri likvido de l' servuto kaj de la eklezia dismo, pri la pres- kaj penslibero.

Sed samtempe kun la liberiĝo el sub la feŭda jugo, plimulto de la kamparanoj restis sen bienoj; nome, nur 40%-oj de ili posedis sufiĉan plugteron por la vivteno, la aliaj 60%-oj estis agrokulturaj servistoj. La kamparanaj amasoj ribelis kaj la nova registaro devis subpremi ilian movadon. Inter la vicoj de la naciaj minoritatoj ankaŭ regis grava malkontento.

Kiam en la dua duono de 1848 tutan Eŭropon ekposedis la kontraŭrevolucio, la Viena kortego opiniis, ke alvenis la momento por entrudiĝi en la hungaran revolucion. Generalo Jellaŝiĉ, kroata guberniestro, la 11-an de septembro laŭ ordono de Vieno atakis Hungarion kun armeo de 45 mil

# de la hungara popolo

Sándor Petőfi (1823–1849)

Grafo Lajos Batthyány (1806–1849)

La unua nacia asembleo elektita laŭ sistemo de popola deputitaro, en Pest, la 5-an de julio 1848

homoj. En tiu danĝera situacio la gvidon de l' rezistado alprenis la Nacia Komisiono pri Defendo, elektita far la nacia asembleo kaj komandita de Lajos Kossuth.

La 29-an de septembro 1848, la rapide varbita armeo venkis tiun de Jellaŝiĉ.

Sekve de tio, Ferdinando la 5-a devis rezigni pri la trono, kiun okupis Francisko Jozefo la 1-a (1848–1916). Meze de decembro komenciĝis granda atako kontraŭ Hungario: la aŭstran armeon estris duko Windischgrätz. La imperiestra armeo estis pli forta ol la hungara. Generalo Artur Görgey, komandanto de la hungaraj trupoj ne komencis batali, sed li evakuis la ĉefurbon kaj tra la nordaj montaroj de Hungario li gvidis sian armeon al la supera regiono de la rivero Tisza, pere de aŭdaca militista manovro. Urbo Debrecen fariĝis la sidejo de la registaro kaj de la nacia asembleo.

La hungara armeo, reorganizita dum la vintraj monatoj kaj apogita de polaj, aŭstraj, italaj kaj alinacianaj volontuloj, printempe de l' sekva jaro komencis triumfan militiron kaj forpelis la imperiestrajn trupojn el la lando. Kiam pliboniĝis la milita situacio, Kossuth – kiun apogis la maldekstra flanko de la nacia asembleo – atingis, ke dum la kunsido de la 14-a de aprilo 1848, en la preĝejo de la Kalvinana Eklezio de urbo Debrecen, estu proklamita la sentronigo de la Habsburga dinastio kaj la sendependeco de Hungario. Oni elektis Kossuth prezidento de la lando. Sed tio ne solvis la ĉefajn problemojn de Hungario. La nacia asembleo, kies plimulton formis bienuloj, kontraŭstaris la plibonigon de l' vivcirkonstancoj de la senhavaj kamparanaj amasoj, rifuzante samtempe la pretendojn de l' naciaj minoritatoj.

Dume la Habsburga kortego konvinkis la kortegon de la rusa caro, ke la tempo konvenas por armita interveno en Hungario. La armeoj de l' imperiestro kaj tiuj de la caro, kune, estis en granda superforto; tiel, pere de akraj bataladoj, iliaj atakoj fleksis la rezistadon de la hungaroj. En batalo apud Segesvár[3] mortfalis ankaŭ Sándor Petőfi, servinta kiel adjutanto de l' pola generalo Jozefo Bem. La 9-an de aŭgusto 1849, la imperiestra armeo komandita de Haynau venkis en la lasta granda batalo, proksime de Temesvár.[4] Armeestro Artúr Görgey – al kiu Kossuth, post sia demisio kune kun la registaro, transdonis ĉiujn potencojn – la 13-an de aŭgusto kapitulacis ĉe urbo Világos[5] antaŭ la armeestro de la caro, duko Paskieviĉ. Kossuth kaj multaj gvidantoj de la liberbatalo elmigris, kaj en Hungario sekvis sanga teroro. Barono Haynau ekzekutigis en Arad 13 generalojn de l' hungara armeo; Lajos Batthyány, eksprezidanto de la ministraro, estis mortpafita en la ĉefurbo. La esceptjuĝaj tribunaloj sendis al malliberejo milojn da personoj, kaj dekmiloj da hungaraj soldatoj estis rekrutitaj pune en la armeon de l' imperiestro.

[1] Vd. en numero 1/1978.
[2] Nun Bratislava
[3] Nun Sighişoara en Rumanio
[4] Nun Timişoara en Rumanio
[5] Nun Siria en Rumanio

Kapitulaco ĉe Világos

# * Jarcentoj de la hungara literaturo *

István Torda

## 4. Literaturo de la klerismo

La unua konscie profana movado de la hungara literaturo estis la klerismo. En ĝia unua periodo ekde 1772 ĝis 1795 ĝia unueca programo estis strebado pri kulturado de la nacia lingvo, kvankam jam ĉe la fino de tiu ĉi periodo sub la influo de la granda burĝa revolucio franca kelkaj klerismaj tendencoj montris tendencon de politika radikaliĝo.

### Iniciatis gvardianoj . . .

La unua centro de la hungara klerismo estiĝis en Vieno inter elektite belaspektaj kaj belstaturaj nobeloj – korpogardistoj de la imperiestrino Maria Teresia. Inter ili servis *György Bessenyei* [Beŝenjei] (1747–1811), aŭtoro de tiu verko, kies apero estas konsiderata kiel komenco de la hungara klerismo. Temas pri *Tragedio de Agis* (1772). Bessenyei en siaj pamfletoj postulon pri lingvokulturigo ligas al disvastigo de moderna scienco. Li estis grandefika propagandisto de la klerismo, kaj siajn klasikismajn tragediojn li uzis kiel ilojn de tiu agado. En tiuj ĉi tragedioj li montris konflikton inter libervolo kaj despotismo. Rimedoj de la agitado por li estis ankaŭ liaj filozofiaj verkoj, en kiuj montriĝas animo materialismema. Bessenyei ekde 1782 loĝis en sia provinca bieno, en soleco ĉiam pliiĝanta, tie li verkadis, jam tute ne esperante

Hungara gvardiano en Viena trinkejo



**János Batsányi estis redaktoro de la unua hungarlingva revuo, titolita „Magyar Museum" (Hungara Muzeo)**

eldoni siajn verkojn. Lia granddimensia „ŝtatromano", *Vojaĝo de Tarimenes* dum 125 jaroj restis neeldonita.

La politikan lirikon de *János Batsányi* [Baĉanji] (1763–1845) inspiris grandaj historiaj eventoj de tiu epoko. En 1789 en epigramo *Pri la Franclandaj ŝanĝoj*, en 1792–1793 en odo, titolita *Vidanto* li antaŭdiris al la mondo alvenon de la libero. Li partoprenis ankaŭ la movadon de hungaraj jakobenoj, kies iniciatintoj estis grupeto de intelektuloj. La movado en 1794 estis rapide likvidita, parto de ĝiaj membroj estis ekzekutita. Batsányi mem ne tro longe restis en prizono. Lia vivo tamen fariĝis sensenca vojserĉado. Post la liberiĝo li aliĝis al Napoleono, enmarŝinta kun sia armeo en Aŭstrion. Poste li elmigris al Parizo, de kie li estis forportita al Aŭstrio fare de la triumfantaj aliancanoj. Unue li estis denove prizonigita, poste internigita al la Aŭstria urbo Linz. Tie li loĝis ĝis la fino de sia vivo. En malliberejo li verkis siajn „Kufŝtejnajn" elegiojn, en kiuj aperas jam ankaŭ trajtoj de la romantikismo. (Kufstein estis imperiestra prizono en Aŭstrio. – Red.)

Mihály Csokonai Vitéz

### Csokonai

La sekva personeco de la hungara literaturo post Bálint Balassi, havanta mondan rangon, estas *Mihály Csokonai Vitéz*, aŭ simple *Csokonai* [Ĉokonai] (1773–1805). Kelkaj opinias, ke inter la samtempaj poetoj lia parenco – laŭ karaktero kaj vivkondiĉoj – estas la skota Robert Burns.

Csokonai naskiĝis en la urbo Debrecen, kiu tiutempe estis laŭ la loĝantaro la unua urbo de Hungario. Li studis en la tiea fama *Collegium* de kalvinanoj. Jam infanaĝe li literaturnivele skribis en la latina, frue li ellernis la italan, la francan, la germanan, la malnovgrekan, li konatiĝis ankaŭ kun la angla, la hebrea, la araba kaj la persa. Unue liaj poemoj aperis en la jaro 1793. Aĝanta 21 jarojn li fariĝis vic-profesoro de la Kolegio. La kolegianoj al liaj instruhoroj iradis „kiel al teatro, tretante unu la alian". Pro la regulrompoj fare de li, Csokonai estis kelkfoje vokata antaŭ la lernejan juĝantaron, kiu finfine eksigis lin poreterne el la institucio.

Ekde la jaro 1788 li postlasis temprezistajn verkojn. En ili aperadis ludemaj Amoretoj kaj Gracioj kun la tuta mitologieto de la Eŭropa rokoko. Sed la stil-idealo de rokoko ĉe li kunfandiĝis kun sobreco kaj konscia tendenco pri popolklerigado. En 1791 li verkis liberan tralaboradon de la antikva greka *Batraĥomiomaĥia* (Ranmus-lukto), kiu staras ĉe la limo de

bonhumura porinfana fablo, de komika eposo kaj politika satiro. Sed en lia poeta evoluo estis ankaŭ alia linio – ĝuste la plej grava –, kiu preteris la rokokon. En vico de siaj poemoj li per escepta artisma forto esprimis ideojn de la klerismo. Du pintoj de tiu verkado estas *Konstantinoplo* kaj *La Vespero.* La unua estas Voltaire-eska senmaskigo de la religia fanatikeco, la alia enpoemigo de la filozofio de Rousseau. En 1793 naskiĝis komedio de Csokonai, kiu restis nefinita: *La melankolia Tempefŏi aŭ Estas freneza kiu fariĝas poeto Hungarlande.* Ĝi estas amare verdira akuzo pri la Hungarlandaj kondiĉoj de la kulturo.

Csokonai el Debrecen iris al Sárospatak por studi la jursciencon, poste li pasigis la tempon en Komárom. Ĉi tie komenciĝis lia granda amo al Julianna Vajda, nomata en liaj poeziaĵoj *Lilla.* Dum la poeto serĉis laborpostenon, la gepatroj de Lilla edzinigis sian filinon al riĉa komercisto. Tragikan profundiĝon de la Csokonai-liriko alportis la ĉagreniĝo post tiu ĉi amo. Jam en la fruaj Lilla-poemoj senteblas iom, ke tiu amo estis lasta azilo por la poeto. Kiam la amo finiĝis, Csokonai kun kortuŝa simpleco parolas pri sia doloro. Lia unua komika eposo *Dorottya* (Dorottja) (1799) spegulas sintenon kontraŭvirinan. En tio eble rolis ankaŭ fino de la amo al Lilla.

Csokonai vintre de 1800 kun du florenoj enpoŝe iris perpiede hejmen al Debrecen, kun la decido, ke depost tiu tempo li dediĉos la vivon por eldonigi siajn verkojn kaj por verki grandan nacian epopeon. Sed ambaŭ liaj planoj malsukcesis. En 1802 en Debrecen estis fajrokatastrofo, ankaŭ la domo de la Csokonai-familio forbrulis, kaj la poeton minacis totala senhaviĝo. Lia tuberkulozo jam delonge pli kaj pli turmentis lin. En 1804 li estis petata deklami adiaŭpoemon dum la entombigo de la edzino de riĉega aristokrato. Per sia lasta animekbrulo li verkis grandegan poemon filozofian sub la titolo *La Senmorteco de l' Animo.* En la malvarma vetero li pneŭmoniiĝis, lia sanstato pli kaj pli malboniĝis kaj en 1805 li mortis.

En pli malvasta poezio de amiko de Csokonai, *Mihály Fazekas* [Fazekaŝ] (1766–1828) al klasikaj altaĵoj ascendas lia popoleska humura epopeo, *Matyi Lúdas* [Matji Ludaŝ]. En brilegaj heksametroj ĝi rerakontas praan „vagantan historion": la pribatita juna kampulo trioble repagas la ŝuldon al la bienulo.



La domo de Dániel Berzsenyi en la vilaĝo Nikla

Dániel Berzsenyi

Ferenc Kazinczy



## La dua periodo de la hungara klerismo

La lasta granda poeto de la hungara nobelaro estis *Dániel Berzsenyi* [Berĵenji] (1776–1836). La plej grandan parton de sia vivo li pasigis en vilaĝoj, en sia Transdanubia (Okcident-Hungaria) bieno. Li tie mastrumadis, eĉ ne serĉante la publikecon. Obstina, retiriĝema, stranga poeto li estis, kiu akceptis kritikon rekonan, sed samtempe iom tro kulpigan fare de lia poet-kunulo Ferenc Kölcsey [Kölĉei], kiel fatalan sortobaton (1817). De tiu tempo li plene okupis sin pri estetikaj studoj. Liaj idealoj estis: sopiro pri nereporteblaj moralvaloroj antikvaj, purigita religio, al kiu kondukas la racio. En liaj sonoraj odoj kaj en liaj elegioj, esprimantaj rezignon per vireska forto, korpiĝas sopiro pri neforpasemaj valoroj.

En la dua periodo de la hungara klerismo la plej granda personeco, eĉ se ne la plej granda verkisto, estis *Ferenc Kazinczy* [Kazinci] (1759–1831), la energiema literaturorganizanto. Post la malkaŝo de la jakobena movado li pasigis sep jarojn en prizonoj kaj nur post 1801, aĝanta 42 jarojn, li povis komenci la plenumadon de sia vera vivmisio. Lia bieneto por dudek jaroj fariĝis centro de la hungara literatura vivo. Lia korespondado kun la samtempanoj poste estis eldonita en 23 dikaj volumoj. Unu el liaj esplorantoj jene karakterizis lian rolon: „Kiel demiurgon de la literaturo de la hungara klerismo oni devas denove kaj denove montri Kazinczy kaj lian korespondadon. Kvazaŭ fanatika iluziisto, trompanta ankaŭ sin mem, precipe kaj ĉefe li kreis iluzion de hungara respubliko literatura."

La batalo pri la lingvorenovigo, kies ĉefbatalanto kaj teoriisto estis Kazincy, finiĝis en 1819 kun plena sukceso de la novigistoj. Tiam, ĉe la fino de la 1810-aj jaroj li povis komenci siajn du brilegajn memuarojn *(Taglibro de mia Mallibero* kaj *Memoro pri mia Kariero).*

En la sama periodo laboris ankaŭ unu el la plej grandaj hungaraj dramverkistoj, *József Katona* (1791–1830). Li verkis sian ĉefan verkon al la konkurso de revuo. La ĵurio eĉ ne menciis la dramon, historian tragedion, titolitan *Bán Bánk,* verŝajne pro ĝia romantikismo. Ĝi tial aperis nur en la jaro 1820. Tiu ĉi verko pro ĝiaj bona ludebleco, brilegaj karakterizado kaj animmontrado, krome pro ĝia patriotismo ĝis nun estas la plej granda nacia tragedio hungara.

El la hungara: P. A. *Rados*

# Du poetoj de la hungara klerismo

**Mihály Csokonai Vitéz**

## *Al la Espero*

*Ĉielmiraĝ, ludanta*
*Kun la fil' de l' Ter':*
*Ho, vi blinda, vanta*
*Ŝajna di': Esper'!*
*Kiun kreas plore*
*Ni en la danĝer',*
*Kredas klinhonore*
*Esti gard-anĝel':*
*Kial venas vi glat-buŝe*
*Kun sennuba rid',*
*Kial ĉarmas vi flat-tuŝe*
*Min per duba fid'?*
*Ĉesu! Vi posedis,*
*Vi instigis min,*
*Vi, dum mi vin kredis,*
*Mistifikis min.*

*Plantis narcis-garbojn*
*Vi en mia kort',*
*Per fontet' la arbojn*
*Savis vi de mort',*
*Vi printempon ŝutis:*
*Florojn mil al mi,*
*Ĝoj' ĉiela gutis*
*Spice, pli kaj pli,*
*Pensoj en la freŝa fruo,*
*Kiel la abel',*
*Flugis per la venta fluo*
*Al la roz-miel'.*
*En feliĉo brila*
*Jam ne mankis pli,*
*Ol la kor' de Lilla,*
*Kaj ĝin donis Di'.*

*Sed ve, jen ne verdas*
*Miaj arboj plu,*
*Rozoj freŝon perdas,*
*Sekas fonto-flu'.*
*Mia helo Maja*
*Iĝis vintra nub',*
*Viv' antaŭa, gaja,*
*Iĝis cindra rub'.*
*Ho, nur Lilla-n vi plu donus,*
*Nur ŝin, ŝin en sol',*
*En lamentoj nun ne dronus*
*Kanto sen konsol'.*
*En brakum' konsolojn*
*Trovi scius mi,*
*Kaj la perlokronojn*
*Ne envius mi.*

*For, Espero flata,*
*For jam, trompistin',*
*Ja, ĉi krudo fata*
*Enterigos min.*
*Mi ne plu aspiras,*
*La anim' pro l' lac',*
*Je l' ĉiel' sopiras,*
*Korp' je l' tomba pac'.*
*Por mi jam la kamp' ne floras,*
*Ne odoras nun,*
*Bosko trile ne sonoras,*
*Nokte dronas sun'.*
*Sorĉaj sonoj trilaj,*
*Bunta fantazi',*
*Gaj', esperoj, Lilla-j,*
*Adiaŭas mi.*

*El la hungara: K. Kalocsay*

**Dániel Berzsenyi**

## *Mia dividparto*

*Bordon tuŝis bark'. Mi la velojn volvas,*
*Al tempest-koler' mi rezistis brave.*
*Tra Karibdoj kaj tra danĝeroj centmil*
*Frunt' mia ŝvitis.*

*Pac' min lulas jam: mi la barkon ligas,*
*Ĝin ne logos for plu fein-imago,*
*Ho, izola lok', en la sin' akceptu*
*Fajran junulon.*

*Estas mia kamp' ja ne tiel riĉa,*
*Kiel la Tarent' aŭ Larissa rava,*
*Kaj ne brilas ja en la boskoj sanktaj*
*Fonto Tibura:*

*Sed jen vinberej', kaj spikaron oran*
*Donas la bien', kaj libero, amo*
*Loĝas en la hejm'. De favoraj dioj*
*Kial pli peti?*

*Ĵetu min la sort', kien ajn ĝi volas,*
*Nur ne premu min la mizero peza,*
*Ĉie kun kontent', kun feliĉ' rigardas*
*Al la ĉiel' mi.*

*Vi ĉeestu nur, ho Camena milda,*
*Benon via man' ĉie sur min ŝutas,*
*Iĝos florĝarden' la dezert' sovaĝa*
*Per via kanto.*

*Falu en Grenland' mi al neĝ' eterna,*
*Falu en Sahar' mi al arda sablo,*
*Ĉie ŝirmos min vi per brusto varma,*
*Freŝa ombrelo.*

*El la hungara: K.* Kalocsay

**Mihály Csokonai Vitéz**

## *La Senmorteco de l'Animo*

**(Fragmento)**

*Esti aŭ ne esti, demando mistera,*
*Kies solvo estas belega, transtera;*
*Kiam la problemon mi baze esploras,*
*Misterojn pli novajn denove mi trovas.*
*Dubas, vidas menso, mi tremas de timo,*
*Ĝemas sin forsavi, senpova animo,*
*Sentas mi min nobla, estante malforta,*
*Kovras nub' esperon, la dubo, jen: forta.*
*Kvankam mi la koton sinmovan altŝovas*
*Dian flamon en ĝi nenie mi trovas,*
*Al ĉiel' min portas flugiloj eteraj,*
*Sed al tomb' min trenas piedoj pezferaj,*
*Ĉiam pendas inter ĉielo kaj tero,*
*Mi, anĝel' aŭ besto aŭ pluva polvero.*

*Se mi estas – vivi eterne mi devas,*
*Se mi mortos, kial dolore mi revas,*
*Se la vivo pasos, por kio la tero,*
*Pereontojn kial vivigas espero?*
*Tial, ke suferu mi nigran doloron,*
*Ke mi ekzilata, pelata la horon*
*Ĉiam nur atendu, kiame altlando*
*Estos atingota? – sed estos? – demando!*
*Mi por plori estu, por morta doloro,*
*Ĉu esperon vanan nur sonĝu la koro?*
*Tiel mi dezire sopiras nirvanon:*
*Reakceptu vian lacegan infanon!*

*Feliĉulo, kiu ne venis al mondo,*
*Kiu ne gustumis el granda vivfonto!*
*Sed ve, kiun portis al mondo la sorto,*
*Tiun turmentbrulas ĉiame la morto.*
*Ne estante, ĝuon ne trovus mi por mi*
*Povus en mortbrakoj senscie mi dormi,*
*Sed se ekaŭroris ete la korflamo,*
*Tuj la fajro sekvis de l' brula vivamo.*
*Esto! Ĉiellando eĉ en vivmizero,*
*Eĉ senscie estas ne-esto: infero!*
*Jen mi staras en la insulo de l' esto*
*En la mez' de l' ondoj, en tur' de roknesto*
*Mi rigardas ombran forecon de l' bordo,*
*La estonton por mi, aŭ finon de sorto.*
*Sub mi jen ekgrincas la dent'*
*de l' elementoj*
*El la faŭk kaosaj bruegas la ventoj.*
*Vi pereos! krias kaos-uragano,*
*Al mi proksimiĝas magia ostmano!*
*Sed jen: sub kurteno de l' blua espero*
*Per ridet' de l' steloj lumiĝas la tero.*
*Animon Di' sendis, jen flustras stel-rido,*
*Se mortas la korpo, eternas spirito.*

*El la hungara: F.* Szilágyi

# Zamenhof ne estis monavida

*La titola konstato estas fakto sufiĉe konata, kaj la esperantistaro havas ĝustan imagon pri la karaktero de la aŭtoro de Esperanto. Tamen estas tre edife konvinkiĝi pri tio legante la pruvojn, kiujn kompetente kolektis la konata zamenhofologo Adolf* Holzhaus.

1. El la unua Esperanto-libro (26. 7. 1887). Zamenhof skribas: „Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas proprajo socia, kaj la aŭtoro por ciam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi."

2. El letero de 9/21. 5. 1896 al Paul Nylén: „Kontraŭ la fakto, ke Vi ĉerpis el mia „Ekzercaro" por Via lernolibro-ekzercaro, mi absolute nenion havas. Kun plezuro mi permesas al Vi preni el ĉiuj miaj verkoj tiom, kiom Vi volas."

3. El poŝtkarto de 12/24 IX 1898 al. A Caetano Coutinho Zamenhof skribas: „Por traduki la „Ekzercaron" en lingvon portugalan mi kun plezuro donas al Vi mian plenan permeson."

4. El poŝtkarto de 19 (27). 3. 1903 (poŝtstampo) al René Deshayes: „Presigi la „Vojon" Vi havas plenan rajton kaj Vi tute ne bezonas mian permeson pro tio ĉi."

5. El letero de 20/V. 1905 al generalo Sébert: „Kun granda danko mi ricevis Vian leteron kun la sumo de 376 rubloj, oferitaj por mi de nekonata amiko, por faciligi al mi mian venon al la kongreso. Sed kvankam mi tre alte ŝatas la bonan amikan intencon de la nekonata oferinto, mi tamen tre bedaŭras, ke mi *ne* povas akcepti la oferitan monon, kiun mi petas Vin redoni al la oferinto kune kun mia plej sincera kora danko. Mi tute ne kaŝas antaŭ Vi, ke mia veturo al la kongreso estas por mi efektive tre malfacila. Mi havas nenian kapitalon kaj mi vivas kun mia familio de mia ĉiutaga perlaborado; tial la kostoj de la vojaĝo kaj la preskaŭ trisemajna perdo de profesia perlaborado estos por mi efektive sufiĉe peza; tamen ankoraŭ pli peza estus por mi la konscio, ke al la unua granda festo de Esperanto mi veturas por fremda mono. Tial mi neniel povas akcepti la grandaniman oferon, kvankam mi estas *tre danka* al Vi, estimata Sinjoro, kaj ankaŭ al la nobla nekonata oferinto pro Viaj amikaj intencoj."

6. El letero de 20. 6. 1905 al la firmo Hachette: „Ofte diversaj personoj libervole proponadis al mi procentan pagon de siaj verkoj (ekzemple antaŭ 2 jaroj proponis al mi Stead, St. Martin, Fried, Ahlberg kaj aliaj; poste de Beaufront, kiam li volis eldonadi „Bibliotekon de l'Espérantiste"; nun Fruictier por la Granda Vortaro k.t. p.);, sed kvankam mi ĉiam estas en tre premita financa situacio, kaj kvankam ili proponadis al mi la monon simple kiel ŝuldon de dankeco, postulante de mi *nenian laboron* kaj nenian publikan aprobadon aŭ respondecon, kaj kvankam mi havis *plenan rajton* akcepti la proponatan pagon, – mi tamen ĉiam *rifuzadis.*"

7. El letero de 18. 7. 1905 al „Tre estimata Sinjoro!" Akceptu mian plej koran kaj sinceran dankon por Via propono pagi al mi la koston de mia vojaĝo. Volu tamen pardoni al mi, ke mi tiun proponon *ne* povas akcepti. Mi tre alte ŝatas Vian bonan deziron, sed mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne por mia propra mono."

8. El letero de 18. 7. 1905 al Bourlet: „Al s-ro Bréton mi respondis hodiaŭ, ke por lia deziro pagi al mi la kostojn de vojaĝo mi lin kore dankas, sed ke akcepti tion ĉi mi ne povas, ĉar mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne por mia propra mono."

9. El poŝtkarto de 22. 1. 1906 (poŝtstampo) al E. Lawrence: „Por presi la kantojn, mi de mia flanko kompreneble donas al Vi plenan permeson."

10. 15. X. 1906 Zamenhof estis en Bruselo kaj 17–23. X. 1906 en Parizo, por en Bruselo kun Charles Lemaire kaj en Parizo kun Emile Javal diskuti demandon pri reformoj de Esperanto. La 23-an de Oktobro 1906 Lemaire france skribis al Javal: „Zamenhof foriris. Mi estis korpremita, vidante foriri – tiel perditan en la vasta mondo – tiun duon-Kriston. Li ne volis, ke mi provizu al li seĝon en la luksa trajno ĝis Berlino. Li foriris, en sia humila triaklasa kupeo, kun bombonoj por sia eta filino kaj du brioĉoj por si. Mi opinias, ke li donis al ni admirindan ekzemplon."
(„La nica literatura revuo." N-ro 21, Januaro-Februaro 1959, p. 83.)

11. En la universala kongreso de Esperanto en Barcelono, Hispanujo, 1909, D-ro Henri Dor parolis, ke genia elpensaĵo de D-ro L. Zamenhof efektive donis pacon al la homaro forigante militojn, proponis al la kongreso klopodi, ke Zamenhof ricevu Nobel 'an premion de paco. Zamenhof tre dankis por la propono de D-ro Dor, sed petis, ke la kongreso ne prezentu tiun proponon kaj ne enskribu ĝin en la protokolon.
(„Lingvo Internacia". N-ro 189, Septembro 1909, p. 427.)

12. El poŝtkarto de 26. 11. 1909 al „Kara kolego"; El la „Proverbaro Esperanta" Vi povas preni por la vortaro kiom Vi volas."

13. El letero de 31. 7. 1911 al generalo Sébert: „Pagon por mia vojaĝo mi kompreneble *ne* prenos; mi nur akceptas (konforme al la ĝisnunaj tradicioj de niaj kongresoj), ke en la kongresa urbo mem mi kaj mia edzino estos gastoj de la kongreso kaj nepagos por nia loĝado kaj manĝado. Miaj filo kaj filino kompreneble *ne* estos gastoj de la kongreso; por iliaj kongresaj kartoj kiel ankaŭ por ilia loĝado, manĝado k.t.p. mi pagos mem."

14. El letero de 27. XII. 1912 al B.E.A.: „Preni ian pagon pro la frazoj, kiujn fraŭlino Fryer ĉerpis el mia Ekzercaro por sia lernolibro, mi absolute *ne* konsentas. Mi kore dankas la konsilantaron de Via Asocio pro ĝia decido sendi al mi pagon, sed tiun pagon mi akcepti ne povas."

15. El poŝtkarto de . . . al . . .: „La artikolo „Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia" estas verkita *ne* de s-ro de Beaufront, sed de mi (sed mi deziras, ke ĝi restu *anonima*). Kun plezuro mi donas al Vi plenan permeson represi ĝin kune kun rusa traduko en via verko. Ankaŭ mian „Preĝon" mi kun plezuro permesas al Vi represi". (Poŝtkarto estas en la libro „Adolf Holzhaus. Zamenhof-leteroj", n-ro 355.)

16. E. Privat en „Vivo de Zamenhof", 1920, p. 92, rakontas: „Klientoj pagis nur kvardek kopekojn – kelkaj eĉ nenion."

17. N. B. Ĥavkin en la artikolo „Aleksander Silbernik" skribas: „La malriĉaj klientoj ekkonis la bonkorecon de la doktoro, kiu ofte kuracis senpage."
(„Esperanto Internacia. N-ro 10, Oktobro 1946, p. 150, 151.)

18. Kazimierz Tyminski ĉeestis enterigon de nia Majstro. En artikolo „Ĉe la tombo" li skribas: „Malantaŭ la ĉerko formiĝis multnombra sekvantaro, kiu grandparte konsistis el popolamaso, loĝanta en la hebrea kvartalo; videble la onidiroj, pri tio, ke la Majstro senpage kuracis kaj helpis malriĉulojn, estas pravaj."

(„Pola Esperantisto". N-ro 2. Marto-Aprilo 1956, p. 2.)

19. Anatolo Koĥ en „Miaj rememoroj pri d-ro Zamenhof" rakontas: „D-ro Zamenhof estis sola varsovia kuracisto, kiu dediĉis unu tagon semajne por senpaga akcepto de malriĉaj malsanuloj."
(„Nuntempa Bulgario". N-ro 12. Decembro 1958, p. 22.)

20. Emilian Loth en siaj „Rememoroj pri Zamenhof" skribas: „Zamenhof ne estis materialisto kaj kiel okulkuracisto li ofte kuracis malriĉulojn tute senpage."
(„Pola Esperantisto". N-ro 6. Novembro-Decembro 1959, p, p. 4.)

Adolf Holzhaus

# HUNGARA DOLĈAĴINDUSTRIA ENTREPRENO

# La apostolo

La granda Invento, kiu poste suprenkirlis la tutan Esperanto-movadon kaj famigis Lian nomon, debutis en la ĉarma Transilvania urbo *Sibiu.* Viglakaraktera juna pastro gestadis antaŭ diversgenta publiko. Hungaroj, rumanoj, germanoj ekparolis frazojn de la nekonata Esperanta lingvo, ridokule ripetis nove-denove la vortojn de Andreo Cseh, kiu kvazaŭ sorĉisto variis kolorajn pupetojn, diversgrandajn objektojn antaŭ la ravita publiko – sen diri ion en la konataj nacilingvoj. Facila lingvo – facila lernado! Esperanto alportos ĝuon kaj ĝojon al la uzanto – jen la pruvo, ke jam la instrumetodo alportas plezuron! Lernu distre, amuze, jen maniero per kiu preskaŭ ludante, ofte ridante oni enkapigos fremdan lingvon, ĝuste la lingvon de la internacia frateco. *Rekte* ni marŝos al la nova lingvoscio: paroli, interkompreniĝi vi povos post kelkaj monatoj jam, nur *kuraĝe* respondu pri la vidaĵoj: jen, kara lernanto, vi, plenaĝulo, sukcesis *elegante!*

Kaj la Metodo svingiĝis de la eta urbo al grandaj, al grandegaj, de la hejmlando al Svislando, Germanio, al la nordaj landoj. La lokoj de la triumfa instruado same variis, kiel la aĵoj montritaj de la instruisto, la intereso por la magia metodo fulme kreskis, la Apostolo senlace instruanta gvidis lingvokursojn en multaj landoj. Lia *rekta metodo* baldaŭ venkis en la movadaj sferoj, oni postulis ĉie la famajn Cseh-metodajn kursojn. En Budapeŝto, dum UK en 1929 li gvidis kursojn jam *por kursgvidantoj,* kun la celo transdoni sian metodon por uzi ĝin tra la mondo. Sekvis multaj tiaj seminarioj, precipe dum la universalaj kongresoj. Kiaj eminentaj disĉiploj ekuzis la Cseh-metodon! Julio *Baghy,* Lidja *Zamenhof,* Tiberiu *Morariu,* Paŭlo *Balkányi,* Ferenc *Szilágyi,* Jean *Forge,* Stefano *Bartha* kaj oni povus longe listigi nur la plej famajn figurojn de la movado kaj literaturo. Kaj tute ne malprave serĉadis Lejzerovicz en sia „Verda Biblio" pri kunveno dum kongreso en Krakovo:

*„Tiam stariĝis Andreo* Apud, *la apostolo de l'nordo, kaj alparolis la popolon. Kaj denove tondra aplaŭdado sonis tra l'aero.*
*Kaj Andreo Apud etendis siajn manojn, turnis la okulojn al la ĉielo, kaj li ekparolis dirante: Ĉu vi estas feliĉaj?*
*Kaj la popolo ekstaze respondis: Jes, ni estas feliĉaj.*
*Kaj Andreo Apud daŭrigis: Mi gratulas al vi."*

Certe, la movado de Internacia Lingvo povas gratuli al si pleje pro tiu grandioza kontribuo de Andreo Cseh. La mirinde rava kaj distra instrumaniero – tiam ankoraŭ apenaŭ uzata principo „rekta" de lingvoinstruado – alportis nekredeblajn sukcesojn por la disvastigo de nia lingvo. Oni ne troigas, atribuante la firmiĝon de la movado grandparte al la amasa aro de „konvertitoj" – almenaŭ en Eŭropo. Memkompreneble, „cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas", tamen *restas multaj,* kaj firmiĝis vasta fundamenta homamaso ĉirkaŭ nia lingvo.

**Andreo Cseh ekironta al vizito al Teo Jung (6. 4. 1978) (Foto: Dr. J. Kondor)**

K. Kalocsay:

**RIMPORTRETO XIV**

Andreo Ĉe, *la Gaja Stelo,*
*Migranta lingva apostol'.*
*Jen, malgraŭ sia pastra stol'*
*La ŝercojn ŝutas po sitelo.*

*La lingvojn kvazaŭ tra funelo*
*En kapojn verŝas dum petol'*
Andreo Ĉe, *la Gaja Stelo,*
*Migranta lingva apostol'.*

*Se ludas li sur la „Tabelo",*
*Tumultas post li la popol'*
*Ravate de miel-parol',*
*Ho – ratkaptisto de fabelo:*

Andreo Ĉe, *la Gaja Stelo.*

Kaj Andreo Cseh zorgis ankaŭ pri la daŭrigo de la lernado: li fondis la revuon LA PRAKTIKO, kaj redaktis ĝin dum tri jardekoj (!) precipe por doni en la manojn de la komencantoj, plulernantoj amuzan instrumenton por sintrejnado.

Liaj plej aktivaj disĉiploj formis novajn kaj novajn, pli modernajn instrumetodojn sur la bazo de la Cseh – metodo. Nuntempe jam ne sufiĉas la tro rapide akirita, ne tre profunda lingvoscio, kaj nun jam ne estas necesa fremdlanda E-instruisto, kiu principe ne volas, ofte eĉ ne kapablas komenti, instrui nacilingve. La modernigitaj metodoj tamen originas rajte kaj multtrajte el la geniaj instru-principoj de Andreo Cseh.

Post longa aktiva poresperanta laboro li vivis en pensiono, laste en domo de maljunuloj, kun freŝa spirito. Nur en siaj lastaj semajnoj li malsaniĝis, kaj ofte ĉirkaŭita de multaj amikoj, li iom post iom perdis de sia forto. Malgraŭ eminenta flegado, je vendreda tago, 14,35 horo, la 9-an de marto finiĝis lia spirado, dum ĉeesto de geamikoj. En la Haga Pastra Tombo, sub kapelo estis inde enterigita lia ĉerko.* Tie marmortabulo, en Esperantujo profunda memoro de lia legenda agado gardas lian nomon.

*Kun manpleno da hungarlanda tero.

Ervin *Fenyvesi*

# Originala poezio

Lina Gabrielli

## AMO KAJ MALAMO

*Mortigi, mortigi*
*mi volus vin*
*pro la doloro,*
*kiun vi donis al mi.*
*Karesi, karesi*
*mi volus vin*
*pro la doloroj,*
*kiujn suferas vi.*
*Sed mi devas*
*rezigni*
*pri mort' kaj*
*kares',*
*ĉar vi estas*
*fora,*
*malproksima de mi,*
*kaj mi tute ne scias,*
*ĉu mi trovos*
*vin.*

*Ateno, somero 1976*

Julio Varga

## SEN DORNO

*Rozo, mi komprenas:*
*vi devis vin defendi*
*kontraŭ centspecaj dinosaŭroj,*
*do vi faris dorno-lancojn.*
*(Kvankam violo ne estas armita,*
*tamen ĝi postrestis.)*

*Sed nun tio estas senracia:*
*ja vin la homo ŝatas, prizorgas,*
*kaj armiloj viaj ne defendas vin*
*kontraŭ deŝiro.*
*Eble foje (post jarmiloj)*
*ĉesigos vi la armadon senutilan.*

*Homo, mi komprenas:*
*vi bezonis viandon, peltaĵon;*
*bastonegon, kaptilon, ŝtonĵetilon*
*por la atako, defendo.*
*(Kvankam tiam homoj malmultis,*
*kaj „fokoj" abundis*.)*

*Sed nun la mondo jam ŝanĝiĝis:*
*oni havas ĉion abunde,*
*(nur la distribuo ne estas korekta.)*
*Por kio bonaj: dorno, armilo, bombo?*
*Povas okazi: „dornoj" internen turniĝos,*
*la armiloj retrorigardos;*
*se vi pereigas, ankaŭ vi pereos!*
*Konkuru kun la rozo,*
*kaj se vi estas vere saĝa,*
*vi ne bezonos mil-miljarojn*
*por elĵeti ĉiun vian mortigan „dornon".*

**Aludo al la dekkvara bildo de „La Tragedio de l'Homo"*

B. Wacha

## ĈEN POR ĈIN

*Jen*
*sen*
*san*
*sin*
*pelas*
*jen*
*sen*
*pan*
*plu*
*penas*
*Ĉu*
*ĉar*
*am*
*lin*
*ligas*
*ĉu*
*ĉar*
*riĉ*
*lin*
*logas*
*(kun*
*pen*
*viv*
*lin*
*pezas*
*sen*
*pez*
*viv*
*lin*
*tedas)*
*pu*
*po*
*sen*
*sin*
*tamen*
*ne*
*vi*
*ve*
*nas*
*amen*

John J. Francis

## DE GENERO

*Ja unika estas mi,*
*en menso povas porti*
*la ceteron de soci';*
*sen mi ĝi devus morti.*

*La mond' ne sin okupas pri*
*la fakt', ke devas forti*
*ĉi suverena sensa sci':*
*ne povos tio morti.*

*Rikoltanto estas mi;*
*nur pensas por rikolti;*
*mia penso: imperi' –*
*sen mi ĝi devus morti.*

*Aĝula cerb' pro atrofi'*
*ne povas sin agordi*
*kun ĉiu pensofleks' de mi.*
*Aĝuloj devas morti.*

*Infana cerb' – ja nur embri' –*
*se penus ĝi konkordi*
*aroge kun vibrad' de mi,*
*sendube devus morti.*

*Junuloj, nun perceptas mi,*
*ne emas ekadolti,*
*kaj svarmas ili pli kaj pli;*
*neniuj ŝajnas morti.*

*Jes, svarmas ili pli kaj pli;*
*ne ŝajnas ekadolti.*
*Adoltoj – nur esceptas mi –*
*amase iras morti.*

*Konscience la konsci'*
*bedaŭras ja raporti,*
*ke efemero estas mi*
*kaj baldaŭ devos morti.*

Ernesto Bécs

## PROVINCA AŬGUSTO

*Ĉe la rando de la urbo viciĝis maizejoj*

*kaj ilia verda divizio flusis ĝis la montoj.*

*En la malvarmeto sub ili ŝvelis dikegaj la kukurboj*
*kaj per siaj volvbranĉoj privagadis*
*la migradantajn sulkojn.*

*Sur ventaj kampoj hirta flugadis la fojno,*
*en la subpontejoj plikreskis la ombro.*

*Vesperkrepuske surgenuiĝis la ĝardenoj*
*kaj sur la montoj pretigis por si liton blanka nebulo.*

Julius Balbin

## OMAĜO AL EDGAR ALLAN POE

*Poe*
*Poeto*

*Po*
*Poetaro*
*Poe*
*Poemo*
*Poe*
*Poemaro*
*Poe*
*Poezio*
*Poe*
*Poezieco*
*Poe*
*Poeziulo*
*Poe*
*Poeziularo*
*Poe*
*Poeziemo*
*Poe*
*Poeziemulo*
*Poe*
*Poeziemularo*
*Poe*
*Poeziamo*
*Poe*
*Poeziamanto*
*Poe*
*Poeziamantaro*

*Poe*
*Poego*

Kapo de vagabondo (1910)

Vintra pejzaĝo

# László Mednyánszky

En nia artvivo estis grandsignifa la jaro 1972, kiam la Hungara Nacia Galerio translokiĝis en sian novan, dignan hejmon, en la rekonstruitan fortikaĵon de Buda. Depost tiam estas por Budapeŝtanoj, hungaroj kaj eksterlandanoj inda kaj tre-tre interesa, utila programo viziti la iaman hungaran reĝan palacon kie, apud la konstantaj, oni povas vidi ankaŭ periodajn ekspoziciojn.

Ĉijare (en aprilo-julio) la amantoj de l' artoj ricevis en la Nacia Galerio maloftan travivaĵon: ni povis admiri verkaron de László *Mednyánszky*. La prezentitaj pentraĵoj (407) kaj grafikaĵoj (174) denove demonstris, ke Mednyánszky estis ne nur unu el la plej grandaj hungaraj artistoj, sed laŭ lia talento li apartenas al la eternaj majstroj de la Eŭropa pentrarto.

Li naskiĝis en 1852, en sia barona familia bieno, fortikaĵo de Beckó, (Nord-Hungario, hodiaŭ Slovakio ). Estas malnova sperto, ke la cirkonstancoj de naskiĝo kaj infanjaroj determinas (ĝenerale) la tutan vivon de homo. Mednyánszky estis aristokrato, sed en la evoluo, formiĝo de liaj karaktero, animo, pensmaniero estis pli forta la majesta naturo, la montoj, arbaroj, lagetoj, riveroj de Karpatoj, kaj kunludantoj, amikoj: kamparanidoj, filoj de servistoj en la baronaj kasteloj. Tiel li ekkonis la vivon de malriĉuloj, la mizeron, senhelpecon, kaj la sorton de milionoj de hungaroj.

Post mallonga inĝeniera studado en Zürich, li lernis en München, Parizo (1873-77, 1896-97), Vieno (1880- ) En 1878 li travagadis Italion kaj poste Dalmation, la bordon de Adria-maro. Kaj li travagis ankaŭ la Hungaran Ebenaĵon, Transilvanion, loĝante ne en elegantaj hoteloj, sed ĉe malriĉuloj. Kiam komenciĝis la unua mondmilito en 1914, li estis jam maljuna, malsana, tamen li volis vidi la grandan frenezon de la homaro, suferon kaj morton de milionoj. La soldatoj, kiuj pasigis tiujn terurajn jarojn en tranĉeoj, kavernoj, estis por li konatoj, ja la senrangaj soldatoj estis antaŭ la mondmilito kamparanoj, laboristoj, servistoj. Tial li kapablis kompreni kaj travivi la amasajn dramojn, tragediojn de la homoj kaj diversaj popoloj.

Li estis samsortano de postimpresionistoj, sed sekve de siaj travivaĵoj, pensadoj li alvenis al la esprimisma stilo, Lia arto havis ĝismorte du pasiojn: la naturon kaj la homon. Li amis ilin, sed la plej grava estis la vero, tial li neniam sciis plibeligi tion, kion li pentris.

Jen, tiel konfesas la bildoj de Mednyánszky. Lia pentraĵo *Farmo* (1905) prezentas nur domojn de hungara kamparano, sed li konkretigis ankaŭ la sorton de homoj, kiuj devas vivi ĉi tie. *En Serbio* (1914) estas animskua sciigo el la milito, kvankam ĝi pretiĝis en la komenco de mondodramo. Mednyánszky estis artisto, humanisto, tiel li vidis tuj la puran, kruelan veron, kiun ne volis kredi, akcepti post kvar jaroj tiuj, kiuj estis respondeculoj pro la amasbuĉado.

Mednyánszky mortis en 1919, sed lia verkaro estas vivanta parto de la nuntempa arto. Li estis ĝisfunde moderna, ĉar li parolis ĉiam pri la plej grava fenomeno de la mondo: pri la homoj kaj ilia vivo. Seniluzie kaj senerare pri la vero, belo, monstraĵoj.

Mihály *Gergely*

En Serbio (1914)



# PANORAMO

Parto el la Apoteko Muzeo de Ŝopron

## Apoteko-muzeo

Iu turisto, ravita de la belaĵoj de Sopron, diris la jenan ŝerce-trafan frazon: „En ĉi tiu urbo estas tiom da vidindaĵoj, ke eĉ se oni serĉas apotekon, oni trovas muzeon. „– Vere, preskaŭ tiel estas: en Sopron nome troviĝas ankaŭ apoteko-muzeo.

Laŭ la historiistoj jam en 1539 funkciis apoteko en ĉi tiu urbo. Unu el la plej famaj apotekoj de Sopron estis la Apoteko Angyal (anĝelo), kiu dum du jarcentoj troviĝis en la sama loko. Post ĝia renovigado oni aranĝis ĉi tie la Apoteko-Muzeon. Belegaj ujoj, vazoj kolektitaj ankaŭ el aliaj malnovaj apotekoj de la departemento, viciĝas sur la bretoj. En vitroŝrankoj ni povas rigardi antikvajn ilojn de medikament-fabrikado. En alia ejo estas ekspoziciitaj originalaj receptoj de valoraj, interesaj medikamentoj.

En la urbo Sopron, plena de historiaj vidindaĵoj, ĉi tiu nova perlo, la Apoteko-Muzeo havas sian specialan, allogan ĉarmon.



Parto el la nova viando-fabriko en Kaposvár

## Frademuloj, atentu!

Komenciĝis la produktado en la ŝinko-fabrikejo de la viando-kombinato de Kaposvár. Ĝin konstruis la okcident-germana konzorcio Schweissfurt Kirchfeld. La instalaĵoj reprezentas plej altan nivelon kaj certigas produktadon de eminentaj varoj, ankaŭ por eksporto. La kapacito de la fabrikejo estas 120 porkoj hore. La ŝinkon, produktitan en Kaposvár, povos renkonti sur la bretoj de la supermerkatoj ankaŭ niaj legantoj en Okcidenta Eŭropo kaj Usono.

## Poloj en Siklós

Memortabulo estis inaŭgurita en la bele renovigita mezepoka fortikaĵo Siklós en la sudhungarlanda departemento Baranya. Dum la solenaĵo oni rememoris pri la tragikaj eventoj antaŭ kvardek jaroj, kiam la muroj de ĉi tiu fortikaĵo donis rifuĝejon al poloj forpelitaj fare de la faŝista atako.

La solenaĵon partoprenis Tadeusz *Pietrzak*, Budapeŝta Ambasodoro de la Pola Popolrespubliko kaj la delegitaro de Konsilio pri artmemoraj-protektado de Pollando.

## Hungara poeto kaj bulgaraj laboristoj

Unu el la junularaj brigadoj de la konstruentrepreno de Pernik (Bulgario) surprenis la nomon de la hungara poeto Attila *József*. La fonda solenaĵo de la brigado okazis en la Hungara Instituto de Sofio. Róbert *Jakab*, direktoro de la Hungara Instituto transdonis en la solenaĵo la fondan diplomon al la gvidanto de la bulgara junulara brigado.

## Muziko ne konas landlimojn

La muzika ĉefsekcio de la Hungara Radio jam la kvinan fojon anoncis la Internacian Programkonkurson *„Pro Musica"*. En ĉiu dua jaro estas aranĝita tiu ĉi konkurso kun kreskanta nombro de partoprenantoj. Ĉijare 22 radio-societoj ensendis siajn kontribuaĵojn. El ili la ok plej bonaj programoj estas prezentataj de aŭtuno en la Hungara Radio.

# PANORAMO



La nova suker-fabriko en Kaba

László Moholy Nagy

## Artikoloj de avangarda artisto

La Rumania hungarlingva eldonejo *Kriterion* aperigis kolektitajn artikolojn de László *Moholy-Nagy*, unu el la gvidantaj personecoj de la universala arto inter la du mondmilitoj.

La hungaro Moholy-Nagy, kiun samrajte ni povas nomi pedagogo, pentristo, skulptisto aŭ grafikisto, komencis pentri en la spirito de la revoluciaj aktivistoj, sed li fariĝis matura artisto en la komenco de la dudekaj jaroj, kiel konstruktivisto. El Berlino, unu el la centroj de la revoluciaj elmigrintoj li estis promociita profesoro en la tiutempe plej signifan altlernejon de Mezeŭropo, en Bauhaus, Munkeno. Li instruis en la societo de Kandinskij, Klee, Itten kaj Schlemmer Lia verko „De materio ĝis la arkitekturo" eĉ hodiaŭ estas ankoraŭ aktuala libro por la instruado de profesiaj artistoj aŭ estontaj ĝuantoj de artaĵoj. Laŭ Moholy-Nagy ĉiuj homoj estas talentaj; se ne por krei, tiam por percepti artaĵojn. Oni devas nur igi la homojn sensivaj por la bildaj informoj. En la epoko de la filmo kaj televido ne estas prokrasteble alproprigi la lingvon de bildoj.

Liaj pedagogiaj ideoj de tempo al tempo aperis ankaŭ en hungarlingvaj progresivaj gazetoj kaj enkaj eksterlande. Tiuj kolektitaj artikoloj aperis nun en volumo sub la titolo: *De la farbo ĝis la lumo.*

László Moholy Nagy, foto de Erzsi Landau (1919) (La originalo de la foto troviĝas en la Fotohistoria Arĥivo de la Asocio de Hungaraj Fotoartistoj)

## Dolĉa kunlaboro kun poloj

Ĉi-aŭtune eklaboris nova suker-fabriko en Kaba (Orienta Hungario). Polaj fakuloj planis, konstruis kaj ekfunkciigis la fabrikon surbaze de kontrakto kun la pola konzorcio Polimex-Cekop. Polaj entreprenoj ĝis nun konstruis 67 suker-fabrikojn eksterlande, tial estis decidite, ke en la kadro de la Ekonomia Interhelpo Hungario konstruigos novan suker-fabrikon per ili.

En Hungario estas produktataj ĝenerale 4–4,5 milionoj da tunoj da sukerrapo. Ĉi tiun kvanton la nunaj fabrikoj povis prilabori nur dum proksimume 130–140 tagoj. Sed la optimala tempo de la prilaboro estas 100 tagoj. Oni esperas, ke la nova fabriko minimume je 20 tagoj mallongigos la kampanjon. La valoro de ĉi tiu investaĵo superas 7 miliardojn da forintoj kaj ĝia kapacito estas produktado de sukero el 6 mil tunoj da sukerrapo tage. Tio signifas, ke 700 tunoj da sukero povas pretiĝi en ĉiuj 24 horoj.

Ĉi tiu estas nun la plej granda suker-fabriko en la landoj de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo. Eĉ en la tuta mondo nur malmultaj troviĝas kun simila kapacito.



Instalaĵoj de la densiga-linio

# REVUO DE REVUOJ

Fokuso de nia movado estas – nediskuteble – UEA. La jara raporto de ĝia estraro en la revuo ESPERANTO prezentas por ĉiu vigla movadano multajn interesaĵojn, kaj ĉijare precipe korvarmigajn. Kvardek landaj asocioj apartenas jam al UEA (rekordo) entute kun 32 mil membroj! La *delegita reto* en 62 landoj nombras 3500 anojn, tiu unika servo... Plezurdona leĝajo, samkiel la konstato, ke artikoloj, radio-tv elsendoj abundiĝis, kio atestas pri akriĝo de la lingvoproblemo, ne forrestanta jam el la plej prestiĝaj ĵurnaloj, radio-tv stacioj de la plej gravaj landoj.

Apenaŭ kredeble, ke niajn legantojn ne interesus la plej elstaraj faktoj de la tutmonda movado, tial mi *ekcitis* kelkajn rezultojn – estas vere, ke ili ja *ekscitis* min, kaj prave. Ke pri la Internacia Lingvo jam pluraj internaciaj konferencoj kaj organizaĵoj diskutas, parlamentoj debatas: ĝi estas jam sur tagordo! Evoluo, ke sistemaj klopodoj daŭras en Kanado, Usono, FRG kaj Hungario influi la *registaron* pri internaica lingva politiko – ĝenerale la eksteraj rilatoj de UEA prosperante alportis prestiĝon kaj influon al Esperanto. Jen agado de kelkcentoj da bravaj kunlaborantoj, kiuj sisteme rompas antaŭjuĝojn kaj malfermas novajn horizontojn.

La raporto mencias la aparte gravan aktivecon en *sindikatoj,* precipe en Britio kaj Hungario. Legantoj de HV scias pri tiu sfero, ankaŭ pri la „ampleksa nacilingva revuo en Hungario, kiu daŭre restas unu el la modeloj por sukcesa informa laboro", kiel asertas la Raporto. Estas aldoninde, ke ankaŭ Svedio eldonis svedlingvan gazeton en granda eldonkvanto. Gravaj antaŭenpaŝoj okazis sur la scienca kampo, kaj 1978 montriĝas kiel jaro de *interlingvistikaj* konferencoj: Budapeŝto, Varno, Novjorko, Timişoara kaj Žilina, jen la vojmontriloj. Adaptiĝi al la mondo – en kiu ni vivas – estas gvidprincipo de UEA, ofte sukcese klopodanta; superi obstaklojn kaj dividojn por tutmonda bono servas la homaron de la tuta terglobo, firmigas la daŭran pacon per si mem. Nia universala organizo meritas ĉies subtenon kaj apogon – ĝi fokusigas ĉiujn bravajn agadojn por la internacia komunikilo Esperanto. Tamen laŭdi estas facile, agante kontribui estas la devo farenda!

Detala superrigardo konstatas en KONTAKTO, ke 1978 estis jaro de la originalaj beletraj libroj Esperantaj. Kvankam recenzoj estis legeblaj pri ties plejparto ankaŭ en HV, tamen la po-titola admirinde konciza taksado de la erudicio-plena *Karl Pov,* per sia *klara pov'* kritikista, altnivele prezentas la verkojn al ni. Kaj kial ne esprimi miaflanke la ĝeneralan konsenton pri liaj taksadoj? Troviĝas detaloj, foje troigoj – laŭ mi –, kie niaj gustoj aŭ valorvidpunktoj ne koincidas, sed ne tiomgrade, ke disputo valorus „la penadon". Pri tiu lasta bonvolu (re) legi en la etdimensia, sed eg-edifa poemaro de William *Auld: El unu verda vivo.*

*Komuna Esperanto–Gazeto* de Nederlando ofte vekas la intereson per notindaj artikoloj. „La riĉo de Esperanto" prezentis spritajn argumentojn *por* eluzi la grandnombrajn eblojn de nia lingvo, kaj *kontraŭ* la malriĉigantoj de nia vortara abundo. Speciale la afikso *mal* ne plaĉas al kelkiuj – kelkafoje ni skribis jam pri tiu kontraŭfervoro – kaj mi ne povas bremsi min citi la jenan argumenton: „Se naciaj lingvoj abolus sian prefikson *mal*: la angloj devus vivi sen siaj „in-" aŭ „un-", la skandinavoj sen „o-", la germanoj sen sia „un-" kaj la francoj sen la propra „mal-"; tiom da vortoj tiuj nacioj devus aldoni al sia vortarto?!" Rigardante ilian vortaron oni rimarkas tuj la grandan nombron de tiaspecaj „negativaj" – t.e. nur el certa vidpunkto negativaj – ideoj kaj nocioj! Oni dum altstila verkado kompreneble povas eviti sinsekvajn malvortojn, sed dediĉante pli da imagpovo por krei kombinon, kiu kovras la anstataŭindan nocion. La ĉiutaga parolo aŭ skribado apenaŭ permesas tian cerbumadon, kaj tio estas tute en ordo.

Mi trovis en *Int. Pedagogia Revuo* ĵus aperintan studeton, kiu kvazaŭ eĥas je tiu lingvistika problemo, pri kiu oni devas nove-denove emfazi la *fundamentan* pravon. Homoj ĉie emas uze paroli malkomplikan – ofte malaltnivelan – lingvaĵon, pro simpla energiŝparado (ho, se energio-problemo tiel facile solviĝus!). Lingvo-psiĥologie bone konata fenomeno, sed Albert *Lienhardt* avertas en tiu ĉi artikolo, ke oni ne intermiksu la plian *simplecon* de la (lernata) lingvo kaj la pli simplan *lingvouzon,* kiu lasta natura deziro de la komencantoj estas kontentigebla per konscia kursmetodo. *Nenia kripligo* de Eo, pere de gramatika simpligo, servas la altan celon, havigi plenvaloran komunikilon: tio estus misfaro, kontraŭcela, do absolute maldezirinda – substrekas forte la aŭtoro.

El nroj 28. kaj 29. de INTERNACIISTO oni povas detale ekkoni la tragedion de Sud-orienta Azio, speciale tiun de Kamboĝo. Ĉiujn imagojn superis la popolekstermo sub ŝildo de „kolektivisma socialismo" inter 1975–79, kiu havis ververe *nenion komunan* kun socialismo. Jes ja, neeviteble, homaj institucioj estas „homaj", sekve povas returniĝi – aŭ alie: oni povas ilin returni en kontraŭan direkton. *Eblas,* mi akcentas. Sed ankaŭ eblas re-returni, tio estas *re* al la bona direkto. Post la Hungarlanda revolucio subpremita en 1849 *Madách* majstre elmontris tion, kiel „La Tragedion de l'Homo". Ega kuraĝo en la uragano estas necesa por revivigi la malfeliĉan landon de Kamboĝo, el cirkonstancoj kvazaŭ de la ŝtonepoko. Ankaŭ la postmilita Eŭropo detruita pruvis, ke tio estas ebla malgraŭ la plej grandaj malfacilaĵoj. La internacia lingvo denove ebligis rektajn kontaktojn por klare informiĝi, samkiel la nuda objektivo de la kinokameroj de la tv-ĵurnalistoj raportintaj.

Ervin *Fenyvesi*

# Stranga historio pri heredita pentraĵo

Lorenco Lam estis konata en la oficejo, kaj ankaŭ en la domo, kie li luis ne tro grandan, tamen por li sufiĉe komfortan loĝejon, kiel modesta, ordema kaj akurata homo. Kaj neniun el la epitetoj li ricevis senkaŭze, ja ĉi tie, en la Malnova Kvartalo la homoj estas pli severaj ol aliloke: koncerne lian modestecon sufiĉas mencii, ke tre malofte iu konato sukcesis anticipi lin en la reciproka salutado, pri la ordemo atestis lia eksmoda, tamen aŭtoritata eleganteco kaj la ĉiam senriproĉe rekta dislimo, kiu trakuris la mezon de lia maldensiĝanta hararo, nu, kaj kio koncernas la akuratecon, sufiĉas noti nur unu fakton: la tuta domo ĝustigis sian horloĝon laŭ la foriro kaj reveno de Lorenco Lam.

La akurateco estis elsanga propraĵo de Lorenco Lam. Oni povus ĝustigi la horloĝon ne sole laŭ lia foriro matene kaj reveno dum la malfrua posttagmezo, sed same laŭ la momento, kiam li malfermis la kranon en la banĉambro, aŭ kiam je la dekunua horo li malŝaltis la lampon en sia ĉambro. Tiu precizemo certigis al li ekvilibre trankvilan vivon, kaj efektive tio estis lia celo. Kiel malbona kaj foraverta ekzemplo ŝvebis antaŭ li la ekzemplo de lia pli maljuna frato, Alberto, kiu pro sia malordema vivo konstante luktis kun aro da problemoj, eĉ financaj, jes, financaj, kvankam Alberto Lam kiel renoma komponisto de kanzonoj gajnis almenaŭ trioble pli, ol estis lia salajro de sekciestro en la matrikula oficejo, sed la ĉiuvespera diboĉado kaj la flirtsangaj virinetoj englutis ĉion, kaj ofte Alberto Lam restis sen groŝo. Tio al li, Lorenco Lam, neniam povis okazi, la racie planita kaj senkompromise plenumita vivreĝimo eĉ ebligis al li ŝpari konsiderindan sumon por neantaŭvideblaj ekstraj bezonoj. Liaj tagoj fluis monotone, sed ne tede por li, precipe depost la morto de la edzino antaŭ tri jaroj, kiun li sincere funebris, ja la foririntino, kiel li ofte pensis, estis edzino inda al Lorenco Lam: mankis el ŝi ĉia kapricemo, malordemo, kiu ĝenerale karakterizas la virinan genton.

Konforme al sia neniam ŝanĝita kutimo Lorenco Lam sidis en sia fotelo kaj legis la semajnan detektivromanon ankaŭ dum la sabata posttagmezo, kiu komplete renversis lian vivon. La legado de detektivromanoj efikis al li trankvilige kaj ankaŭ kun ioma ekscito, sed tiu ekscito post la sestaga, sufiĉe senvaria laboro en la oficejo signis fakte ripozon. Do, li sidis en la fotelo, kaj ĉizis siajn racion kaj inteligenton, kiuj ebligis al li vivi tiel perfektan vivon, kiam oni sonorigis ĉe la pordo. La sonorigo komplete konfuzis lin, ja en tiu tempo ĝis nun neniam iu ĝenis lin. Per hezitaj paŝoj li iris al la pordo, malfermis ĝin, kaj staris antaŭ li viro mezaĝa, kiel li mem, en malhela surtuto.

– Sinjoro Lorenco Lam?

– Jes – li respondis maleme, kaj proponis al la nekonato eniri.

Klariĝis, ke li estis la advokato de Alberto Lam, kaj venis kun la informo, ke Alberto mortis ankaŭ kvar tagoj, sed li severe malpermesis informi la fraton antaŭ la entombigo. La entombigo ĵus finiĝis, kaj la advokato venis informi lin kaj kondolenci, kaj ankaŭ anonci, ke Alberto Lam testamentis al li pentraĵon, kiun ankoraŭ hodiaŭ oni transportos tien ĉi, ĉar la posedanto de la loĝejo postulas, ke oni ankoraŭ hodiaŭ transdonu al li la ŝlosilon. La ceterajn aĵojn jam forportis la koncernuloj, ĉu heredintoj, ĉu kreditoroj. La advokato adiaŭis kaj Lorenco Lam konsternite, nekomprene gapis post li.

Lian konsterniĝon ne kaŭzis la morto de Alberto Jam, ja estis atendeble, ke la senorda, senracia vivmaniero pli-malpli frue dismuelos lian organismon. Plie konsternis lin la impertinenteco, ke la apero de la advokato disblovis lian sabat-posttagmezan trankvilon, por ne paroli pri la alportota pentraĵo, kiu komplete embarasis lin. Lorenco Lam sciis, ke la frato havis plurajn amikojn inter pentristoj renomaj kaj sentalentaj egale, do la bildo same povas esti kaj valoraĵo, kaj farbmakulita tolo. Fakte lin incitis ne la atendebla valoro de la bildo, sed prefere la fakto mem, ke la frato testamentis ion al li, ja pasis almenaŭ kvin jaroj, ke ili lastfoje vidis unu la alian. Kaj cetere, kion li faru per la bildo? Ĉu pendigi en la ĉambro kaj distaŭzi la longe kutimitan varme harmonian atmosferon? Ĉu meti anoncon en ĵurnalo kaj vendi ĝin? Ĉu tiel, ĉu alie, li antaŭsentis, ke tiu heredaĵo almenaŭ por certa tempo nepre forblovos lian trankvilon.

Kaj por kreskigi lian ĉagrenon, la pentraĵo eĉ estis sufiĉe granda, ĝi ampleksis almenaŭ tri kvadratajn metrojn. Kiam la dungitoj de la transporta firmao foriris, Lorenco Lam per enuaj movoj komencis ŝiradi la pakpaperon, kaj dume vidis, ke la detektivromano, kiun li metis malfermita sur la fotelon, malrapide, sed nehaltigeble fermiĝas. Kompreneble, li bone memoris la numeron de la paĝo, kie li ĉesis legi, tamen, en tiu natura fenomeno ŝajnis al li manifestiĝi decido de iu supernatura forto. Tio forprenis de li eĉ la restintan serenon. Fininte la malpakadon, lia konsterniĝo nur pliiĝis. La pentraĵo montris scenon ŝokan, harstarigan kaj ne malmulte maldecan. Tri personoj kartludis ĉirkaŭ ronda tablo: du virinoj kaj unu viro. Unu el la virinoj estis komplete nuda, la alia surhavis nur kalsoneton kaj kombineon, sed ĉi lasta estis ĉifita malsupren: videble ŝi ĵus deprenis la mamzonon kaj ankoraŭ ne reĝustigis la kombineon. La viro ankaŭ estis nekomplete vestita: li malhavis jakon kaj kravaton, kaj la manikoj de lia ĉemizo estis refalditaj. Lorenco Lam nun jam komprenis la intencon de la frato. Li volis fari malspritan ŝercon eĉ post sia morto, bone sciante, ke tiu heredaĵo kaŭzos al Lorenco Lam ne malmultajn sendormajn noktojn. Ja kion fari kun la bildo? Pendigi ĝin estus absurde, tiu ĉi loĝejo ne povas toleri la ĉeeston de samspeca maldecaĵo, sed ankaŭ liberiĝi de ĝi ne estos facile. Kiu ja aĉetas tiajojn? Kaj eĉ senpage, al kiu donaci ĝin? Lorenco Lam estis konata en la domo, kiel homo serioza, deca, kion oni pensos, se li komencos reklami sian pentraĵon? Ja vane li diros, ke li heredis ĝin, por la plimulto de la homoj tio signifos nenion, oni memoros nur, ke la respektinda Lorenco Lam foje provis vendi aŭ fordonaci pentraĵon, kiu montras maldecan scenon.

La zorgoj tute malesperigis lin, kaj estis jam preskaŭ noktmezo, kiam li rekonsciiĝis el sia konfuziteco kaj iris en la banĉambron. La nerimarkita maltrafo de la longe kutimita tempo por enlitiĝo eĉ pliigis lian embarason. En la lito ankoraŭ longe li kuŝis maldorme, kaj lia rigardo ĉiam pli ofte haltis kun laca

deprimiteco sur la bildo, kiu kvazaŭ fosforeskis en la mallumo, almenaŭ la blindige blanka femuro kaj ŝvelaj mamoj de la komplete nuda virino.

Fine li sukcesis endormiĝi, sed la dormo ne donis al li trankvilon. Apenaŭ li transpaŝis la sojlon de la senkonscio, kaj atendis la unuan kareson de la dolĉa nenio, kiam la pentraĵo abrupte viviĝis. La iom vestita virino (nigra, kun migdalformaj, sed grandaj okuloj) provis reĝustigi sian kombineon, sed ŝi ne sukcesis trovi la braktruon, kaj lasis la aferon. La alia virino trinkis iom el la glaso, kiu staris antaŭ ŝi, kaj levante la kapon por repreni la kartojn desur la tablo, ŝi rimarkis lin. Je la sincera miro de Lorenco Lam ŝi ne ekkriis, tute ne konsterniĝis, nek kovris la bruston kaj la sinon per la manoj, eĉ kontraŭe, ŝi stariĝis kaj kun provoka rideto ekiris al lia lito. Lorenco Lam time tiriĝis al la muro, kaj volis fermi la okulojn, tiom pli, ke la senpudora korpo de la virino disradiis en la ĉambro helbluan, vibrantan lumon, sed liaj palpebroj ne obeis. Kun larĝe malfermitaj okuloj li gapis la lumantan fenomenon. En la nervostreĉa, blindiga fosforeskado prezentis trankvilon nur tri punktoj: unu pli granda sube, kaj du malgrandaj supre. Pasis almenaŭ kelkaj sekundoj, eble eĉ minutoj, ĝis Lorenco Lam konsciiĝis, ke la granda makulo estas la seksoharoj, kaj la du malgrandaj la butonoj de la mamoj.

La virino estis jam tute proksime, kaj Lorenco Lam sentis mortotimon. Li volis krii, sed ia stranga varmo mutigis lin kaj li perdis la konscion. La trostreĉitaj ĉeloj de lia korpo esperis, ke nun venos la vere sensonĝa, griza, ripoziga dormo, sed pasis nur momento, kaj reaperis antaŭ liaj okuloj la ondantaj mamoj kun la du antracite nigraj, ne, jam malhelruĝaj punktoj, kaj ankaŭ la tria, kiu daŭre promesis enlulon, dolĉan neniiĝon meze de la helblua vibrado de la femuroj kaj la ventro, sed ĉio ĉi jam ne vidiĝis tiel klare, kiel antaŭe, sed kvazaŭ tra nebulo aŭ maldika vualo.

La nokto pasis sen momenta vera ripozo, la virinoj alterne proksimiĝis al li, sed neniam ili atingis lin. Kiam la unua ruĝa radio de la leviĝanta suno penetris en la ĉambron, Lorenco Lam tuj ellitiĝis, kvankam li estis pli laca, ol vespere. La bildo staris senŝanĝe sur la loko, kien la transportistoj metis ĝin, kaj ankaŭ la vibrado komplete malaperis.

Lorenco Lam enpensiĝis. Estis por li klare, ke la noktaj eventoj nur estis sonĝo kaj halucinaĵoj, kaj la tutan koŝmaron kaŭzis la serio de ŝokoj, kiun malfermis la apero de la advokato.

Tiu rekono iom fortigis lin, kaj li sukcesis pasigi la dimanĉon, kiel kutime, promenante, kun tagmanĝo en bonkvalita restoracio. La problemoj reviviĝis nur vespere, en la lito, kiam la bildo ŝajnis denove fosforeski, kaj vane Lorenco Lam kovris ĝin per littukoj, la malvarma lumo de la virinaj korpoj trapenetris ĉion.

La nokto pasis, kiel la antaŭa, kaj Lorenco Lam ekiris lundon matene al la oficejo kun la firma decido, ke tiun ĉi tagon li dediĉos al la celo iamaniere liberiĝi de la malbenita bildo.

Lorenco Lam, kiel decas al koservativa ĝentilhomo, la donitan promeson ĉiam konsideris sanktaĵo, eĉ, se li faris la promeson al si mem. „Kiu trovas pretekstojn antaŭ si mem, tiu baldaŭ ĉasos tiajn por klarigi neplenumon de promeso, farita al alia homo." Tamen, spite siajn firmajn principojn, posttagmeze li ĉasadis jam tiajn pretekstojn, ĉar li eĉ ne proponis al iu ajn la bildon. Plurfoje li kolektis la fortojn, sed ĉiam katenis lian langon iaspeca miksaĵo de honto, nekonveneco kaj tute stranga, nekomprenebla maltrankvilo. La bildo restis, kaj la lunda, eĉ marda nokto pasis kun la skuaj, animkirlaj sonĝoj.

Dum la sonĝoj li vidis la bildon en mil variaĵoj, kaj tial merkredon matene li decidis bone rigardi ĝin posttagmeze, post la laboro, kaj fiksi ĉiujn detalojn en la memoro. Li atendis, ke la precizeco forblovos la misteron, kiu ŝvebas super la bildo, kaj tiamaniere ĝi ne povos plu ĝeni lin dum la noktoj.

Reveninte el la oficejo, li surprenis sian hejman mantelon kaj sidiĝis antaŭ la bildo. Li devis agnoski, ke ĝi estis kreaĵo de homo, kiu bone konis sian arton. En la tri vizaĝoj esprimiĝis kvazaŭ tri diferencaj mondoj: tiu de la nuda virino radiis mildan serenon, naivan ĉarmon, preskaŭ senkulpecon, la alia rigardis kun okulumo koketa, provoka, sed ne tiel triviale, kiel la samspecaj virinoj, kiujn li kutimas vidi ĉirkaŭ la Urba Monumento. Kaj la plej karakterizan bildon ofertis la vizaĝo de la viro: li estis ĉirkaŭ kvindekjara, kun trajtoj parolantaj pri laco, rompiteco, sed en liaj kavaj okuloj tamen oni povis rekoni certan fajreron vivan, kiu ne lasis dubon, ke li ankoraŭ havas la plenan kapablon ĝoji kaj ĝui la vivon. Lorenco Lam kun volita objektiveco pensis, ke lia frato verŝajne similis tiun viron, sed poste lia rigardo reglitis al la virinoj. Por vidi ilin pli bone, post kvaronhora penado li sukcesis pendigi la bildon sur la najlo, kiu dum la vivo de la edzino tenis sanktan ikonon, sed kiun li, ne estante religiema homo, donacis al la bofratino. Li devis konstati, ke ambaŭ virinoj estis tre belaj, kvankam tre diferencaj. La tute nuda kun longaj blondaj haroj reprezentis – nun li jam kuraĝis konfesi al si mem – la senkulpecon. Sed tiu senkulpeco ne radiis sole el ŝiaj okuloj kaj vizaĝo, sed el ŝia tuta mildkontura korpo. Lorenco Lam, kiu vidis nudajn virinojn nur en sia knabaĝo sur pornografiaj fotoj, kaj en la realeco nur sian edzinon, sciis apreci la belajn formojn de ŝia korpo. Kaj la alia, kies haroj estis nigraj kaj tonditaj mallongaj, ankaŭ havis sian allog-forton. Ŝi ŝajnis iom pli juna, eble eĉ ne dudekjara, ŝiaj mamoj ne estis tiom evoluintaj, sed rekompence fiksformaj kaj malmolaj. Post la zorga rigardado la senvestaj virinoj ĉesis esti ŝokaj por li, sed la tuto de la bildo tamen restis iel malnatura, mistera. Lia plano forblovi la misteron do sukcesis nur duone. La sonĝoj daŭris, tamen, ili ĉesis esti ŝokaj, timigaj, jam kaŭzis nur iometan maltrankvilon, ekscititecon eĉ ne malagrablan. La tagoj fluis, kiel antaŭe, kun la escepto, ke Lorenco Lam ĉiun sian liberan tempon dediĉis al la bildo.

Li jam tute ne provis vendi aŭ fordonaci ĝin. Li vivis sian vivon sola, pli ĝuste en stranga duopo kun la bildo, kaj maldungis eĉ la purigistinon, kiu antaŭe ĉiusemajne venis ordigi iom la loĝejon, por ke neniu lin ĝenu dum la intimaj horoj kun la pentraĵo. Lorenco Lam volis ĉiel ajn deĉifri la enigmon de la bildo, trovi la ŝlosilon de la mistero.

Jam pasis du monatoj depost la ricevo de la pentraĵo, kiam vekiĝis en li hereza penso: li devus rekostrui la scenon en la realeco, kaj tio certe multe helpus al li penetri en la misteron. Unue li forĵetis la ideon, kiel absurdan, nenormalan, sed baldaŭ li jam ekmemoris pri la stratvirinoj ĉirkaŭ la Urba Monumento. Vere, ke neniu el la ĝis nun viditaj povus konkurenci kun la beleco de tiuj sur la bildo, sed tio, pensis Lorenco Lam, ne tuŝas la esencon de la afero. Post tiu ĉi decido signifan parton de sia libera tempo li pasigis promenante ĉirkaŭ la Urba Monumento. Li spektis la virinojn kaj serĉis inter ili tiajn, kiuj plejeble similis tiujn sur la bildo. En la oficejo, eĉ en la domo oni jam parolis pri la strangaj promenadoj de Lorenco Lam, sed la eksperimento tiel absorbis lin, ke li eĉ ne aŭdis la klaĉojn. Fine li sukcesis trovi du virinojn, kiuj, se ne ideale, tamen taŭgis por la celo. Li ankaŭ aĉetis libron kun kartlud-reguloj, kaj ellernis preskaŭ ĉiujn. Dum longaj semajnoj atendadis, por trovi ambaŭ elektitajn virinojn sur la placo ĉirkaŭ la Monumento samtempe, sed iun vendredan posttagmezon li decidis ne plu atendi, kaj alparolis la nigraharan, kiu tiam troviĝis tie. Laŭ la priskribo de Lorenco

Lam evidentiĝis, ke ŝi bone konas la alian virinon, kaj baldaŭ ili interkonsentis, kvankam li ne eksplikis precize, pri kio temas, nur aludis pri speciala servo, por kiu li kompreneble pretas pagi laŭmerite. La virino promesis avizi sian koleginon kaj Lorenco Lam donis al ŝi sian adreson.

La renkontiĝo estis priparolita por sabatvespero. Sabaton posttagmeze Lorenco Lam aĉetis ĉion necesan, glasojn, trinkaĵon, cindrujojn plejeble similajn al tiuj sur la bildo. Reveninte hejmen, li ĉion preparis, kaj kiel ajn tio ĝenis lin, li ne surprenis sian hejman mantelon, eĉ, refaldis la manikojn de sia ĉemizo, kiel estis videble sur la bildo.

Precize laŭ la interkonsento, je la sesa horo oni sonorigis. Alvenis la du virinoj. Lorenco Lam iom embarasite rakontis al ili, kian servon precize li deziras. La virinoj ŝajnis ne multe miri, ili rigardis la bildon, fiksis la prezon, kiun Lorenco Lam kapjese akceptis, kaj rutinmove komencis senvestiĝi. Dum tiu sceno Lorenco Lam sentis strangan premon en la gorĝo, sed la kuriozeco de la situacio bone klarigis tion, ja dum sia vivo neniam li ankoraŭ vidis ion tian. Kiam ili finis, kaj sidiĝis al la tablo, Lorenco Lam ĝoje konstatis, ke la nigrulino – kvankam li ne avertis ŝin – surhavas ĝuste tian bluan kombinecon, kian la virino sur la bildo.

Ili interkonsentis ludi pokeron. Antaŭ ol komenci, la virinoj menciis, ke ili povos resti maksimume ĝis la naŭa. Lorenco Lam konsente kapjesis.

Lia embarasiteco malpliiĝis nur iom post iom, kaj eĉ ne malaperis tute. Pro manko de praktiko en la ludo li ĉiam perdis, sed tio ne ĝenis lin, li nur pensis pri tio, ke jen, la bildo nun vere viviĝis, kaj li povas sondi ĝian sekreton elinterne. Ŝtelrigarde li komparadis la du vivajn virinojn kun tiuj sur la bildo. La simileco ne estis malgranda, tamen, el la gastinoj mankis ĝuste tiu fosforeska vibrado kaj malpezeco, kiuj estis la plej karakterizaj trajtoj de la du pentritaj virinoj. Ankaŭ iliaj konturoj montriĝis iom malpli ravaj, malpli allogaj, tamen, ilia ĉeesto ŝajnis efiki. Lia agrabla maltrankvilo, ekscititeco fortiĝis, kaj tio estis bona antaŭsigno, ja la virinoj kreskigis en li ĝuste tiun senton, kiun origine elvokis la bildo. Je la naŭa la du virinoj vestis sin, ricevis sian monon, kaj promesiss reveni la venontan sabaton.

La sabatvesperoj ripetiĝis ankoraŭ multfoje. Lorenco Lam ne trovis la ŝlosilon de la mistero, sed li sentis esti ĉiam pli proksima al ĝi. La virinoj bone amuziĝis, ja plaĉis al ili la facila monakiro. Foje la blondulino pro vanteco jam ne eltenante la pasivon de Lorenco Lam, provis persvadi lin al pli konkretaj agoj, sed li rifuzis la proponon, kies akcepto ŝajnis al li sakrilegio. Ankaŭ la proponon de la nigra virino li malakceptis, nome, komenci la kartludon vestitaj, kaj post ĉiu partio devigi al la malvenkinto demeti unu vestopecon; vane ŝi klarigis, ke certe ankaŭ la bildo eternigas momenton de tia partio. Sur la bildo tio ne videblas, li fermis nervoze la diskuton, kaj la du virinoj eksilentis.

Dank' al la ŝparita konsiderinda sumo la sabatvesperaj kartludpartioj ne skuis lian financan ekvilibron, tamen lia havaĵo jam estis degelanta. Sed li ankoraŭ havis ne malgrandan sumon sur sia konto, kiam alvenis skribaĵo, kiu pli ol io ajn skuis lian ekvilibron, se ne la financan, do la animan. La letero venis de la advokato de la mortinta frato, kaj anoncis, ke laŭ ĵusa malkovro la bildo ne estis laŭrajta posedaĵo de lia frato, li aĉetis ĝin de ŝtelisto, do li, Lorenco Lam devas ĝin redoni antaŭ ol la polico komencos molesti lin. Lorenco Lam tuj vokis telefone la advokaton, poste la policon, kaj eĉ la laŭrajtan posedanton de la bildo, pruvis, argumentis, proponis aĉeti ĝin, sed vane, ĉiuj obstine kontraŭstaris lian klopodadon, kaj post kelkaj tagoj la bildo kun policista asisto estis forportita. Lorenco Lam tute malesperiĝis.

Sabaton vespere denove aperis la virinoj, kaj Lorenco Lam rakontis al ili la eventojn. Tiuj provis konsoli lin, ŝerce aludante, ke ili mem tamen estas tie, kaj virinoj vivaj ĉiam estas utiligeblaj pli celkonvene, ol pentritaj, sed Lorenco Lam estis nekonsolebla. Jam post unu horo li pagis al la virinoj, kaj forsendis ilin, dirante, ke ili ne plu venu, kaj tuj post ilia foriro ankaŭ li iris al la strato kaj aĉetis la detektivromanojn de la lastaj ok semajnoj. Reveninte al sia loĝejo, li serĉis la hejman mantelon, kiun dum la lasta tempo sabate neniam li uzis, kaj sternis sin en la fotelon por legi. Sed jam post dek minutoj li ĵetis la libron kaj fiksis sian rigardon al la muro, kie antaŭe pendis la bildo. Li streĉis la memoron por resorĉi ĉiun detalon, kaj la fantazion vidi ilin sur la muro, sed kun malmulta sukceso.

Lundon Lorenco Lam ne aperis en la oficejo. Posttagmeze oni telefonis al lia loĝejo, sed neniu respondis. Mardon matene la direktoro sendis oficiston por sondi, kio okazis al li, sed tiu vane sonorigis, neniu malfermis la pordon. Oni anoncis la aferon al la polico, kiu malfermis la pordon, sed la loĝejo estis malplena. Ĉiuj loĝantoj, kaj ankaŭ la domservisto estis pridemanditaj, sed neniu vidis lin foriri. Lorenco Lam malaperis sen postsignoj. La novaĵo elvokis grandan ekscititecon en la oficejo, sed post kelkaj semajnoj jam apenaŭ iu eldiris lian nomon. Nur la klaĉulinoj de la Malnova Kvartalo parolas foje-foje eĉ nuntempe pri freneziĝinta oficisto, kiu ŝtelis maldecajn pentraĵojn kaj ĉiusabate kunportis al sia loĝejo dek publikulinojn samtempe, sed oni ne multe kredas tiujn klaĉojn. La mistero de la malapero de Lorenco Lam restis nekonata por la postepoko, kiel li mem siatempe ne sukcesis malkovri la misteron de la bildo. Kaj kio okazis al la bildo mem? Nu, ĝia vojo ne estis pavimita per bonŝanco, ĉar la provinca vilao de la laŭrajta posedanto baldaŭ post la malapero de Lorenco Lam komplete cindriĝis. Kompreneble ankaŭ tiun akcidenton sekvis diversaj nekredeblaj onidiroj, tamen estas notinde, ke el la stranga pentraĵo eĉ peceto ne postrestis.

## SENKULPIĜO

Erare kunmetitaj alineoj ĝenis la komprenon de du artikoloj en la tria numero de nia revuo, sur la paĝo 88, ankaŭ la komenco de la novelo perdiĝis. Krome en la sama numero sur la paĝo 93 la presisto, ne komprenante esperante, ŝanĝis du bildojn kies surskribo jam estis antaŭe gluita. La sama eraro okazis ankoraŭfoje en la kvara numero sur la paĝo 135. En la tria numero sur la paĝo 113 el la tria kolumno la lastajn naŭ liniojn bonvolu legi en la komenco de la kolumno! Ni multe petas pardonon de niaj karaj legantoj! Ni ŝatus estonte kun multe da atento eviti ĉiujn similajn malagrablajn erarojn por ne misuzi vian komprenemon!

*La redaktoro*

# Ŝirmado de nia akvotrezoro

D-ro Ferenc László

La bona akvo estas unu el la plej ĉefaj bezonaĵoj de la homaro, elemento ne anstataŭigebla, sen kiu ne ekzistas vivo, nek evoluado. La akvo havas determinantan signifon en la formiĝo de la socia ekonomia evoluo, ja preskaŭ ĉiu aspekto de la multfaceta konekso inter homo kaj medio havas rilaton kun la akvocirkonstancoj.

La konekso inter socio kaj akvo esence montriĝas en tri formoj. Unuflanke en la utiligo de la akvoj, kiam ni ekspluatas ĝiajn proprecojn socie kaj ekonomie utilajn, kiuj ecoj kaŝiĝas en la aspektoj de la akvo, en ĝiaj biologiaj, fizikaj kemiaj kvalitoj. Aliparte tio montriĝas en la prevento kontraŭ nocoj de akvoj, kiam ni defendas nin kontraŭ la detrua forto, kaj kontraŭ damaĝoj de superflue amasa kaj ofte eĉ malbonkvalita akvo. Fine tio montriĝas en la ŝanĝo de la natura medio, kiam ni per homaj agadoj influas, evoluigas la naturajn akvocirkonstancojn, la kadron de la akvo kaj bordo.

Laŭ la karaktero de la utiligo, la akvouzo estas dividebla en du ĉefajn grupojn:

a) uzo de akvo por persona konsumo, por kontentigi rekte ĉiun akvobezonon de la loĝantaro (trinkakvo kaj hejmomastrumada akvo, – kaj tiu por refreŝiĝo, sanitaro kaj sporto, ktp.)

b) uzo de akvo por produkta konsumado, la utiligo de materiaj kvalitoj de l' akvo, de ĝiaj pozicia kaj kineta energioj: en la produkta procezo*de materiaj bezonaĵoj (en industria kaj agrokultura produktado, en akva transporto, utiligo de akvoenergio kaj geotermika energio, ktp.).

La rolo de la akvo estas multfaceta en la produktado kaj en la produkta konsumado. Preskaŭ en ĉiu branĉo de la produktado ĝi ĉeestas kiel objekto de la laboro, aŭ kiel ilo en la laboro.

*Ni uzas konsekvence: procedo: agmaniero per difinitaj rimedoj; procezo: natura sinsekvo de fenomenoj; proceso: juĝafero antaŭ tribunalo

## Prevento

La akvonoc-preventado estas dividebla en tri grupoj laŭ la karaktero de la malutilon kaŭzanta procezo:

a) ŝirmado kontraŭ damaĝa forto de l' akvo (protekto kontraŭ inundo, riverreguligo, aranĝo de fluejo, ŝirmado kontraŭ erozio, ktp.):

b) ŝirmado kontraŭ superfluaj kaj pro kvanto nocaj akvoj (ŝirmo kontraŭ grundakvo, inundo, drenado, ktp.):

c) 1. protekto kontraŭ noca polucio: – 2. preventi damaĝojn de poluitaj akvoj.

En la produktado kaj socia vivo povas ekhavi rolon ankaŭ la noca efiko de akvo: rivera kaj grundakva inundo, alta nivelo de grundakvo, erozio, poluakvo. La malhelpo de nociĝoj, protektado kontraŭ ili kreskigas la kostojn de mastrumado, kaj pretendas grandan socian materialan kunlaboron. Se la preventado ne estas kontentiga, tio danĝerigas la viv-, kaj havaĵ-sekurecon, povas fariĝi senpera, aŭ pera damaĝo, malpliiĝo de la sukceso de laborprocedoj,* eĉ la neniiĝo de havaĵoj. La prevento de akvaj damaĝoj kreskigas la realigeblan valoron de socia produkto. La poluita akvo limigas la utiligeblon de la akvorezervoj, nocas la homan organismon kaj naturan medion.

La ŝanĝo de la homa medio (biosfero), ĝia evoluigo per homa agado – la kresko de populacio, urbanizado, ekkultivado de novaj terenoj (senarbarigo, drenado, inundprevento), – evoluo de agroteknikaj metodoj, kreskanta akvoproduktado, forfluad-reguligo; prevento de akvonocoj, lokigo de forĵetaĵoj, enkonduko de poluakvoj en ricevan akvejon, ktp. – ĉiuj el ĉi tiuj provokas ŝanĝojn en la materiaj proprecoj de akvo kaj en la faktoroj influantaj la naturan cirkuladon de l' akvo. Tiaj estas ekz. temperaturo, ventdirekto, akvosorba kapablo, relativa akvovaporenhavo, ktp. Ties efiko aperas ankaŭ en la kvanto kaj kvalito de la utiligebla akvoprovizo. La celo

**Nia granda trezoro: la akvo. (Mineralakvo „Parádi")**

**Teknologia ekzameno de poluakvopurigo en laboratorio**

de tiu agado estas esence la evoluigo de la akva medio, la plenumo de mediaj pretendoj de la socio en rilato de akvomastrumado.

Dum la socia-ekonomia evoluo kontinue malpli eblas difini akran limon inter la nomitaj sferoj de akvo. Tiuj interrilatas ĉiam pli strikte teknike, ekonomie kaj medie. Paralele kun la socia-ekonomia evoluado ĉiam pli kaj pli graviĝas la pritaksado de la rolo de akvo rigardate de socia-ekonomia flanko. Tio estas atribuebla al tiu fakto, ke la akvobezonoj akcentite prezentiĝas en diversaj branĉoj de l' popolekonomio, kreskas tiaj efikoj de la sociaj ekonomiaj kategorioj, kiuj influas la utiligon de la akvotrezoro. Tiaj estas ekzemple la kemiaĵ-aplikado en agroekonomio, la kreskanta energio-ekuzo, produkto de defalaĵoj kaj ties lokigo, koncentriĝo de enlanda koloni-retoj kaj de industrio, ktp. Krom tiuj kreskas la pretendoj necesaj al utiligo de akvorezervoj, kaj la pretendoj direktiĝantaj al alia branĉaro de popolekonomio, ekz.: energio, tero, industria fono, ktp.

## Homo kaj naturo

La supraj faktoj pruvas, ke la vivo de la homo kaj lia multdirekta aktivado estas daŭra intervenado en la naturajn kaj hidrologiajn procezojn.

Ĉiu tiaspeca enmiksiĝo, – eĉ tiam, se ĝi estas utila – rompas la naturan ekvilibron, kreas ŝanĝojn, kiuj ofte estas sekvataj per nocaj efikoj.

La intenseco de homa interveno en la hidrologiajn procezojn daŭre pliiĝas. Impete multiĝas la virkoj koneksaj kun tio. Tiel la akvorezervojn kaj simile la hidrologiajn fenomenojn *modifantaj homaj agadoj* montras kreskantan tendencon por disvastiĝo.

Je efiko de la diversaj homaj intervenoj kunligiĝas la akvomankaj terenoj kaj tiel kaŭzas problemojn por grandaj regionoj.

La loĝantara, industria, agrokultura akvobezonoj rapide kreskas. Tiujn bezonojn kontentiginte, la *uzitaj akvokvantoj* – pli – malpli poluitaj – *revenas en la saman naturan akvorezervejon* (akvofluoj, lagoj, subteraj akvoj), kiuj servas unuparte kiel fontoj de akvoprovizado, aliparte iukaze povas doni eblecon por akvoborda refreŝiĝo, sportado. Tio estas necesa ankaŭ por konservi la naturan medion. Por plenumi la multspecajn pretendojn al kvalite konvena akvo, – estas respektenda tasko protekti la akvorezervojn kontraŭ polucio.

Je la efiko de impeta grandiĝo de la akvobezonoj, kaj pro la malfavora teritoria kaj tempa dislokiĝo de la akvoprovizoj, – la lokaj akvorezervoj pli kaj pli elĉerpiĝas. Akvomanko prezentiĝanta sur iu teritorio – krom la malfacilaĵoj de la akvoprovizado plagantaj la loĝantaron, – povas iĝi ankaŭ baro de la socia-ekonomia evoluo. Tial ankaŭ protekto de la akvoprovizaj kvantoj estas grava medioŝirmada tasko.

Kune kun la kresko de la organikaj kaj neorganikaj materioj eniĝantaj en la akvoprovizojn, malkreskas la oksigenprovizo de la surteraj akvoj. Malfavoraj efikoj atingas ankaŭ la subterajn akvoprovizojn, kaj kvante kaj kvalite. Ĉefe la impeta industria evoluo, la pliiĝo de la urbanizado kaj kemizado de agrokulturo kaŭzas malboniĝon de akvokvalitaj cirkonstancoj tutmonde en mezuro klare pruvebla. Tio estas la klarigo, ke la akvo, kiel unu el la bazaj elementoj de la natura medio bezonas vastasferan, antaŭvideman kaj konsekvencan protektadon. La akvoprovizojn oni devas tre pripensite manipuli kun granda sekureco. Sole per zorga antaŭvidemo, multflanka konsiderado estas eble ĝuste kaj en necesa tempo disponi, kaj gardi la socion de la sekvoj de malfrua agado, kiuj estas tre multekostaj kaj kelkfoje neripareblaj.

## Socio kaj ekonomio

La pritaksado de la socia-ekonomia rolo de la akvotrezoro esence estas kunligita kun la socia-ekonomia evoluo kaj kun la *reciprokeco, kiu ekzistas inter la cirkulado de la akvo en la naturo kaj en la socio.* Karakterizilo de tiu reciproka efiko estas, ke dum la socia-ekonomia evoluo *la signifo de la socia cirkulado de l' akvo daŭre kres-*

**Virko konstruita por ŝirmado de riveret-fluejo**

*kas* kompare kun la cirkulado en la naturo. Baza tasko de la akvomastrumado estas la direktado de tiu efikreciprokeco, harmoniigo de la du cirkulad-procedoj, – kun plej bona efikeco reguligi ilian konekson sisteme, teknike, ekonomie. Tiel – en ĝenerala koncepto – la *akvomastrumado estas sistema, scienca, ekonomia, teknika kaj administra agado por la optimuma harmoniigo de la sociaj bezonoj* kun la natura akvobilanco. Do la akvomastrumado estas konscia kaj laŭplana fak-aktivado de la socio por certigi al la socio la ĉiutempan kontentigon de la akvobezonoj kaj protekti la naturan medion rilate al la akvo. Tion ĝi efektivigas per teknikaj virkoj, teknologiaj procedoj, medion evoluigaj kaj protektaj metodoj, organizaj kaj juraj – uzante energi-fontojn disponatajn far la socio.

Tiu koncepta difino de la akvomastrumado enhavas tuton de la agadoj celantaj sisteman reguligon por la kunligo de socio kaj akvocirkonstancoj. Tiu koncepto konsideras parto de akvomastrumado krom la teknikaj funkcioj ankaŭ la koneksajn ekonomiajn, jurajn, administrajn kaj mediajn aktivadojn.

Esenco de la mastrumado estas, – kiu ajn aktivado estu ĝia celo: *celkonscia organizado de la ekonomiaj operacioj* uzante ekonomie, racie la disponeblajn necesaĵojn kaj laborfortojn. La celkonscia organizado direktiĝas al la kreo de plej favora interrilato inter la celoj (rezultoj) kaj aktivadoj (iloj). Ĝi klopodas atingi tion per plej malgranda pendediĉo aŭ per plej granda socia-ekonomia rezulto sur difinita nivelo. El tio sekvas, ke en la mastrumado kun la akvo, la akvo rolas kiel ekonomia faktoro de socia efiko. Aliflanke la akvomastrumado, kiel scienca agado, konekse kun la supraj, ekzamenas la rilatojn inter la sociaj bezonoj kaj akvo kaj la funkcion de la akvo, plenumatan en la socia-ekonomia vivo.

*Bazdona celo de la akvomastrumado estas do – kiel parto de la tutsfera ekonomia agado de la popolekonomio – servi la socian-ekonomian evoluon per la laŭeble plej racia kontentigo de vastasfere difinitaj akvobezonoj:* akvoutiligaj, akvodamaĝojn anticipaj kaj medi-evoluigaj pretendoj. La plej racia kontentigo inkluzivas samproporcie kontentigon de la pretendoj de tipoj „priservado" kaj „reguligo".

La akvomastrumado realigas la reguligon de la natura kaj socia cirkulado de la „akvotrezoro" per solvo de la evoluaj antinomioj, devenantaj el la reciproka efiko de la du cirkuladoj. *Bazdonaj antinomioj* estas la sekvaj:

– pro la rapida kaj konstanta kresko de la akvopretendo de la socia-ekonomia evoluo, la *natura akvorezervo* – interne de la iom grandaj areoj kaj *dum longa tempo esence estas konstanta;*

– kreskas la diferencoj inter la spacaj kaj tempaj ŝanĝoj de la naturaj akvorezervoj kaj inter la pliiĝantaj akvopretendoj;

– sur la teritorioj de plej granda akvopretendo kune kun tiuj pretendoj samtempe kreskas la danĝero, ke poluiĝas la naturaj akvoj kaj ke la akvan medion misas la civilizacio. La homa interveno reagas je la natura medio, en multaj kazoj noce influas la naturan reproduktadan procedon de l' akvo, la biosferon, la reuzeblecon de akvoj; montriĝas diferenco inter la rimedoj necesaj por plenumo de la akvomastrumadaj taskoj, kaj la rimedoj disponeblaj.

Dum la socia-ekonomia evoluo la utiligo de akvorezervoj bezonas ĉiam pli kreskantan kvanton de rimedoj.

Per laŭplana akvomastrumado estas solveblaj la supre menciitaj antinomioj. Tiel la akvomastrumado pli kaj pli iĝas unu el la baze gravaj ekonomiaj agadoj de la socia-ekonomia evoluiĝo. Hodiaŭ jam preskaŭ sur ĉiu terenparto de la popolekonomia taskosistemo ĉeestas la parte produkta-servanta, parte infrastruktura aktivado.

## Cirkulado de akvo

La materiaj kaj biologiaj proprecoj de la akvo-cirkulado, ties ekologia* rolo, la kresko de la sociaj, teknik-ekonomiaj pretendoj, la relative malgranda kvanto de dolĉaj akvoj, la sanitara rolo de akvo, multflanka danĝeriĝo de ĝia kvalito postulas, ke en la uzebleco, manipulado kaj zorgado de akvoprovizoj, vaste validiĝu la modernaj ekologiaj principoj.

En ties intereso oni devas rigardi grava postulaĵo inter aliaj la sekvajn:

– la hidroteknikaj konstruaĵoj (virkoj)grandigu kaj ne malpliigu la efikecon de tiuj sekurigaj mekanismoj, kiujn la naturo konstruis ne nur kontraŭ la detrua efiko de la akvo, sed ankaŭ por ĝia utiligo kaj por konservo de ĝia natura kvalito;

– la decidojn rilatantajn por kunligo de la akvosistemoj oni devas antaŭe pritaksi, ke estu konstateble: por eviti la eblajn nocajn efikojn, – kiuj disponoj estos farotaj;

– la aranĝadon de akvoj, kanalizon de fluakvoj, reguligon de akvouzado, la kvantan kaj kvalitan ŝarĝadon de la akvoj ĉiam anticipu ekologia, hidrobiologia kaj region-ekologia konsiderado.

– Ju pli grandmezura intermiksiĝo okazas en la originalaj akvomastrumaj rilatoj, des pli vastasfera kaj radikala ekologia esploro anticipu la prilaboron de studprojektoj, respektive la preparon de decido:

*ekologio: rilato inter vivuloj kaj medio

**Vespere sur la rivero**

– la metodo kaj ilaro de la elkonstruado de bordo kaj fluejo maksimume servu la mempurigan kapablon de la akvo;
– estas atingende, ke rilate la lagojn, rezervujojn, akvofluojn elkonstruiĝu interne de fizika-kemia kontrola kaj inspekta organizaĵo *krom la akvokvalit-kontrolado* ankaŭ la sistemo de *biologia kontrolo.* Tio povas liveri fidindajn indikojn konekse kun la ŝanĝoj en la akvaj organizaĵoj kaj en la dinamiko de populacio, krome ekz. per signado pri akumuliĝo de pez-metaloj kaj aliaj nocaj procezoj en la akvo, en akvaj plantoj kaj ankaŭ en ŝlimo;
– akcelenda estas la kreo de ekvilibro inter akvorezervoj kaj akvobezonoj, eĉ per malpliigo de la akvopretendoj, unuparte evoluigante pli akvo-ŝpareman teknologion kaj ties ekfunkciigon, aliparte pliigante la ripetitan uzeblecon de akvo.
– Tiun lastan oni devas pliigi unuparte per turnigo de la akvo en la fabrikoj, uzinoj, aliparte per dislokigo de la akvouzantoj en difinita sistemo laŭ la akvofluoj;
– grava teknika farendaĵo estas la pliigo de la grado de efikeco en la purigaj instalaĵoj kaj per tio la pliigo de la ripetata reuzado;

**Ŝirmado kontraŭ oleonoco**

– baza postulaĵo estas tiel transformi kaj regule bonteni la kompleksan sistemon de la jura kaj ekonomika reglamento, ke ĝi povu efike servi la kvantan kaj kvalitan protektadon de l' akvoj;
– se ni volas, ke nia patrio evitu la *akvokrizon,* oni devas sur ĉiu ekonomia tereno envicigi organika parto de la taskoj de planado kaj esplorado, la ekzamenadon de la akvorilataj kvantaj, kvalitaj kaj energetikaj pretendoj. Ĉiujn tiujn oni devas meti ellevita tasko en la sociaj procedoj kaj evoluo (demografio, sociologio, urbanistiko,* ktp.), krome ankaŭ rilate al la industria evoluo, alkalkulante ankaŭ la industriecan evoluon de agrokulturo. Dum mallonga tempo estas atingende, ke estu konataj jam kelkajn jardekojn antaŭe almenaŭ la limvaloroj de kvantaj kaj kvalitaj karakteriziloj, (kaj ankaŭ la direktoj) postulataj de socia-ekonomia flanko rilate la akvojn. Nia regado super la akvoj povas prosperi nur en tia grado, en kiu grado riĉiĝas niaj konoj. La akvo kompleksi influas nian ekziston, necesas do, ke ankaŭ niaj konoj pri ĝi estu kompleksaj;
– komplekse ekzameno de la komplikitaj koneksoj de akvo, homo, ekonomio, natura medio urĝe postulas apud efika kultivado de teknikaj, juraj, biologiaj esploroj ankaŭ tiun de hidroekologiaj esploroj.
Kontraŭ tiudirektaj esploroj anonciĝas kiel grava pretendo tio, ke utiligante la eblecojn prezentitajn far la ekonomiko, ekonomi-matematiko, sistemteorio kaj aliaj sciencobranĉoj, krome ties metodojn, – intensive prosperigu la solvon de praktikaj problemoj de kvanta kaj kvalita mastrumado, interdependaj kun la akvorezervoj kaj kun la ellaborado de decidaj variantoj, ktp.;

*urbanistiko: sciencobranĉo pri urbkonstruado, urb-aranĝado kaj vivmaniero, vivmedio de urbegoj



**Poluakvo-purigejo**

– la pretendoj rilate multe- kaj interdisciplinaj esploroj estas grandaj kaj tio sekvigas post si la plivastigon de koneksoj inter la esplorlokoj, estigon de ties novaj, elastaj formoj, krome la pliigitan kunordigon de la esplorlaboroj, kaj ties koncentrigon por praktikaj taskoj:
– grava tasko konekse kun la protektado de akvo estas ankaŭ tio, ke kiel eble plej frue iĝu ĝenerala praktiko en ĉiu tavolo de la socio la protektaj kaj evoluigaj procedoj estiĝintaj laŭ la ĝusta ekologia aspekto, Ties nemalhavebla kondiĉo estas, ke la instruado, la plustudado sisteme okupiĝu kun la konigado de la rolo de akvo, akcentante, ke dum la evoluado tiu grava elemento – el nelimita donaco de la naturo iĝis limigite disponata natur-trezoro. Ĝi estas en niaj tagoj starigebla en la servon de la socio en la dezirata tempo kaj loko nur per signifaj kaj daŭre altiĝantaj elspezoj.

El la supra ne kompleta mallonga resumo estas videble, ke en ŝirmado de niaj akvoj necesas multdirektaj teknikaj, ekonomiaj registaraj disponadoj. Tiuj kolektive povas alporti en sociaj mezuroj la deziratan rezulton.

## Disponoj internaciai

La akvomastrumado estas unu el tiuj Hungariaj fakbranĉoj, kiuj jam ankaŭ en la paseo faris iujn disponadojn en intereso de medioprotektado. La kompleksaj hidrologiaj, sanitaraj ktp. leĝoj de la antaŭaj jardekoj preskaŭ senescepte enhavis akvoŝirmadajn alineojn, paragrafojn. Tiel ekz. la leĝartikolo X/14 el j. 1840 deklaras la sekvajn:

*„...estas malpermesite ĵeti sterkon aŭ teron en la akvojn aŭ fluejojn (de irigaciaj kanaloj), aŭ kanabon rui en ili,- sub puno de 100 Ft, aŭ unu monata karcero...”*

Ne malpli severa estis la 1885-jara leĝo XXIII/24., en kiu estas legebla: *„Malpermesite estas infekti la akvojn per nocaj materioj. Ke inter la disponadoj kiuj necesas por tio, ke el fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj ne estu enlaseblaj defalaĵoj aŭ poluitaj akvoj en aliajn akvojn: en tiu rilato laŭ postulaĵoj de la publika sanitaro kaj laŭ la ekzistantaj posed-uzadoj la aŭtoritatoj disponas.”*

En intereso de akvoprotektado pluraj landoj simile disponis. En Anglio jam en 1866 estiĝis *Rivers Pollution Comission* (River-polucia komisiono), kaj en 1876 aperis ankaŭ la angla Akvoprotekta Leĝo *(Rivers Pollution Prevention Act).* En dua duono de la pasinta jarcento la tiamaj grandindustriaj landoj – ekz. Francio, Germanio, Svisio, Belgio – laŭvice aperigas oficialajn ediktojn pri akvokvalit-protektado. Ankaŭ en antaŭrevolucia Rusio estis leĝoj enhavantaj akvokvalit-protektajn disponadojn. *Petro la Unua,* rusa caro donis ukazon (1719.jul.1.), laŭ kiu ĉiu, kiu poluas la akvon de rivero *Nevo* per balaajo, aŭ alia malpurajo estos punota per knuto, aŭ Siberia ekzilo. La Rusia kriminala kodo aŭspiciis areston de 7 tagoj ĝis 3 monatoj kaj monpunon ĝis 900 rubloj por kulpintoj en akvopolucio.

Rilate la proksiman paseon kaj niajn tagojn, ni povas konstati. ke kompare kun la pli fruaj tempoj tre multiĝis tiuj disponoj, kiuj celas protekton de la akvoj. Tio ja estas komprenebla, ĉar la civilizacio, la evoluigo de industrio, agrokulturo, kaj la granduzina* bredado, kaj ne lastvice koncentrigo, de la homaj koloniigoj, – la urbanizacio danĝerigas unuavice kvaliton de la akvoj.

La esencon de la akvokvalitŝirmado en Hungario kreis la dekreto registara 1/1961. De tiam aperis pluraj jurnormoj, kiuj servis pliigon de efikeco de akvokvalit-ŝirmado kaj de tiucela organizaĵo, respektive reglamentis ĝin kaj

*uzino: ni plivastigas la PIV-an sencon pri metalfabrika entrepreno je entrepreno ekonomia, agrokultura, industria, produktanta diversajn varojn pogrande, uzanta krom homa forto maŝinaron: teksaĵ-, paperaĵ-, metalaĵ-, lignaĵ-, nutraĵ-, konservaĵ-, sukeraĵ-, ktp. varojn. Fr. 1. usine; G. der Betrieb; H. üzem; I. azienda, esercizio

rezultigis plivastigon de ĝia agado. La plej laste emisiita instrukcio (3/1974.OVH) en sia suplemento enhavas la bazprincipojn kiuj donas detalan direktivon al la Hidrologia Direkcio kaj Kanaluzinoj resp. al ties fakbranĉaj organizoj rilate la du jurnormojn pri poluakvo-punmono (1/1969 OVH) kaj kanal-punmono (2/1970 OVH). Tiuj nun validas kaj rilatas al surloke farendaj kontrola, poluakvo-ekzamena kaj ekspertizaj laboroj.

El vidpunkto de akvoprotektado havas distingan signifon nia antaŭ nelonge aperinta (1976/11) leĝo pri la protekto de homa medio, al kiu ĝi donas komplekse juran protektadon.

## Kotizoj, punoj

La akvokvalitaj jurnormoj pri la ekspluat-kotizo de la akvoprovizo kune kun aliaj akvokotizoj konsistigas instigan ekonomian regulig-sistemon por protektado de la kvalito kaj kvanto de l' akvoj.

La ĉefaj konsisteroj de reguliga ekonomia sistemo instiganta por protektado de la akvokvalito, resp. por la moderna, ŝparema akvomastrumado estas la sekvaj: *poluakvo-monpuno, kanal-monpuno, ekspluatkotizo* de *akvoprovizo, publik-uzina kotizo* de *trink- kaj industri-akvo, trinkakvo-uza kromkotizo kaj punkotizo pro akvomisuzo.* Sube estu resumataj tiuj „instigiloj".

Pri la kondiĉoj de la punpagoj difinotaj kontraŭ tiuj, kiuj noce *poluas la naturajn akvoprovizojn,* disponis la unuan fojon la registara jurnormo en 1961. Tiu jurnormo difinis la grandec-gradojn de punmono kaj la gradon de nocaj komponantoj. La sistemon de poluakva monpuno igis pli severa la nova hidrologia leĝo en 1964, poste en 1969 la registara jurnormo, resp. la disponado de Landa Hidrologia Oficejo (OVH). Laŭ tio en la unuaj du jaroj de la mon-punado la poluantoj pagos nur la plej malaltan sumon (bazan monpunon). En la tria jaro oni devas prijuĝi duoblon, en la kvara jaro trioblon kaj en la kvina jaro kvinoblon de la baza poluakvo-puno.

Tiuj uzinoj, kiuj enlasas siajn poluitajn akvojn en la publikan kanal-reton, kaj per tio pere poluas la naturajn akvoprovizojn, devas pagi *kanal-monpunon.* La grandec-gradon de la monpuno difinas la kanalvirko-entreprenoj laŭ la preskribo de la rilata regulo (dispono 2/1970 OVH).

Pro la uzopreno de la naturaj akvoprovizoj surtera akvo, subtera akvo) – depost 1968. jan.1. – la akvouzantoj devas pagi *ekspluatkotizon de akvoprovizo,* kio instigas je pli ŝpara akvomastrumado, per tio servante la akvoprotektadon rilate la akvokvanton. La pagendaj kotizoj diferencas laŭ teritorioj: Danubo, Tiso, subteraj akvojktp. –, respektive laŭ la uzantoj de akvo: komunumaj akvovirkoj, industribranĉoj, ktp. La sistemo de la *publikuzinaj akvokotizoj, kromkotizoj* kaj *punmonoj* servas por protekti la akvokvanton de trinkakvo-provizoj por la loĝantaro kaj por uzinoj (nutraĵindustriaj, farmaci-industriaj, ktp.) – per akvoj naturaj, aŭ purigitaj.

Por la akvoj liveritaj de publikuzinaj virkoj la uzantoj pagas diversajn bazkotizojn laŭ teritorie diferencigitaj kvin kategorioj. La loĝantaro ricevas la akvon pli malkare ol ĝia produktokosto. La diferencon saldas la stato per dotado.

La uzinoj, aĉetantaj publikuzinan trinkakvon, pagas *trinkakvo-uzan kromkotizon.* La alteco de kromkotizo varias laŭ teritorioj. Kompreneble la kromkotizo ne koncernas la krudan trinkakvon, produktatan de publikaj industriaj virkoj, ja la uzad-prezo de tiu akvo estas proporcia kun la propra produktadkosto.



**Akvorezervujo** *Lázbérc*

La uzinoj, aĉetantaj trinkakvon en granda kvanto, devas kontrakti pri akvoliverado kun la publikserva akvouzino. Depende de tio, kiom alte estis transpasita la akvokontingento difinita en la kontrakto, estas eble devigi la entreprenon pagi punon akvokotizan, kiu estas pluroblo de la bazkotizo.

Por ŝirmi la *kvaliton de la akvoprovizo* la juraj, ekonomiaj kaj organizaj disponadoj en la pasintaj unu kaj duonaj jardekoj alportis la sekvajn rezultojn:

Je la efiko de la ekonomia regulig-sistemo (poluakvomonpuno, kanal-monpuno) – stimulanta la protekton de akvoj, – akceliĝis la konstruado de kanalizaj-poluakvopurigaj establaĵoj. La vigliĝo de la investada aktivado estas observebla precipe ek de la enkonduko de la progresiva poluakvo-, resp. kanal-monpuno.

La rapida progreso de la kanalkonstruadoj rezultis la malpliigon de procento-kvantaj proporcioj de la ellasitaj nepurigitaj poluakvoj. Tiel malakceliĝis la poluciiĝo de akvoj.

En 1965 estis lanĉitaj planoj en la kadro de programo de regiona akvokvalit-protektado por la pleje poluitaj akvorezervujoj de la lando. Tiuj planoj devas enhavi tiajn ampleksajn konceptojn, ŝirmantaj la akvokvaliton, kiuj estas apogitaj per teknikaj, ekonomiaj esploroj. Tiuj konceptoj difinas la hodiaŭajn kaj futurajn akvoprotektajn taskojn sur la koncernaj teritorioj.

Kun la najbaraj landoj ekzistas ambaŭflankaj hidrologiaj konvencioj, en kies kadro jam montriĝas rezultoj sur tereno de internacia kunlaboro. Kelkaj el tiuj: esploroj de limteritoriaj akvoj, antaŭsignado de neatenditaj polucioj.

Tiuj rezultoj estas signifoplenaj, tamen ne permesas memkontentan ripozon, ja la danĝerminaco multe pli rapide povas kreski, ol niaj ĝis nun adaptitaj rimedoj kaj metodoj estus sufiĉantaj por anticipado en la estonteco.

Ankaŭ ĉi-okaze estas danĝera la tro „strikta" pensmaniero. La protektado de la akvokvalito nome estas grava, sed ne ekskluziva tereno de la akvoprotektado. La kvantaj kaj kvalitaj komponantoj konsistigas nedisigeblan komplekson, kaj ili reefikas unu la alian. La modifiĝo de la kvantaj akvomastrumadaj komponantoj – eĉ en kazo de neŝanĝitaj mediaj polucioj – povas turni kriza la ĝis tiam bonan, aŭ akcepteblan situacion, kaj la kvalita ŝanĝo povas krizigi la proviz-mastrumadon.

Tr. A *Pechan*

# HUNGARA DOLĈAĴINDUSTRIA ENTREPRENO

# interesa laboro...



## MEDIKAMENT-FABRIKO

CHINOIN

Ĝi ofertas bonajn eblecojn por ellernado de fakoj.
Knaboj povas anonci sin metilernanto pri fakoj medikament-fabrikista (kemiista), serurista, veldista, elektrista, tornista, tubomuntista.
Knabinojn ni akceptas pri fako medikament-fabrikista (kemiista).
La metilernantojn pri fako medikament-fabrikado ni instruos en modernaj porpraktikaj laboratorioj kaj medikament-industriaj instrumetiejoj.

En nia boatejo (sur la kajo de Danubo „RÓMAI PART" por niaj metilernantoj ni zorgos ankaŭ pri senpagaj sportiloj.
NIA ADRESO: CHINOIN GYÓGYSZERGYÁR OKTATÁSI OSZTÁLY
Budapest, IV. Tó u. 1-5. Telefono: 690-900/531 substacio
kaj CHINOIN NAGYTÉTÉNYI GYÁREGYSÉG SZEMÉLYZETI OSZTÁLY
Budapest, XXII. (Nagytétény), Bányalég u. 2.
Koresponda adreso: 1325 Budapest, Pf. 110.




## Tolstoj kaj lia sekretario

*Leo Tolstoj. La homo, verkisto kaj la reformisto. Verkis: Victor Lebrun. Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno (Italujo), 1978. 402 p., plus 23 fotopaĝoj, 20 cm. Prezo: 40,– ned. gld. (Por Hungario 400,– forintoj).*

Dum la lastaj jaroj multe oni povis aŭdi pri tiu ĉi libro, kies aperon avide atendis ĉiuj esperantistoj, ja la speciala rilato de Tolstoj al Esperanto estas fakto vaste konata. Fragmentoj el la verko jam aperis en pluraj revuoj, sed ili fakte ne povis doni imagon pri la tuta libro de la franca aŭtoro, kiu naskiĝis en la jaro 1882, kaj li mortis 97-jara dum la pasinta somero.

Li estas filo de franca fervoja inĝeniero, laborinta en Ruslando, kiu sekve edukis la filon en du lingvoj: la franca kaj la rusa. Kiel junulo, li sendas leteron al Tolstoj, dankante la genian verkiston pro ties verkoj, kaj lanĉante kelkajn problemojn de sia privata vivo. Tolstoj afable respondis al la junulo, provis doni al li konsilojn, kaj el la hazarda kontakto evoluis sincera amikeco inter la famekonata verkisto kaj la profundpensa, sentema franca junulo. Victor Lebrun povas fieri ankaŭ pri tio, ke li estas adresito de 20 leteroj de Tolstoj.

La plej interesa parto de la libro estas nepre la unuaj 185 paĝoj, sur kiuj la aŭtoro rakontas pri siaj personaj kontaktoj kun la rusa verkisto, kaj pri la plurjara sekretariado apud li. Oni ricevas tute unikan bildon pri la aĝa verkisto, ja tiun bildon desegnas kritikema franca liberpensulo, kiu tamen plene posedis la rusan kulturon, kaj konis la socian kaj psikologian grundon, el kiu elkreskis tiu ĉi unika figuro de la mondliteraturo. La subtitolo de la libro diras: „La homo, la verkisto kaj la reformisto." Tamen Lebrun unuavice interesiĝas pri la *homo* kaj la *reformisto*. Tio estas tre utila, ja la publiko sufiĉe bone konas la *verkiston*, sed havas malmultajn konojn pri la *homo* kaj la *reformisto*. Kompreneble, oni multe povus diskuti pri iuj aspektoj de la pensaro de Tolstoj – ofte mem Lebrun faras tion – sed estas sendube, ke temas pri personeco sugestia, kiu kun malofte spertebla konsekvencemo volis vivi fidele al siaj principoj. Oni bedaŭras nur tion, ke mankas iuj pli firmaj kaj detalaj indikoj pri la sinteno de Tolstoj al Esperanto.

En la dua parto de la libro Lebrun kvazaŭ resumas siajn spertojn, kaj prezentas al ni sistemigite diversajn aspektojn de la personeco kaj agado de Tolstoj. (Jen, specimene kelkaj titoloj de ĉapitroj: *La Pedagogo, La Religia Reformisto, La Moralisto*, ktp.) En tiuj portretoj la aŭtoro ankaŭ interpretas plurajn Tolstojajn verkojn. Ĝenerale, tiu ĉi parto de la libro laŭ sia karaktero pli-malpli similas Tolstoj-monografiojn, kaj pro tio ne tiel katenas la atenton, kiel la sensaciaj unuaj ĉapitroj.

Lebrun faras superrigardon pri la tuta verkaro de Tolstoj, kaj faras rekomendojn reeldoni pecojn, kiujn li trovas aparte valoraj por la nunaj generacioj. (Temas unuavice pri filozofiaj-moralismaj traktaĵoj.) Kiel aldono aperas studinda informo pri la divido de la familia havaĵo de Tolstoj inter la heredintoj.

Tiburcjusz Tyblewski – kiu verkis antaŭparolon kaj notojn por la verko – diras jene al la leganto: „Vi tenas raran libron." Vere, tiu ĉi libro estas rara, ja malmultas okazoj, kiam esperantisto povas pasigi jarojn en la proksimo de giganto de la universala kulturo, rigardi lin tra sia specifa lupeo, kaj raporti pri siaj spertoj al ni. Esperantistoj nun sentu sin privilegiitaj – ili povas legi unuaj tiun ĉi unikan verkon, kies pola eldono cetere jam estas en preparo.

La Eldonejo Gabrielli meritas profundan dankon pro la granda entrepreno kaj la bela preso de la libro.

V. *Benczik*




## Solida literaturhistoria krestomatio

*Baza Literatura Krestomatio. (128 ĉerpaĵoj el la verkoj de 56 esperantaj aŭtoroj.) Redaktis: Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979. 266 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld. (Por Hungario: 35,– forintoj.)*

Unu el la furor-libroj de la pasinta dekado, *Paŝoj al plena posedo*, ricevis sian konkuranton. Nia postkursa literaturo riĉiĝis je titolo tiakoncepte ĝis nun ne ekzistinta. Kvankam enkonduke Benczik deklaras la verkon „akompana libro de la literaturhistoria parto de *Gvidlibro por supera ekzameno*" ĝia memstara rolo ne dubeblas. Ĝuste tial oni deziras ĝin kelke pli kompleta:

1. mankas koncizaj aŭtoraj informoj (laŭ la modelo de *Esperanta Antologio);*
2. mankas la bibliografiaj indikoj pri la ĉerpaĵoj (ebligantaj rektan fontaliron);
3. mankas koncizaj resumoj ĉe la roman-ekstraktoj.

Kaj, ĉu ne, en nia postmita epoko, jam eblus rezigni ke Maŭra estas „verŝajne pseŭdonimo" (p. 137), ĉar Waringhien, eksprezidanto de la Akademio, lasis mem fali la maskon. Kaj kial Johan Valano (p. 248) ne refariĝu Claude Piron kaj Lorjak (p. 245) Mahé?

Pri la selekto mi bedaŭras du mankojn: Peneter kaj japanaj aŭtoroj (oni ne donu tro monolitan karakteron al Miyamoto).

Sed ĉio ĉi estas de minora intereso. De nun ni disponas solidan literaturhistorian krestomation kiu sendube sukcesos salivumigi la novajn esperantistojn kaj ĉiĉeroni ilin tra la labirinto de nia literaturo.

Reinhard *Haupenthal*

## Ĉu eblas reciprokigi la kulturojn?

*Sarkasme kaj entuziasme. Esearo de Miyamoto masao. Eldonis: La Kritikanto (Japanujo), 1979. 51 p., 21 cm. Prezo: 18,– ned. gld.*

Venis esearo el la Ekstrema Oriento far Miyamoto masao, *Sarkasme kaj Entuziasme.* La aŭtoro estas la plej fama laboranto de nia kulturo en Japanio, kaj eble en la tuta Azio. La unua kaj ĉefa temo de liaj eseoj estas la internacieco. Li plendas pri la troa Eŭropeco de nia lingvo, atribuante ĝian nesufiĉan disvastiĝon al tiu ĉi trajto. Estimindas la sinteno de homo, kiu strebas al vere internacia – laŭ li interpopola – lingvo, kaj surbaze de tiu ĉi postulo li kritikas Esperanton, serĉante la problemojn iam eble ne tie, kie ili fakte kuŝas. Ĉar se per Esperanto interkomunikas idoj de malproksimegaj popoloj, ĉu gravas la problemo de Miyamoto, nome kiun devenon havas vortoj aŭ gramatikaĵoj de tiu ĉi idiomo? Ankaŭ la aŭtoro subkonscie sentas tion, ĉar lia celo estas ĝuste „reciprokigi la kulturojn" per Esperanto. Tial li diskutas, eĉ preskaŭ disputas kun diversaj esperantistoj pri diversaj temoj: pri neologismoj, pri neŭtraleco, pri misinformoj el la historio de la japana Esperanto-movado ktp. Kaj tial li kritikas originalajn verkojn, tradukojn, recenzojn kaj eĉ la Plenan Ilustritan Vortaron.

En la eseoj aperas japano, kiu ne plu estas tradicie-japaneske ĝentila, sed kiu eĉ tro forte kaj krude defendas sian *japanecon* kontraŭ (imagita?) troa Eŭropeco de Esperanto kaj Esperantio. *Sed li ne estas japano en la tradicia senco.* Li estas simbolo de nia movado: homo, samtempe naciano kaj membro de la societo „ne disŝirita rase, gente, sekte". Pri tio atestas liaj pensoj, opinioj, kiuj montras homon ege influitan de la t.n. „Eŭropa" kulturo.

Kaj fine: plej gravas, ke Miyamoto per siaj ŝokantaj opinioj, ofte eĉ malpravaj, instigas diskuti, disputi kaj plej grave: pensi, kiel tion rimarkis ankaŭ Vilmos Benczik, la postparolanto de la eseoj. Tiamaniere povas naskiĝi ekzemple artikoloj kaj studoj far Claude Piron, kie li bonege montras la lokon de Esperanto inter Eŭropaj kaj Aziaj lingvoj, tiel povas kaj devas naskiĝi pli bonaj, eĉ pli „interpopolaj" verkoj, recenzoj, vortaroj, kaj nepre reciprokiĝos la kulturoj.

P. *Rados*

## Riĉa lando sur malriĉa tero

*LA FENOMENO SVISLANDO. Originale verkita de Arthur Baur. Eldonis Svisa Espranto-Societo, Romanshorn, 1979. 144 p. 24 p. fotoj, 12 x 19 cm.*

Pitoreska lando meze de Eŭropo, supre en la Alpaj altoj, kun popoloj de kvar lingvoj, kiu evitis ambaŭ mondmilitojn – ĝi ŝajnas al multaj enigma fenomeno. Dank' al instigo de la Universala Kongreso en Lucerno, esperantistoj havas agrablan avantaĝon ricevi pri la supraj kontentigan klarigon de kompetenta svisa *ĵurnalisto.* Ne senkaŭze estas substrekita la profesio de la aŭtoro. Arthur Baur, konata E-a literaturisto, per brila ĵurnalista maniero prezentas sian bone studitan temon. Oni kun plezuro ĝuas lian elegante fluantan rakontadon pri historio kaj politika strukturo, la facile flugantan skizadon pri ekonomio (!) de Svislando. Preskaŭ duono de la libro okupiĝas pri kulturaj aferoj, ankaŭ pri la lingva situacio, kiu ekzistas de longe sen konfliktoj.

Tiu fama *lingva paco* baziĝas sur vera, tradicia toleremo. En ĉiuj rilatoj realiĝas la principo, laŭ kiu oni donas al la malplimultoj pli da rajtoj, eblecoj, institucioj, k.c., ol estas ilia proporcio. Ĉu grandanimeco? Eventuale, tamen fakte ĝi devenas el plurjarcentaj spertoj, ĉizitaj de iamaj internaj kvereloj: problemoj prefere estas racie – tutnacie – solvendaj paŝo post paŝo.

La aŭtoro sukcese evitis la kutiman malsanon, superŝuti per ciferoj, detaloj, „mondfamaj" nomoj apenaŭ konataj. Li klare kaj realisme analizas la karakterizajn trajtojn de la multfadena svisa komplekso sur historia bazo inter la Eŭropaj cirkonstancoj. Forestas fanfaronado; modesta patrioto eksponas, ofte kun ironio kaj meditado, ankaŭ zorgojn kaj danĝerojn de la modernaj tempoj, kiaj ekz. la minacata naturo, malkresko de kamparanoj, drogoj, dependo de eksterlando pro energio, misaĵoj ĉe referendumoj, k.a.

Baur majstras la stilon de tiaspeca „raportaĵo", kiu lasas sin legi kun plezuro. La libro estas belaspekta kaj bone presita, sen eraretoj presejaj. Menciinde tamen, ke *propraj nomoj* (grizona, engadina, sursilvana, k.a.) de fremduloj ne ĉiam estas rekoneblaj *sen komenca majusklo!* Entute: elstara verko, *modela* prezentado de lando.

E. *Fenyvesi*

## Supoj el Suda Bohemio

*Receptaro de elektitaj Sudbohemiaj manĝoj. Supoj. Kompilis kaj tradukis Irena Papirniková, ilustris Václav Morava. Eldonis Esperanto-Klubo de České Budějovice, 1979. 16 p., 28 cm. Prezo: 5,– kronoj. (Por Hungario 10 forintoj.)*

La libreton eldonis la loka grupo de ĈEA, en České Budějovice. La formo de la kajero ne apartenas al la praktitaj recept-libroj. Tiu solvo, aperigi apartajn kajerojn ne estas la plej konvena, ĉefe pro tio, ĉar la dommastrino devas serĉi inter kelkaj la ĵus plej necesan libreton. Kvankam la receptaro pri supoj enhavas ne tre multajn specialaĵojn, tamen necesus enhavregistro. La desegnaĵoj estas ĉarmaj, sed iom tro grandaj. Anstataŭ ili ni pli volonte legus pli da receptoj. La supoj ĉiuj estas certe bongustaj, sed troviĝas inter ili kiuj estas sufiĉe tempo- kaj labor-pretendaj. (Ekzemple: *La fiŝsupo laŭ princo Vilhelmo,* la supo: *„Blanka sinjorino".*) Ili povas esti kiel interesaĵoj de malnovaj epokoj, sed ne taŭgaj por la hodiaŭa dommastrino. *(La fiŝsupo laŭ princo Vilhelmo* bezonas kvar ujojn; kiu havas superfluan tempon por lavi ilin?)

La kvantoj en kelkaj supoj, laŭ mia opinio, ne estas tre precizaj. Ekzemple: en la *„Etbienula supo"* al la tiel grandkvanta grio la akvo ŝajnas malmulta. Sed povas esti, ke la recepto bezonas nur unu litron da akvo, sed tiam ne temas pri supo!

Ankaŭ en la *Kumina supo* akvo estas malmulta, kontraŭ la kvanto de faruno.

Al la *Lenta supo* anstataŭ la celeria foliaĵo mi volonte donus laŭrfolion, spici ĝin. El la terpoma supo mankas papriko (laŭ hungara gusto).

Ne estas facile diri opinion pri la libreto de elektitaj receptoj, ĉar ili estas naciaj specialaĵoj, kaj naciaj manĝaĵoj ne povas esti prave prijuĝitaj de eksterlandano.

Maria *Balogh*

# LEHEL

## MASTRUMA SORBA FRIDUJO

## S 150 ***

## HŰTŐGÉPGYÁR

## Jászberény

Szilárd Bálint

# Al kiu apartenas Suzana?

Jam vesperiĝis kiam s-ro Kelen enpaŝis la ĉefstacidomon de ĉefurbo. Li loĝis ekster la urbo, en vilaĝo, la distanco estas 20 kilometrojn longa per fervojo. Li estas librotenisto ĉe komerca entrepreno kaj ĉiutage li veturadas tien kaj reen.

La laŭtparolilo de stacidomo ĝuste tiam avizis, ke la ekspresa trajno al Wien–Salzburg–Strasbourg–Paris post tridek minutoj ekiros.

S-ro Kelen abrupte pensis pri tio, kiel bona sento estas, se oni havas eblon por veturi eksterlanden sen zorgo..., kiam eleganta belvestita juna virino, ĉirkaŭpremante en la brakoj belan infaneton, alparolis lin:

– Mi petas pardonon... kara sinjoro, ĉu vi havas tempon dum kelkaj minutoj... por gardi mian filinon Suzana dum mi aĉetos kelkajn desertojn?

S-ro Kelen tre surpriziĝis kaj preskaŭ senvorte transprenis singarde la bebon. Preter li ondis la homamaso kaj li staris ĉe la muro, kiel gardostaranta soldato apud municiofarejo. La infaneto dolĉe dormis en liaj brakoj kaj la virino ankoraŭ ne revenis.

La laŭtparolilo akre informis unu post alia pri la ekirantaj trajnoj, jam foriris la lia, ankaŭ la Viena ekspreso, sed la virino estis nenie. Pasis horoj, la amaso de pasaĝeroj rimarkeble malkreskis, alproksimiĝis la noktomezo, tial la viro devis ekiri por atingi sian lastan noktan trajnon.

Dum la vojaĝo li funde meditis pri la stranga situacio; samtempe en la Viena ekspreso eleganta virino internen ploregis pro la intence forlasita filino.

Kiam sinjoro Kelen alvenis hejmen, lia edzino atendis lin ĉe la pordego de la domo:

– Kie vi estis tiel longe... mi havis maltrankvilon, ke okazis kun vi akcidento?!

– Jes..... mi implikis min en malbonon... – li montris la infanon al la edzino.

Dum s-ro Kelen rakontis la tutan historion, Suzana malfermis siajn bluajn okulojn kaj komencis rideti. La infano ekplaĉis al la edzino de s-ro Kelen, sed la diablo de dubo ne lasis ŝin trankvile:

– Gabrielo.... ĉu la infano ne apartenas al vi?... Tial, ke ni ne havas idon... ĉu vi ne havigis ŝin ĉe via amantino?

– Mi havas nek amantinon... nek filinon propran! – respondis Gabrielo kolere.

La postan tagon kun la bela infano ili iris al la polico. Kiam la oficiro finis la protokolon, li demandis la geedzojn:

– Ĉu vi volas transdoni la infanon por ŝtata edukado, aŭ vi volas guverni ŝin?

– Pli volonte ni adoptos la infanon... – ili respondis.

Kiam la juna inĝeniero s-ro Radnai enpaŝis la loĝejon, kun surprizo li rimarkis, ke en la dormoĉambro la pordoj de la ŝrankoj estas malfermitaj, kaj neniu estas en la loĝejo. Sur la tablo estis letero:

*„Post kiam nia eksedziĝa proceso finiĝis – kvankam la tribunalo nian filinon juĝis al vi – mi decidis, ke mi malaperos el via vivo, kaj kun Suzana ni forveturos al Parizo. Mi ne povas elteni, ke nia filino restu ĉe vi. Dum kelkaj monatoj vi ne serĉu min, ĉar mi tute ne volas reveni al via lando. La loĝejo kaj la meblaro estu la via, kiel kontraŭvaloro de nia filino.*

*Rozalia"*

S-ro Radnai klopodis respekti la deziron de la eksedzino, kaj estis trankvila pri la sorto de Suzana, pensante pri tio, ke la infano ne perdiĝis. Tamen post duonjaro s-ro Radnai informis la policon pri la situacio kaj prezentis la leteron de la eksedzino. La oficiro konstatis, ke Rozalia forlasis per regula pasporto la landon, kaj ĝi estis valida ankaŭ por Suzana, sed ili ne revenis. Dum kvin jaroj la viro pro memkonscia fiereco eĉ unu vorton ne skribis al Parizo, kaj ankaŭ li ricevis nenian sciigon.

En la sesa jaro li decidis viziti la filinon, kaj li forveturis al Parizo. Tie li sciiĝis, ke la onklino de Rozalia antaŭ du jaroj mortis, kaj Rozalia kun la filino neniam loĝis ĉe ŝi. Li estis ege surprizita...

Nun ni revenu al la komenco de la historio. Rozalia, alveninte en Parizo, ĉirkaŭrigardis en la stacidomo „Paris-Est". Ŝi vidis nenie s-ron Adonis Martin. Ŝi dungis portiston kaj kun siaj kofroj ŝi iris al la hotelo Champagne, kiu situis proksime de stacidomo. La pordisto diris, ke s-ro Martin tute ne alvenis, sed mendis ĉambron por Rozalia kaj sendis leteron por ŝi. En la hotelĉambro la virino legis:

*„Kara Rozalia! Mi estas ĉarlatano, mi tute ne pensis serioze, kiam mi estis en via lando, ke vi vere eksedziniĝos kaj forlasos laŭ mia peto vian filinon. Mi havas edzinon, kaj mi havas – filojn. Pardonu al mi, kaj mi petas vin, forgesu min eterne!*

*Adonis Martin"*

Rozalia dum la tuta nokto ploris en la lito. La postan tagon ŝi iris al la turo Eifel kaj de la unua etaĝo, la tn. ponto de memmortigantoj ŝi rigardis al la verda profundaĵo. Kiam ŝi volis transgrimpi la barilon, forta mano retiris ŝin.

– Kion vi volas fari?! – alrigardis ŝin alta blankhara viro.– Venu tuj kun mi, ni interparolu iom!

Sur la ŝtuparo ili malsupreniris, ili ne uzis la lifton. La virino senvorte obeis, kvazaŭ ŝi etus hipnotigita. En malgranda kafejo la tre inteligenta viro kun fermitaj okuloj aŭskultis la tragedion de Rozalia, kaj diris:

**Kara Leganto! Denove ni petas vian helpon fini la historion. Kie trovis amon Suzana? Ĉar certe amas ŝin la patro, la patrino kaj ankaŭ la geedzoj Kelen. La aŭtoroj de la du plej bonaj solvoj – ampleksantaj ne pli ol 30 tajpitajn liniojn – ricevos libropremion kaj la tekstoj aperos en HV.**

## Ekzameno sen risko

**Ekzamenanto: Georgi Mihalkov**

**La morto de la ĉielarko**

**Endre Ady:**

1. Kiu artikolo de Endre Ady finiĝas per la frazo: *„Ĉi tio estas hungara problemo."?*

2. El kiu poemo estas citita la suba strofo?
*„Vi tronu brile, ruĝa stelo.*
*De kiam sentas hom' mizeron,*
*Ruĝa stelo donis esperon."*

3. Ni citas strofon de Ady-poemo, bonvolu sendi la titolon de tiu poemo.
*„Fiera pavaro, sunplenaj orplumoj,*
*Kri-krie anoncu: jen novaj plenumoj!"*

La limdato por la sendo de la respondoj estas unu monato post la apero de la revuo.

Por la rubriko „Ekzameno sen risko", aperinta en la ĉijara 2-a numero de Hungara Vivo, plej precize solvis la demandojn:
Atanas *Gaev*, ul. „De. Petrov" bl. „Pirin" A.
4230 Asenovgrad, Bulgario
Vervejko Nikolaj, u. Mukaĉevo – 10
str. Odesskaja – 3 b. L. 29. Zakarpatskaja obl. 295400 USSR

## KRUCENIGMO
### kun tri kaŝitaj proverboj

HORIZONTALE:

A – LA UNUA PROVERBO. B – Finaĵo de la infinitivo – juna mul' – nematura kok'. – spirita prezentad'. C – Landa Sekcio – latine: „mito" – malsan' (sekiĝ' de mjelo) – ĉefurbo de Grekujo. Ĉ – Monkest' – silabokrea parolson' – preskaŭ sankta – substanc' por rigidigi tolaĵon. D – Sono de horloĝo – rilataj al substanco por lavpurigado – krabmaniere – sufikso de pasiva futura participo. E – Primitiva kanu' – kaduka dom' – hazarde okazanta – numeralo. F – Elspiris aromon – denova pet' – uzata al nuklea energio – aŭtosimbolo de Italujo. G – LA DUA KAŜITA PROVERBO. Ĝ – Nulo – mank' de sango – spirito, psiko – epoko. H – Junulara Sekcio – rilata al konata anestezilo – membraro – blekas kiel ansero. Ĥ – Kemia simbolo de osimio – aŭdorgano – frakciero – teksaĵa uj'. I – Unu grad' de lernejo, grup', tavol' – ŝategata – rilata al rivero en Sovetio (38 °E, 63 °55'N) – Jaro de Internacia Kunlaboro. J – Trajnovojaj stangoj – nomo de la unua viro – aldoniĝa, almetiĝa – prepozicio. Ĵ – Rilataj al indigodona arbedo – tro ŝparema – mola apendico ĉe la palata velo – litro. K – LA TRIA KAŜITA PROVERBO.

VERTIKALE:

1 – Elasta ĵetglob' por ludoj – aroj da pakitaj objektoj – fermil' de akvotubo. 2 – Aŭtosimbolo de Luksemburgio – rilata al moka kaj ridinda kritiko – ceremonie. 3 – Individua Membro – rilata al densa solvaĵo de sukero – enbuŝa likvaĵ'. 4 – Interjekcio (bruo de falo) – ĉiuj kune – ne akompanate. 5 – Frukt' de olivarbo – enporda aŭ enmura fenestro – unu el la nomoj de Komenský. 6 – Kunigos per nitoj – rilata al jarsezono – nomo de la litero J. 7 – Direktad'de la evoluo de la kapabloj – surpriziĝema – kemia simbolo de sulfuro. 8 – Finaĵo de la akuzativo – urbo en Japanujo (vintraj olimp. ludoj en 1972) – virnom'. 9 – Esperanto-Klubo – formanta lamenojn – rilata al ĉefurbo de Kanado. 10 – Fotografaĵ' – rilata al orienta ŝtato – amata person'. 11 – Golf' sur la Ruĝa Maro – loĝantino de Ĉeĥio – altvalora metalo. 12 – Mezopoka trikorda vjol' – persa ora monero – Asocia Membro. 13 – Tuto de la ideoj – rilata al lingvo, el kiu formiĝis la norvega, sveda kaj dana – aŭtosimbolo de Hispanujo. 14 – Substantiva finaĵo – ruslingve: „glaso" – ŝirma vest' por oreloj. 15 – Virseksa persona pronomo – vivej' de malnovaj monaĥaj ordenoj – karakterizita per ogivo. 16 – Inklina – tub', kondukanta la nutraĵon ĝis la stomako – maljunul'. 17 – Rilata al ronĝulo al muso – estas maldoĉa – parhuful'kun grandaj plataj kornoj. 18 – Faremo – rizbrandaj – kemiaj simboloj de oksigeno kaj argono. 19 – Saltanta amfibieto – ternuks' – aŭtosimbolo de Tajlando. 20 – Figur' de diaĵo, honorata per kulto – tuŝos per lipoj – subtera provizejo.




HELPILOJ:

C – Tabes. 8 – Aladar. 11 – Akab. 12 – Ribek.

*St. Marcek*

*Alsendu nur la tri kaŝitajn proverbojn. Limdato: unu monaton post la ricevo de la revuo.*

Libropremion gajnis: Werner *Schmidt* (GDR) kaj Pál *Kovács* (Hungario)

# Korespondi deziras

F-ino Mariola *Barska* (19) pri literaturo, moderna muziko, turismo, sporto, rec. gastigado, kino, teatro. Interŝanĝas bk, pm, diapozitivojn, mod-rcvuojn, diskojn, magnetofon-kasetojn. PL–56–400 *Oleŝnica,* Bystre 10 e/1. – S-ro Alberto Mario *Pozzali* (33) kun geamikoj pri div. temoj. I–20127 *Milano,* via Natale Battaglia 29. – El Taŝkent interŝanĝas kolorajn bk, E-librojn, revuojn, korespondus ktm, pêt, konstruisto Nikolao *Artjomenko* (30), SU–700 000 Uzbekistano, *Taŝkent-P.* abonkesto 269. – S-ro *Ŝaripov* Karim (27) fraŭlo, elektristo, pêt, ktm, kol. bk. SU–466.412 Kazaĥstano, *Gurjev,* str. Burovikov 2–1, pos. Priĉoroĵnij. –

Andreo *Bobkiewicz* (20) studento pri literaturo, poezio, ankaŭ problemoj de E-tradukoj, pri studentaj teatroj, orienta kaj Eŭropa filozofioj, katolika, budaisma, Zen-a etiko-mistiko. Mondvojaĝantoj skribu, same alpinismon ŝatantoj. PL–50–139 *Wroclaw* str. Szewska 63.m2. – S-ro Raimo *Tuisku* (28) geodezia inĝeniero, pri lingvoj, filmoj, turismo, kol. bk. de pejzaĝoj, urboj. SF–95420, *Tornio–2* Aarnintie 7 D 29, Finnlando. – F-ino *Krawczyk* Malgorzata (23) oficistino, pri muziko, literaturo, teatro, turismo, kol. bk, pm. PL–30–669 *Kraków* str. Okolna 26/114. – Stanislaw *Dybniek* (36) konstruisto-majstro, kun granda familio. Interesiĝas pri libroj, muziko, turismo, konstruado. PL–78–316 *Breĉno* gub. Koszalin. – Edith *Boudet* pri muziko, sporto, vojaĝoj. F–63500 *Issoire,* École publique, „Les Pradeaux". – Catherine *Gerle* (20) pri legado, sporto, naturo, muziko, F–63570 *Brassac les Mines,* Jumeaux.

Deziras korespondi kun la tuta mondo, prefere kun samfakuloj, bulgaraj medicinistoj en la distrikta malsanulejo en urbo Ŝumen, komencantoj. – Bogdana *Dimitrova* Jordanova (29) ekomiistino 9700 Ŝumen, ul Hristo Botev 4a – D-ro Kaluŝka *Kostadinova Ĉelebieva,* (30) kuracistino 9700 Ŝumen ul. Bitolja 13 – Blaga *Ivanova Dobreva,* (32) ekonomiistino, 9700 Ŝumen, ul. Aheloj 12 – Blaga *Angelova Bogdanova* (36) viekuracistino, 9700 Ŝumen, ul. Rajna Knjaginja 24 – Lilia *Ilieva Janakieva* (32) vickuracistino 9700 Ŝumen ul. Han Omurtag 3 – Iozdanka *Panojotova Markova* (49) ekonomiistino 9700 Ŝumen, ul. Moskovska 20, ap. 1 – Neli *Veselinova Demirova* (32) ekonomiistino 9700 Ŝumen, ul. Dede agaĉ 17, vh III, ap. 49 – Stojanka *Rumenova Ivanova,* (36) ekonomiistino 9700 Ŝumen, ul. Aprilov 62 ap 4 – D-ro Penka *Spiridonova Bojadĵieva* (47) kuracistino 9700 Ŝumen, ul. Milin Kamaz 18/a.

# ENHAVTABELO 1979


**REDAKTORAJ ENKONDUKOJ**
Daŭris nur 133 tagojn . . . = 1/1
Jam la tria ministro . . . = 2/41
Ni prezentas al vi . . . = 3/81
Serĉu liberan seĝon, kaj . . . = 4/121
Estus bone scii . . . = 5/161
La atuto de tiu ĉi . . . = 6/201

**ORIGINALA PROZO**
BÁLINT. Sz.: Al kiu apartenas Suzana? = 6/237
– : La defraŭdanto. = 5/194
– : La dolĉa nupto. = 3/112–113
– : Turisma vojaĝo sur la Meza Maro. = 2/73
BENCZIK, V.: Malplena Vortaro. = 5/199
– : Stranga historio pri heredita pentraĵo. = 6/223
GOLDEN, B.: La venĝo. = 5/172–173
NEMERE, I.: Nudelo kun marmelado. = 5/185
TÓFALVI, É.: Historio de nia amikeco. = 2/64–65

**TRADUKITA PROZO**
CSÁK, Gy.: En ŝtrumpetoj. (Trad. Kalocsay, K.) = 2/54–55
CSONTOS, G.: Naŭzaj tagoj. (Trad. Fenyvesi, E.) = 5/184–185
FEJES, E.: Brasikaĵo. (Trad. Rados, P.A.) = 1/12–13
HERNÁDI, Gy.: Tavoligo kaj disigo. (Trad. Benczik, V.) = 1/14–15
ILLÉS, E.: Dilaŭdido. (Trad. Varga–Haszonits, Zs.) = 5/175–178
MÓRA, F.: Bela arbo de Kristnasko. (Trad. Rados, P.A.) = 4/130–131
MÓRICZ, Zs.: La justo de la nevenkebla imperiestro. (Trad. Nagy, I.) = 3/89–90
– : Nur la boneco helpas ĉi tie. (Trad. Varga–Haszonits, Zs.) = 3/86–87
– : Sep krejceroj. (Trad. Szalay, S.) = 3/84–85
– : La stipendio. (Trad. Sárközi, J.) = 3/88
ÖRKÉNY , I.: Unuminutaj noveloj. (Trad. Nagy, I., Benczik, V.) = 6/207

**ORIGINALA POEZIO**
AULD, W.: Rimletero 75 (al Boulton). = 5/182
BALBIN, J.: Imperio de l' koroj. = 5/197
BÉCS, E.: La 8a de Majo 1945. = 2/48
– : Provinca aŭgusto. = 6/218
FRANCIS, J.I.: Bremsu la jarojn. = 5/197
– : De genero. = 6/218
– : Ĝeraldina. = 2/56
GABRIELLI, L.: Amo kaj malamo. = 6/218
GIORGI, A. de': Metamorfozo. = 5/196
HEIDE, Z.: Mia amo. = 5/197
HLAVATHY, A.: Skizofrenio. = 5/197
HULES, A.: Vesperkanto. = 5/196
JEVSEJEVA, L.: X X = 5/196
KALOCSAY, K.: Rimportreto XIV (pri Andreo Ĉe.) = 6/217
NERVI, M.: Al Kalocsay. = 2/55
VARGA, J.: Kiel araneo. = 5/196
– : Miniaturoj. = 1/32
– : Sen dorno: = 6/218
WACHA, B.: Ĉen per Ĉin. = 6/218

**TRADUKITA POEZIO**
ADY, E.: Kvazaŭ letero al Zsigmond Móricz. (Trad. Fejes, M.) = 3/91
ÁPRILY,L.: Peto al la oldeco. (Trad. Varga, J.) = 5/176
BALASSI, B.: Renkontinte Julian, jene ŝin salutis. (Trad. Kalocsay, K.) = 4/137
BALÁZS, B.: Apud la fajro, en gardo ruĝa. (Trad. Rados, P.A.) = 1/13
BERZSENYI, D.: Mia dividparto. (Trad. Kalocsay, K.) = 6/214
CSOKONAI VITÉZ, M.: Al la Espero. (Trad. Kalocsay, K.) = 6/214
– : La Senmorteco de l' Animo. (Trad. Szilágyi, F.) = 6/214
IZES, M.: Al Zsuzsa Koncz. (Trad. Fejes, M.) = 5/173
JANUS PANNONIUS. Pri papo Paŭlo. (Trad. Kalocsay, K.) = 3/95
– : Al Silvia. (Trad. Kalocsay, K.) = 3/95
– : Por la paco. (Trad. Kalocsay, K.) = 3/95
JÓZSEF, A.: Jam du miliardoj . . . (Trad. Fejes, M.) = 2/55
JUHÁSZ, Gy.: Al fronto de Laboristhejmo. (Trad. Fejes, M.) = 1/11
NAGY, L.: Kiu transportos la Amon. (Trad. Rados, P.A.) = 2/48
TAMKÓ-SIRATÓ, K.: La du Tomoj. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Frambo. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Ĝardeneton. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Homoj, he, vi homoj! . . . (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Lum'. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Malfrua aŭtuno. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Salut'! (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
TÓTH, Á.: La nova dio. (Trad. Kalocsay, K.) = 1/9
VÁCI, M.: Deveno. (Trad. Varga, J.) = 5/178
WEÖRES, S.: Ĉi ĉeval', ĉu ne, laŭdindas? (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Restigado. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129
– : Se tempest' venas el alto. (Trad. Hules, A.) = 4/128–129

**RECENZOJ**
La antikva Rigo. (Benczik, V.) = 4/157
AULD,W.: Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto. (Benczik, V.) = 4/157
AULD, W.: Pri lingvo kaj aliaj artoj. (Benczik, V.) = 3/116
BAUR, A.: La fenomo Svislando. (Fenyvesi, E.) = 6/236
Baza literatura krestomatio. (Haupenthal, R.) = 6/236
BEEKMAN, V.: Lumo de orienta Eŭropo. (Benczik, V.) = 1/37
BÖLL, H.: La perdita honoro de iu Katarino Blum'. (Varga-Haszonits, Zs.) = 3/117
BUTLER, S.: Erevono. (Fenyvesi, E.) = 3/116
Ezopa Saĝo. (Benczik, V.) = 2/76
GABRIELLI, L.: La ĝardeno de la urbestro. (Fenyvesi, E.) = 3/117
IBSEN, H.: Brand. (Benczik, V.) = 3/118
Japana variacio. (Benczik, V.) = 1/37
KALOCSAY, K.: Streĉita Kordo. (Mihalkov, G.) = 2/76–77
La kato en la sako. (Mihalkov, G.) = 1/38
KURODA, U.: Lazur' kristala kaj pluv' susura. (Benczik, V.) = 1/38
LEBRUN, V.: Leo Tolstoj. (Benczik, V.) = 6/234
LINNANKOSKI, J.: La kanto pri la fajrruĝa floro. (Benczik, V.) = 1/38
LORJAK: Retoj. (Benczik, V.) = 4/157
MIYAMOTO M.: Sarkasme kaj entuziasme. (Rados, P.A.) = 6/235
MOLNÁR, F.: La knaboj de Paŭlo-strato. (Poliŝĉuk, P.) = 1/38
MÜLLER, T.: La amo de Danto Alighiero. (Fenyvesi, E.) = 1/37
NERVI, M.: La turoj de l' ĉefurbo. (Benczik, V.) = 4/158
POTTS, B.: La Nova Butikisto de Nukugaia kaj aliaj noveloj. (Benczik, V.) = 2/76
– : Poezia Bukedo Por Geknaboj de la Mondo. (Benczik V.) = 4/156

Praktika Bildvortaro de Esperanto. (Benczik, V.) = 5/195
Receptaro de elektitaj Sudbohemiaj manĝoj. (Balogh, M.) = 6/235
SIENKIEWICZ, H.: Tra dezerto kaj praarbaro. (Benczik, V.) = 4/156
Skota Antologio. (Benczik, V.) = 2/77
Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. (Benczik, V.) = 3/118
VALANO, J.: Ĉu li bremsis sufiĉe? (Benczik, V.) = 5/195
WELLS, J.: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. (Vaskó, T.) = 5/195–196

**ARTOJ**

FEJES, M.: Zsigmond Móricz – verkisto de realismo. = 3/82–83
GERGELY, M.: La bildoj de Endre Bálint. = 1/35
– : Éva Hajós. = 2/57
– : Infandesegnaĵoj, infananimoj. = 4/132–133
– : József Rippl-Rónai. = 3/99
– : László Mednyánszky. = 6/219
– : La sonĝo de naiva pentristo. (Dévényi, Antal.) = 5/179
MIHALKOV., G.: Mia revo. Pensoj de bulgaro pri la hungara literaturo. = 5/166
– : Tri verkoj de Móricz. = 3/87
RADOS, P.A.: „Porinfanaj" teatroj de Budapeŝto. = 4/126–127
TORDA, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo. (Trad. Rados, P. A.) = 3/94–95, 4/136–137, 5/170–171, 6/212–213.
VARGA-HASZONITS, Zs.: István Örkény. = 6/206

**ESPERANTO-MOVADO**

BARNA, Z.–FENYVESI, E.: Esperanto-movado dum la Konsilia Respubliko. = 1/10–11
BENCZIK, V.: Lucerna mozaiko. = 6/208
– : Modela vivo. (Győry-Nagy, L.) = 5/165
FEJES, M.: Promeso pri nia futuro. = 4/122–123
HOLZHAUS, A.: Zamenhof ne estis monavida. = 6/215–216.
MIHALKOV, G.: Vivo dediĉita al Esperanto. = 5/165
Publika letero al turistoj (Trad. Rados, P.A.) = 2/46–47
RADOS, P.A.: Granda paseo, brilega futuro. = 6/203

**ESPERANTA KULTURO**

BEDNAŘIK, A.: Literatura frandaĵo. = 1/34
BARCSAY, Zs.: Lerneja E-instruado en Hungario. = 4/142
BENCZIK, V.: Budapeŝta Informilo jubileas. = 3/97
– : „Librofabriko" en Budapeŝto. = 5/164
– : Mi fariĝis pornografiisto. = 6/209

E HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H–1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj postoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,- al eksterlando por unu jaro 78,- forintoj. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H–1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,-Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. 79-7177 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 018-7704.**

DRESEN, H.: Kelkaj rememoroj pri Kalocsay. = 2/63
FENYVESI, E.: La apostolo (pri Andreo Ĉe.) = 6/217
GIORGI, A. de': Refoje pri teatro. = 2/52
GOĤŜTEJN, V.: Esperanto-teatro en Leningrado. = 2/44–45
Pioniro – jam 13-jara. = 3/120
RÉVÉSZ, S.: Ne mi konfuzis. = 1/34
SOÓS, É.: Versaj korespondaĵoj. = 5/182
TÖLGYESI, L.: Vortfinaj fonemoj en Esperanto. = 3/103

**INTERVJUO**

. . . kun ministro pri klerigado de la Estona SSR, k-do Ferdinand Eisen. (Benczik, V.) = 6/202
. . . kun financministro d-ro Lajos Faluvégi. (Szenes, I.) = 2/42–43
„Onjo Helena" en la Infanaj Kongresetoj. (Benczik, V.) = 4/125
. . . kun János Kádár. (trad. Benczik, V.) = 1/2–4
Spertoj agrablaj kaj utilaj . . . kun P. A. Rados. = 5/167
DEÁK, A.–VÁNDOR, K.: „Maton al lingva nekompreno!" . . . kun Ildikó Tordasi, Zoltán Magyar, Galina Prozumenŝĉikova, Aavo Pikkuus, Anatolij Karpov. (Trad. László, I.) = 4/152–153.

**HISTORIO**

HALÁSZ, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo. (Trad. Varga–Haszonits, Zs.)
7. Provo kaj krizo de la centrismo. = 1/16–17
8. Turka regado, Habsburga potenco. = 2/50–51
9. La milito de dek kvin jaroj. Bataloj kontraŭ la absolutismo de Habsburgoj. = 3/92–93
10. Batalo de „kuruc"-oj por la sendependeco. = 4/134–135
11. Hungario kaj la absolutismo. = 5/168–169

FENYVESI, E.: 1919: Hungarlanda Konsilia Respubliko. = 1/5–8

**DIVERSAJ TEMOJ**

Pri Hungario
BENCZIK, V.: Aŭtomobil-produktado sen aŭtomobil-fabriko. = 2/53
– : Hungaraj vinoj. = 5/162
– : Kiel hungaroj vojaĝas? = 2/45
FENYVESI, E.: Hej fervojo, kia ĝojo . . . = 4/124
– : Malgrandaj eklezioj en Hungario. = 3/96
Hungario kaj la Internacia Jaro de la Infano. = 4/139
KAPITÁNY, L.: „Amikeco–1" kaj „Amikeco–2". = 5/163
– : Mondĉampiona konkurado de kvarĉevalaj ĉaristoj. = 1/33
– : Norvego fariĝinta hungara nobelo. (Gregersen, G.) = 4/155
– : Petrolminado en Hungario. = 3/113–114
LÁSZLÓ, I.: Hungario kaj la naciaj malplimultoj. = 1/18–19

**ALIAJ TEMOJ**

BENCZIK, V.: Vizite ĉe nordaj parencoj. = 2/48
FENYVESI, E.: La plej granda teleskopo de la mondo. = 1/32
KAPITÁNY, L.: Proteinoj – el verda vegetaĵo. = 2/49
Tridek jaroj da kunlaboro. = 6/204

**KONSTANTAJ RUBRIKOJ**

FARKAS–TATÁR, É.: Panoramo. = 1/20–21, 2/60–61, 3/190–191, 4/140–141, 5/180–181, 6/220–221
FENYVESI, E.: Revuo de revuoj. = 1/23, 2/62, 3/102, 4/143, 5/183, 6/222
LÁSZLÓ, F.: Medioprotektado en Hungario. = 1/24–29, 2/66–71, 3/104–109, 4/144–149, 5/186–191, 6/226–233
MARĈEK, S.: Krucenigmo. = 6/238
MIHALKOV, G.: Ekzameno sen risko. = 1/36, 2/79, 3/119, 4/155, 5/199, 6/237
SZABÓ, I.: Krucenigmo. = 1/39, 2/79, 3/119, 4/159, 5/199

Ankaŭ tiajn domojn
ni konstruas

KONSTRUINDUSTRIA ENTREPRENO
DE HEVES – DEPARTEMENTA KONSILIO

Nia ekspozicio
en foiro

Heves-Megyei Tanácsi Építőipari Vállalat

3300 EGER
KLAPKA U. 11.
Telex: 63337 – Tel.: 16–62

Ni deziras feliĉan novan jaron
al ĉiu leganto de Hungara Vivo

A.P.

# Valoraj artobjektoj

# porcelano de bona marko

# stilmebloj

BAV

# Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

# VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist




en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért